

A watercolor-style portrait of Allan Kardec, a man with a mustache and goatee, wearing a brown jacket, a blue vest, and a white shirt with a dark cravat. A large green star is superimposed over the left side of his chest. The background is a textured green and brown wash.

Allan Kardec

El la franca lingvo tradukis
L. C. Porjo Carreiro Neto
Ismael Gomes Braga

KIO ESTAS SPIRITISMO?

Kio estas Spiritismo?

Kio estas Spiritismo?

ENKONDUKO

*EN LA SCION PRI LA NEVIDEBLA MONDO
PER MANIFESTIĜOJ DE LA SPIRITOJ*

ENHAVANTA

*La resumon de la principoj de la spiritisma doktrino,
kaj respondon al la ĉefaj kontraŭdiroj*

DE

ALLAN KARDEC

*Aŭtoro de “La Libro de la Spiritoj”, “La Libro de la
Mediumoj”, “La Evangelio laŭ Spiritismo”, “La Ĉielo
kaj la Infero” kaj “La Genezo”, fondinto
de la “Revue Spirite”*

Ekster karito, nenia savo

El la franca originalo tradukis P. C. N. kaj I. G. B.



Eldonfako de

**BRAZILA SPIRITISMA FEDERACIO
DEPARTAMENTO EDITORIAL E GRÁFICO**

Rua Souza Valente, 17 — 20941 - 040

Rio de Janeiro, RJ — BRAZILIO

Tabelo de la enhavo

<i>Antaŭparolo</i>	<i>Paĝoj</i> 7
--------------------------	-------------------

ĈAPITRO I

Kio estas Spiritismo?

Mallonga diskutado pri spiritismaj aferoj:

<i>Unua dialogo</i> — La Kritikisto	9
<i>Dua dialogo</i> — La Skeptikulo	21
Spiritismo kaj Spiritualismo	22
Malakordoj	24
Ŝajnigaj spiritismaj fenomenoj	25
Senpoveco de la misfamigantoj	27
Tio mirakleca kaj tio supernatura	29
Opono de la scienco	30
Malveraj klarigoj de la fenomenoj: Halucino. — Magneta fluidaĵo. — Reradiado de la penso. — Cerba superekscitiĝo. — Somnambu- la stato de la medioj	36
La nekredemaj ne kapablas vidi por konvinkiĝi	39
Volonto aŭ malvolonto de la Spiritoj por konvinki	41
Origino de la modernaj spiritismaj ideoj	42
Rimedo por komunikado	45
Profitamaj medioj	49
Medioj kaj sorĉistoj	54
Diverseco de la Spiritoj	56
Praktika utileco de la manifestiĝoj	60
Frenezeco, memmortigo, obsedo	61

	<i>Paĝoj</i>
Forgeso pri la pasinteco	64
Rimedoj por konvinko	67
Societo por la kontinuigo de la spiritismaj laboroj de Allan Kardec, Strato Lille, 7	69
Malpermeso de Spiritismo	70
<i>Tria dialogo</i> — La Pastro	72

ĈAPITRO II

Elementaj principoj de Spiritismo

Antaŭrimarkoj	98
Pri la Spiritoj	100
Komunikiĝoj kun la nevidebla mondo	104
Providenca celo de la spiritaj manifestiĝoj	114
Pri la mediumoj	115
Rifoj de la mediumoj	119
La ecoj de la mediumoj	122
Ĉarlatanismo	126
Identeco de la Spiritoj	127
Kontraŭdiroj	128
Konsekvencoj de Spiritismo	129

ĈAPITRO III

Solvo de kelkaj problemoj per la spiritisma doktrino

Plureco de la mondoj	135
Pri la animo	136
La homo dum la surtera vivo	139
La homo post la morto	149

LA KOMENCO DE LA HISTORIO 159

PRI LA TRADUKO 161

Antaŭparolo

Tiuj, kiuj Spiritismon nur surprafe konas, nature inklinas elmovi iajn demandojn, kies solvon havigus pli profunda studado de tiu afero, sed tempon kaj ofte volon, ili ne havas por sin fordoni al kontinua observado. Antaŭ ol tion entrepreni, iuj eble dezirus ekscii almenaŭ, kio ĝi estas, kaj ĉu valoros la penon okupi sin pri ĝi. Ŝajnis al mi tial utile malmultvorte prezenti la respondojn pri kelkaj el la fundamentaj demandoj, kiujn oni ĉiutage faras al mi; fo estos, por la leganto, ia inicado, kaj, por ni, gajnita tempo, pro la nebezono konstante ripetadi unu saman aferon.

La unua ĉapitro enhavas, sub la formo de dialogoj, respondojn pri la plej ordinaraj kontraŭdiroj de tiuj, ne konantaj eĉ la rudimentaĵojn de la Doktrino, kaj ankaŭ la refutadon de la ĉefaj argumentoj de ties oponentoj. Ĉi tiu agmaniero ŝajnis al mi la plej konvena, ĉar ĝi ne estas seka, kiel la dogma aranĝo.

La dua ĉapitro estas destinita por nelonga elmontro de tiuj partoj de la praktika kaj eksperimenta scienco, kiujn, ĉe manko de kompleta instruado, la sensperta observanto devas atenti por plenscia juĝado; ĝi estas ia kvazaŭa resumo de "La Libro de la Mediumoj"^(*). La kontraŭdirojn plej ofte naskas malĝustaj ideoj, kiujn oni jam antaŭe faras al si pri io, kion oni ne konas; korekti tiajn ideojn signifas antaŭrespondi kontraŭdirojn: jen la celo de ĉi tiu verketo.

La tria ĉapitro povas esti rigardata kiel resumo de "La Libro de la Spiritoj"^(**); ĝi solvas, per la Spiritisma

(*) — Jam publikigita en Esperanto. — *La Trad.*

(**) — Jam publikigita en Esperanto. — *La Trad.*

Doktrino, iom da plej altgrade interesaj demandoj kun naturo psikologia, morala kaj filozofia, kiujn oni ĉiutage faras, sed kiujn nenia filozofio ĝis hodiaŭ kontentige respondis. Oni provu ilin solvi per ia alia teorio, sen la ŝlosilo, kiun al ili havigas Spiritismo, kaj oni vidos, kiuj respondoj estas la plej logikaj kaj plej kontentigaj por la prudento.

Ĉi tiu epitomo estas utila ne nur al novicoj, kiuj el ĝi povas en mallonga tempo kaj per malgranda elspezo ĉerpi la plej esencajn sciojn pri la Doktrino, sed ankaŭ al ties adeptoj, al kiuj ĝi havigas la rimedojn, por respondi al la unuaj kontraŭdiroj, kiuj ja ne mankos, kaj, krom tio, ĉar ili ĉi tie trovos kunigitaj, en malvasta kadro kaj per rapida ekrigardo, la principojn, kiujn ili neniam forgesu.

Por tuj kaj nedetale respondi la demandon, entenatan en la titolo de ĉi tiu verketo, mi diras, ke:

SPIRITISMO ESTAS NE NUR OBSERVOSCIENCO, SED ANKAŬ FILOZOFIA DOKTRINO.

KIEL PRAKTIKA SCIENCO ĜI KONSISTAS EN LA RILATOJ, KIUJN NI POVAS STARIGI KUN LA SPIRITOJ; KIEL FILOZOFIO ĜI TENAS EN SI ĈIUJN MORALAJN SEKVOJN DE TIAJ INTERRILATOJ.

Oni povas difini ĝin jene:

SPIRITISMO ESTAS SCIENCO, KIU TRAKTAS PRI LA NATURO, LA ORIGINO KAJ LA DESTINO DE LA SPIRITOJ, KIEL ANKAŬ PRI ILIAJ RILATOJ KUN LA ENKORPA MONDO.

ĈAPITRO I

Kio estas Spiritismo?

Mallonga diskutado pri spiritismaj aferoj

UNUA DIALOGO

LA KRITIKISTO

Vizitanto. — Mi diras al vi, sinjoro, ke mia prudento rifuzas konsenti la realecon de la strangaj fenomenoj, atribuataj al la Spiritoj, estuloj, kiuj, laŭ mia konvinko, ekzistas sole nur en la imago. Tamen antaŭ evidenteco oni devas sin klini, kaj tion mi ja farus, se mi povus havi nekontesteblajn pruvojn; mi tial venas peti de via komplezemo la permeson ĉeesti nur unu aŭ du eksperimentojn, por ne esti impertinenta, celante konvinkiĝi, se tio estus ebla.

Allan Kardec. — Se via prudento, sinjoro, rifuzas akcepti ion, kion ni rigardas kiel bone kontrolitajn faktojn, vi do opinias ĝin supera ol la prudentoj de ĉiuj, kiuj ne dividas vian juĝon. Mi ne dubas vian talenton kaj ne pretendas starigi mian inteligentecon super la via; konsentu do, ke mi eraras, ĉar parolas al vi la prudento, kaj jen ĉio finita.

V. — Se tamen al vi prosperus konvinki min, min, konatan kiel antagoniston de viaj ideoj, tio estus ja miraklo treege favora al via afero.

A. K. — Mi ĝin bedaŭras, sinjoro, mi ne posedas la naturdoton fari miraklojn. Ĉu vi pensas, ke unu aŭ

du seancoj sufiĉos por vin konvinki? Tio estus efektiva miraklo; mi bezonis pli ol unu jaro da laboroj, por konvinkiĝi, kio pruvas al vi, ke mia konvinkiteco ne estas io senpripensa. Cetere mi ne faras publikajn seancojn, kaj laŭŝajne vi tute eraras pri la celo de niaj kunsidoj, ĉar ni ne faras eksperimentojn, por kontentigi la scivolon de iu ajn.

V. — Vi do ne penas fari prozelitojn?

A. K. — Kial mi penus fari el vi prozeliton, se vi mem ne penas varbiĝi? Mi devigas neniun konvinkiĝi pri io. Kiam mi renkontas homojn sincere dezirantajn kleriĝi kaj farantajn al mi la honoron peti min pri klarigoj, tio estas por mi plezuro kaj devo respondi al ili en la limoj de miaj scioj; pri tiuj antagonistoj, kiuj, kiel vi, havas neŝanceleblajn konvinkojn, mi donas al mi nenion da peno, por ilin deadmoni: ekzistas multaj volontemaj homoj, por ke mi ne perdu tempon kun tiuj ne pretaj akcepti mian aferon. La konvinko venos pli aŭ malpli frue per la altrudo de la faktoj, kaj la nekredemuloj estos trenataj de la torento; por la momento kelkaj partianoj plie aŭ malplie ne estas senteblaj sur la pesilo; tial vi neniam vidos elverŝiĝi mian galon ĉe la peno altiri al niaj ideoj tiujn, kiuj havas, kiel vi, tiel fortajn motivojn, por foriĝi de ili.

V. — Mi pensas, ke konvinki min estas pli interese ol kiel vi imagas al vi. Ĉu vi volas permesi al mi tute malkaŝe klarigi mian penson kaj promesi al mi ne ofendiĝi ĉe mia parolo? Tio estos miaj ideoj pri la afero mem, ne pri la persono, al kiu mi parolas: mi povas respekti la personon, ne dividante ties opinion.

A. K. — Spiritismo instruis min atribui nenion da graveco al la bagatelaĉa trosentemo de la memestimo kaj ne ofendiĝi pri vortoj. Se via parolo transpaŝos la limojn de la ĝentileco kaj konvenaĵoj, mi el ĝi konkludos, ke vi estas malbonedukito: nenion pli. Mi, mi preferas lasi la malsaĝaĵojn ĉe aliaj, ol ilin mem fari. Vi do vidas, el ĉi tio sola, ke Spiritismo utilas al io.

Mi jam diris al vi, sinjoro: min tute ne interesas instigi vin same pensi kiel mi; mi respektas vian opinion, se ĝi estas sincera, kiel ankaŭ mi deziras, ke vi respektu mian. Rigardante Spiritismon kiel ian senenhavan revon, vi, venante al mi, diris en via animo: "Mi nun vidos frenezulon". Konfesu tion sincere, mi ne ofendiĝos pro ĝi. Ĉiuj spiritistoj estas ja frenezuloj, tio estas rekonata afero. Nu, sinjoro, ĉar vi rigardas tion kiel ian mensan malsanon, mi tial eĉ faras al mi skrupulon komuniki ĝin al vi, kaj mi ja miregas, ke ĉe tia penso vi deziras havi konvinkon, kiu vin alkalkulus al la frenezuloj. Se vi jam antaŭe havas la firman opinion, ke vi ne povas esti konvinkita, via peno estas do senutila, ĉar ĝin movas nur scivolo. Ni do mallongigu nian konversacion, ĉar mi ne povas perdi tempon en sencelaj babiladoj.

V. — Homo povas erari, fari al si ian iluzion, tamen tio ne kuntrenas, ke li estas frenezulo.

A. K. — Formetu ĉirkaŭfrazojn: diru, kiel tiom da aliaj, ke tio estas manio forpasema; vi tamen konfesos, ke manio, kiu dum kelke da jaroj havigis al si milionojn da adeptoj en ĉiuj landoj, kiu kalkulas ĉiukategoriajn scienculojn, kiu disvastiĝas prefere en la kleraj klasoj, ĝi ja estas ia stranga manio, kiu meritas ioman ekzamenon.

V. — Pri ĉi tio mi havas proprajn ideojn, vere, tamen ili ne estas tiel absolutaj, ke mi ne konsentus oferi ilin ĉe la evidenteco de la faktoj. Mi diras al vi, sinjoro, ke al vi estas iel interese konvinki min. Mi konfesas al vi, ke mi intencas publikigi verkon, en kiu mi proponas al mi la taskon **ex professo** (tiel!) (*) elmontrion, kion mi konsideras eraro; kaj ĉar tia libro certe renkontos grandan sukceson kaj per unu fojo forbatos

(*) *Ex professo*: latina esprimo, signifanta "plene konanta la aferon". — *La Trad.*

la Spiritojn, tial, se mi fine estus konvinkita, mi tiam ĝin ne publikigus.

A. K. — Forte ĉagrenus min, sinjoro, neebliĝi al vi ĝui la utilecon de tia libro, kiu certe renkontos grandan sukceson; cetere mi havas nenian intereson malhelpi al ĝia publikigo, kontraŭe, mi deziras al ĝi grandan disvastiĝon, ĉar ĝi eĉ ludus la rolon de prospekto kaj reklamilo. Kiam iu afero estas atakata, tio vekas la atenton; multaj homoj volas vidi la "por" kaj la "kontraŭ", kaj la kritiko konigas tiun aferon eĉ al tiuj, kiuj ne pensadis pri ĝi: tiel oni ofte pretervole reklamas ion por la profito de tiuj, kiujn oni volas malutili. La demando pri la Spiritoj, cetere, estas tiel vive interesa, ĝi tiagrade ekscitas la scivolon, ke sufiĉas turni sur ĝin la atenton, por ekdeziri ĝin profunde studi (*).

V. — Sekve, laŭ via kompreno, la kritiko valoras neniom, la publika opinio estas kalkulata kiel nenio?

A. K. — Mi ne rigardas la kritikon kiel la esprimon de la publika opinio, sed kiel individuan juĝon, kiu povas erari. Legu la historion kaj vidu, kiom da majstroverkoj ĉe sia apero ricevis akran kritikon, kio ne malhelpis, ke ili estu ĉiam ankoraŭ majstraĵoj; kiam io estas malbona, nenia laŭdo faras ĝin bona. **Se Spiritismo estas eraro, ĝi falos mem, sed, se ĝi estas veraĵo, nenia bojado ĝin malverigos.** Via libro estos ia persona juĝo el via punkto de vidadado; la vera publika opinio diros, ĉu vi ĝuste vidis. Por tio oni volos esplori, kaj se poste oni konstatos, ke vi eraris, via libro fariĝos ridinda, tiel same, kiel tiuj, antaŭ nelonge publikigitaj kontraŭ teorio de la cirkulado de la sango, la teorio de la vakcino k.a.

Sed mi forgesis, ke vi pritraktos la aferon **ex professo**, kio signifas, ke vi studis ĝin el ĉiuj ĝiaj flankoj; ke vi ja vidis ĉion, kion oni povas vidi, vi legis ĉion,

(*) De post ĉi tiu konversacio, skribita en 1859, la sperto abunde pruvis la ĝustecon de ĉi tiu aserto. — *Nota de la Aŭtoro.*

skribitan pri ĉi tiu objekto, vi analizis kaj komparis la diversajn opiniojn; ke vi havas la plej bonajn kondiĉojn, por observi mem; ke vi dediĉis al ĝi tagojn kaj noktojn dum sinsekvaj jaroj; per unu vorto, vi preterlasis nenion, por veni al la konstato de la vero. Mi devas kredi, ke tiel estas, se nur vi estas homo serioza, ĉar ja nur tiu rajtas paroli el plena scio de la afero, kiu ĉion ĉi faris.

Kion vi pensus pri iu, kiu arogus al si la cenzuron de iu literatura verko, ne konante literaturon, aŭ de iu pentraĵo, ne studinte pentrarton? Tio estas elemente logika, ke kritikanto devas koni, ne supraĵe, sed funde, tion, pri kio li parolas, alie lia opinio neniom valoras. Por malakcepti iun kalkulon, estas necese kontraŭmeti alian kalkulon, sed por tio oni devas povoscii kalkuli. Kritikanto devas ne limigi sin per la aserto, ke io estas bona aŭ malbona, sed motivi sian opinion per klara kaj kategoria pruvado, bazita sur la principoj mem de la arto aŭ de la scienco. Kiel li ja povas tion fari, ne konante tiujn principojn? Ĉu vi povus taksi la bonaĵojn aŭ malbonaĵojn de iu maŝino, ne konante mekanikon? Ne; nu, via juĝo pri Spiritismo, kiun vi ja ne konas, ne havus pli grandan valoron ol tiu, kiun vi eldirus pri maŝino, se vi ne konus mekanikon. Vi sur ĉiu paŝo estus trafata ĉe kulpo de nesciado, ĉar tiuj, kiuj estus ĝin studintaj, tuj vidus, ke tiu afero estas fremda por vi; el tio ili konkludus, ke vi ne estas homo serioza aŭ ke vi agas malbonfide: en ĉiu ajn el ambaŭ okazoj, vi elmetus vin al refutoj ne tre flataj por via memestimo.

V. — Ĝuste por eviti tiun rifon, mi venis peti vin permesi al mi ĉeesti iajn kelke da eksperimentoj.

A. K. — Kaj vi pensas, ke tio sufiĉos al vi, por paroli pri Spiritismo **ex professo**? Kiel do vi povus kompreni tiujn eksperimentojn, kaj des malpli ilin juĝi, se vi ne studis la principojn, kiuj prezentas ilian fundamenton? Kiel vi povus taksi la rezultaton, kontentigan aŭ ne, ekzemple de metalurgiaj provoj, se vi funde ne povoscius metalurgion? Permesu, ke mi diru al vi, si-

njoro, ke via projekto aspektas tiel same, kiel se, sciante nek matematikojn nek astronomion, vi dirus al iu membro de la Observatorio: "Sinjoro, mi volas skribi verkon pri astronomio kaj ankaŭ pruvi, ke via sistemo estas erara, sed, ĉar mi pri astronomio eĉ la plej elementan rudimentaĵon ne scias, lasu min unu aŭ du fojojn rigardi tra viaj teleskopoj: tio sufiĉos al mi, por scii tiel bone kiel vi.

Nur dank'al pliampleksigo de senco la vorto **kritiki** estas sinonimo de **mallaŭdi**; laŭ sia propra senco kaj laŭ la etimologio ĝi signifas **juĝi, taksi**. Kritiko povas do esti aproba aŭ malaproba. Fari la kritikon de iu libro ne estas ĝin nepre kondamni: kiu prenas sur sin tiun taskon, tiu devus fari ĝin sen antaŭjuĝo; se antaŭ ol malfirmi la libron, li ĝin jam kondamnis en sia animo, lia ekzameno ne povas do esti senpartia.

Tiel estas kun la plej multaj el tiuj, kiuj parolas pri Spiritismo. Ili kreis al si opinion nur pri la nomo, agante simile al juĝisto, kiu eldirus sian verdikton pri iu proceso, ne ekzameninte la aktojn. El tio rezultis, ke ilia juĝo trafis la aeron kaj anstataŭ konvinki, elvokis ridon. El tiuj, kiuj studis la aferon serioze, la plimulto ŝanĝis sian opinion, kaj pli ol unu kontraŭulo fariĝis ĝiaj adeptoj, kiam ili vidis, ke tio estas io tute alia, ol kiel ili pensis.

V. — Vi parolas pri la ekzameno de libroj ĝenerale; ĉu vi pensas, ke ĝi estas fizike ebla al iu gazetisto legi kaj studi ĉiujn, kiuj venas en liajn manojn, precipe tiujn kun novaj teorioj, kiujn li devas funde esplori rilate ilian esencon kaj verecon? Tio estus tio sama, kiel postuli de iu presisto, ke li legu ĉiujn verkojn, elirantajn el liaj presmaŝinoj.

A. K. — Pri tia saĝa rezonado mi povas respondi nur tion, ke, kiam oni ne disponas tempon, por konscience fari ion, oni tien ne enŝoviĝu, kaj ke estas preferinde fari unu solan aferon bone, ol dek fuŝe.

V. — Ne pensu, sinjoro, ke mia opinio estas kreita ventanime. Mi vidis tablojn turniĝi kaj frapi; mi vidis

homojn, kiuj skribis laŭdire sub la influo de Spiritoj; mi tamen estas konvinkita, ke en tio partoprenas ĉarlatanismo.

A. K. — Kiom vi pagis, por vidi tion?

V. — Neniom, certe.

A. K. — Jen do apartaspecaj ĉarlatanoj, kiuj re-honorigos la nomon de sia klaso. Ĉarlatanojn neprofit-amajn, ĝis hodiaŭ oni ne vidis. Ĉu el tio, ke iu sensprita ŝercemulo foje volis amuziĝi per tio, sekvas, ke la ĉe-estantaj homoj estas ja liaj kunludantoj?

Cetere por kio do ili fariĝus kunhelpantoj en ia mistifiko? Por amuzi la societion, vi diros. Mi konsentas, ke oni unu fojon volantas partopreni en iu ŝerco, sed, kiam iu ŝerco daŭras tutajn monatojn kaj jarojn, mi pensas, ke mistifikata estas ja la mistifikanto. Ĉu estas akceptebla, ke pro la sola plezuro kredigi je io, pri kio oni scias, ke ĝi estas malvera, oni ŝimus tutajn horojn ĉe iu tablo? La plezuro ne kompensus la penon.

Antaŭ ol konkludi, ke tio estas artifiko, oni devas demandi sin, kian intereson oni povas havi ĉe trompo; nu, vi ja konsentos, ke ekzistas sociaj situacioj, kiuj per se mem antaŭforigas ĉian suspekton pri ruzaĵoj, homoj, kies sola karaktero estas garantio de skrupula honesteco.

Io alia estus, se temus pri iu spekulacio, ĉar ja la allogo de la profito estas malbona konsilanto; tamen eĉ se oni konsentas, ke en ĉi tiu okazo estas konstatita iu fripona manovro, tio neniel pruvas la nerealecon de la principo, ĉar ĉion oni povas misuzi. El tio, ke iuj komercistoj vendas falsitajn vinojn, ne sekvas, ke vino pura ne ekzistas. Spiritismo ne respondas por la agoj de tiuj, kiuj misuzas ĝian nomon kaj ĝin ekspluatas, same kiel la medicino ne por tiuj de la ĉarlatanoj, kiuj trompe trudas siajn drogaĉojn, kaj la religio ne por tiuj de la pastroj, kiuj malbonuzas sian oficon.

Dank'al sia noveco kaj eĉ pro sia karaktero, Spiritismo devis ja esti misuzebla, sed ĝi havigis la rimedojn rekonigi tiujn misuzojn, klare difinante sian veran ka-

rakteron kaj forpuŝante de si ĉian solidarecon kun tiuj, kiuj ĝin ekspluatis aŭ ĝin deklinis de ĝia ekskluzive moralala celo, por fari el ĝi ian oficon, ian ilon por divenado aŭ por frivolaj esploroj.

Ĉar Spiritismo mem ja desegnas la limojn, en kiuj ĝi enteniĝas, precize difinas tion, kion ĝi diras kaj kion ĝi ne diras, tion, kion ĝi povas kaj kion ĝi ne povas, tion, kio ĝin koncernas aŭ ne koncernas, tion, kion ĝi akceptas kaj kion ĝi forpuŝas, tial malpravaj estas tiuj, kiuj ne penante ĝin studi, juĝas ĝin laŭ ŝajnaĵoj, tiuj, kiuj, vidante ĵonglistojn, sin pave alnomantajn "spiritistoj", por allogi la amason, gravatone asertas: "Jen, kio estas Spiritismo". Kiu definitive ridindiĝas? Ne la ĵonglisto, kiu praktikadas sian metion, kaj ne Spiritismo, kies skribita doktrino neigas tiajn asertojn, sed ja la kritikantoj, konvinkplene parolantaj pri io, kion ili ne scias, aŭ konscie kripligantaj la veron. Kiuj atribuas al Spiritismo tion kontraŭan al ĝia esenco mem, tiuj tiel agas aŭ pro nescio aŭ intence: en la unua okazo estas ventanimeco, en la dua estas malhonesteco. En ĉi tiu lasta okazo ili similas certajn historiistojn, kiuj falsas la historiajn faktojn pro la intereso de iu partio aŭ opinio. Uzante tiajn rimedojn, la partio ĉiam senkreditiĝas kaj maltrafas sian celon.

Notu al vi, sinjoro, ke mi ne pretendas, ke la kritiko devas nepre aprobi niajn ideojn, eĉ ilin studinte; ni tute ne riproĉas tiujn, kiuj ne pensas same kiel ni. Kio estas evidenta por ni, tio povas tia ne esti por ceteraj; ĉiu juĝas la aferojn el sia punkto de vidado, kaj el iu plej senduba fakto ne ĉiuj tiras samajn sekvojn. Se, ekzemple, iu pentristo en sia bildo prezentas ĉevalon blankan, iu povos ja prave trovi, ke tia ĉevalo faras malbonan efekt-on, ke nigra pli bone konvenus; malprava li estus, se li dirus, ke tiu ĉevalo estas blanka, se ĝi estas nigra: jen kiel agas la plej multaj el niaj kontraŭuloj.

Per unu vorto, sinjoro, ĉiu rajtas tute libere aprobi aŭ malaprobi la principojn de Spiritismo, el ili dedukti tiajn bonajn aŭ malbonajn sekvojn, kiaj al li plaĉas, sed la konscienco devigas ĉiun seriozan kritikanton ne diri

la malon de tio, kio ja estas; nu, por tio, unua kondiĉo estas paroli sole nur pri tio, kion li scias.

V. — Ni denove parolu, mi petas, pri la turniĝantaj kaj parolantaj tabloj: Ĉu ne povus okazi, ke ili estu alpreparitaj?

A. K. — Ĉi tio estas tiu sama demando pri bonfido, kiun mi jam respondis. Kiam la friponeco estos pruvita, tiam mi ĝin fordonos al via arbitro; se vi montros **efektive konstatitajn** atestojn pri artifikado, ĉarlatanismo, ekspluatado aŭ konfidotrompo, tiam mi ilin forlasos al via skurĝado, antaŭe deklarante, ke mi ilin ne defendos, ĉar la serioza Spiritismo ilin la unua repuŝas, kaj ke montri la trouzojn estas kunhelpi por ilin antaŭforigi kaj servi al ĝi.

Sed ĝeneraligi tiujn akuzojn, priĵeti grandan nombron da respektindaj homoj per la riproĉo, kiun meritas iaj kelke da individuoj, tio estas alispeca trouzo, nome kalumnio.

Se, kiel vi diras, la tabloj estas alpreparataj, estus do necesa ia tre sprita mekanismo, por ke ili nasku tiel diversajn movojn kaj bruojn. Kiel do oni ankoraŭ ne konas la nomon de la lerta fabrikanto de tiaj tabloj? Li certe estus famega, ĉar tiaj aparatoj troviĝas en la kvin partoj de la mondo. Oni devas ja konsenti ankaŭ, ke lia mekanismo estas tre subtila, ĉar ĝi povas alĝustiĝi al ĉia ajn tablo, lasante nenian videblan postesignon. Kiel klarigi, ke de post Tertuliano, kiu, ankaŭ li, parolis pri la turniĝantaj kaj parolantaj tabloj, ĝis hodiaŭ neniu povis vidi nek priskribi tian mekanismon?

V. — Jen kio vin erarigas. Fama kirurgo trovis, ke certaj homoj povas, per kuntiriĝo de iu muskolo de la kruro, aŭdigi brueton similan al tiu, kiun vi atribuas al la tablo; el tio li konkludis, ke viaj mediumoj sin amuzas pri via kredemeco.

A. K. — Se do tio estas krako de muskolo, tiam ĝi ne estas brueto el alpreparita tablo; kaj ĉar ĉiu klarigas tiun supozatan friponaĵon laŭ sia aparta maniero,

tio plej evidente pruvas, ke nek unuj nek aliaj konas la veran kaŭzon.

Mi respektas la sciojn de tiu klera kirurgo, nur levigâs iaj malfacilaĵoj ĉe la aplikado de tiu fakto, kiun li citas, al la parolantaj tabloj. La unua estas tio, ke estas strange, ke tiu kapablo, ĝis hodiaŭ escepta kaj rigardata kiel patologia okazo, subite fariĝis tiel ordinara; la dua, ke oni ja devas havi fortegan deziron mistifiki, por krakigi sian muskolon en la daŭro de tutaj du aŭ tri horoj, dum tio alportas nur laciĝon kaj doloron; la tria, ke mi ne tute klare vidas, kiel al tiu muskolo respondas la pordoj kaj la muroj, kie aŭdiĝas la frapoj; la kvara, fine, ke tiu krakanta muskolo devas havi ja mirindan kapablon, por movigi tre pezan tablon, ĝin levi, malfermi, fermi, teni ŝvebanta sen apogo kaj fine ĝin rompi ĉe la falo. Neniu ja suspektus, ke tiu muskolo havas tian grandan povon. (**Revue Spirite**, Junio 1859, pĝ. 141: **Le muscle craqueur**.)

Ĉu tiu fama kirurgo, pri kiu vi parolas, studis tiun fenomenon, la tiptologion, ĉe la homoj, kiuj ĝin okazigas? Ne; li konstatis ĉe iuj individuoj, kiuj neniam antaŭe sin okupis pri frapantaj tabloj, ian anormalan fiziologian efikon, iel analogan al tiu, fariĝanta ĉe la tabloj, kaj sen plua ekzameno konkludis, laŭ la tuta aŭtoritateco de sia klereco, ke ĉiuj, kiuj kunhelpas por la parolado de la tabloj, devas esti kapablaj krakigi sian peronean muskolon kaj estas simplaj trompantoj, ĉu ili estas princoj aŭ metiistoj, ĉu ili postulas monon aŭ ne. Ĉu li almenaŭ studis la tiptologion en ĉiuj ĝiaj aspektoj? Ĉu li vidis, ĉu per tiu krakado de muskolo oni povas okazigi ĉiujn tiptologiajn efikojn? Ne, ĉar alie li konvinkigus pri la nesufiĉeco de sia supozo, kió ne detenis lin proklami sian eltrovon en la Instituto de Francujo mem. Jen grava juĝo, serioze kompromitanta scienculon! Kio el ĝi restas hodiaŭ? Mi konfesas, ke, se mi devus submeti min al kirurgia operacio, mi tre hezitus konfidi min al tiu kuracisto, ĉar mi timus, ke li juĝus mian malsanon malpli sagace.

Ĉar tiu juĝo estas unu el la aŭtoritataj argumentoj,

sur kiuj vi laŭŝajne devas apogi vin, por ataki Spiritismon, tio min tute trankviligas pri la forto de la ceteraj argumentoj, kies valoron vi uzos, se vi ilin ne ĉerpos el pli fidindaj fontoj.

V. — Vi tamen vidas, ke la modo pri la turniĝantaj tabloj jam pasis; dum certa tempo ili furoris, sed hodiaŭ neniu plu sin okupas pri ili. Kial tio okazas, se la afero estas io serioza?

A. K. — Tial, ĉar el la turniĝantaj tabloj venis afero ankoraŭ pli serioza; venis tuta scienco, tuta filozofia doktrino, ja alie interesantaj la meditemajn homojn. Kiam ĉi tiuj konstatis ke ili jam nenion pli lernos, vidante turniĝi tablojn, tiam ili ne plu interesiĝis pri tio. Por la frivoluloj, kiuj nenion funde esploris, tiu estis tempopasigilo, amuzaĵo, kiun ili forlasis, kiam ili tediĝis de ĝi; tiaj homoj estas nuloj en la scienca sfero. La fazo de scivolo vivis sian tempon: sekvis ĝin tiu de observado. Spiritismo tiam eniris en la rondon de la seriozaj homoj, kiuj pri ĝi ne amuziĝas, sed per ĝi sin instruas. Tial la homoj, kiuj rigardas ĝin kiel aferon gravan, ne volonte submetiĝas al eksperimento pro scivolo, des malpli por kontentigi iun, kiu portus malamikajn pensojn; ne amuzante sin mem, ili tial ne penas amuzi la aliajn: mi apartenas al ĉi tiu nombro.

V. — Tamen nur eksperimentoj povas konvinki, eĉ tiam, se en la komenco oni celas kontentigi la scivolon. Se vi eksperimentas nur inter jam konvinkitaj homoj, permesu, ke mi diru, vi do predikas al konvertitoj.

A. K. — Malsamaj aferoj estas konvinkiteco kaj preteco konvinkiĝi; mi parolas al la homoj kun tia preteco, ne al tiuj, kiuj pensas, ke ili humiligas sian prudenton, venante aŭskulti tion, kion ili nomas fantazi-aĵoj. Pri tiuj mi tute ne zorgas. Tiuj, kiuj manifestas sian sinceran deziron instruiĝi, ĝin la plej bone pruvas montrante persistemon; oni ilin ekkonas laŭ aliaj signoj, ol la deziro ĉeesti unu aŭ du eksperimentojn: tiuj volas labori serioze.

Konvinkitecon oni akiras al si nur kun la tempo, per serio da observoj, farataj kun tute aparta zorgo. La spiritismaj fenomenoj esence diferencas de tiuj en la ekzataj sciencoj: ili ne okazas laŭ la plaĉo de la homo, oni devas ilin kapti ĉe la momento mem; nur multe kaj longe observante oni rimarkas grandegan nombron da pruvoj, kiuj pretervidiĝas ĉe la unua rigardo, precipe tiam, kiam oni ne plene scias la kondiĉojn, en kiuj ili povas troviĝi, kaj des pli tiam, kiam oni tenas jam prete malfavoran juĝon pri tiuj fenomenoj. Por diligenta kaj konsiderema observanto la pruvoj abundas: por li unu vorto, unu fakto ŝajne sensignifa povas esti ia lumstrio, ia konfirmo; por supraĵema kaj unuminuta observanto, por la simpla scivolulo, ili estas nulaj; jen kial mi ne volantas fari eksperimentojn sen ia probabla rezultato.

V. — Nu, ĉion konsiderante, ĉio devas ja havi ian komencon. Kiel la novico, kiu estas nulo, kiu nenion vidis, sed kiu volas instruiĝi, povas tion fari, se vi ne havigas al li la rimedojn por ĝi?

A. K. — Mi strekas netan linion inter la nekredemulo pro nescio, kaj la nekredemulo pro partieco; kiam mi vidas ĉe iu favoran humoron, neniom kostas al mi instrui lin, sed de iuj homoj la deziro instruiĝi estas simpla ŝajnaĵo: kun tiuj oni perdas sian tempon, ĉar, se ili ne tuj trovas tion, kion ili ŝajnas serĉi kaj kio eble malplaĉus al ili, se ĝi al ili montriĝus, la malmulto, kiun ili vidas estas nesufiĉa, por disbati iliajn antaŭjuĝojn; tion ili misjuĝas kaj faras mokataĵo, kaj tial estas senutile montri al ili tiajn aferojn.

Al iu deziranta instruiĝi, mi diras: "Oni ne povas fari kurson de eksperimenta Spiritismo tiel same, kiel kurson de Fiziko aŭ Ĥemio, ĉar oni ne kapablas laŭplaĉe okazigi spiritismajn fenomenojn kaj la inteligentoj, agantoj de tiuj fenomenoj, ofte fiaskigas ĉiujn niajn antaŭvidojn. Prezertante nenian intersekvon, nenian necesan interligon, tiuj, kiujn vi okaze povus vidi, estus por vi nemulte kompreneblaj. Unue instruiĝu per la teorio; legu kaj primeditu la verkojn pri tiu scienco: tie

vi lernos ĝiajn principojn, vi trovos la priskribon de ĉiuj fenomenoj, vi komprenos ilian eblecon per la klarigo, pri ili donata, kaj la raporto de multego da spontaneaj faktoj, kiujn vi pretervole ĉeestis kaj kiuj revenos en vian memoron; vi plene informiĝos pri ĉiaj malfacilaĵoj, kiuj povas stariĝi, kaj tiel vi formos al vi ian unuan moralan konvinkon. Kiam do prezentiĝos la okazo vidi aŭ eksperimenti persone, vi komprenos la aferojn, kia ajn la ordo, en kiu sin prezentos la faktoj, ĉar nenio por vi estos stranga."

Jen, sinjoro, kion mi konsilas al ĉiu, kiu diras, ke li volas instruiĝi; laŭ lia respondo estas facile vidi, ĉu ĉe li ekzistas io alia ol scivolo.

DUA DIALOGO

LA SKEPTIKULO

V. — Mi komprenas, sinjoro, la utilecon de tiu prepara studado, pri kiu vi ĵus parolis. Laŭ mia persona temperamento mi diras, ke mi estas nek por, nek kontraŭ Spiritismo, sed ke ĉi tiu objekto per si mem plej altgrade ekscitas mian intereson. En la rondo de miaj kontaktoj troviĝas de ĝi partianoj, sed ankaŭ kontraŭuloj; pri ĝi mi aŭdas forte interkontraŭajn argumentojn; mi do deziras submeti al vi kelkajn el tiuj kontraŭdiroj, faritaj en mia ĉeesto kaj kiuj ŝajnas al mi iom valoraj, almenaŭ al mi, kiu konfesas al vi mian nesciadon en ĉi tiu rilato.

A. K. — Estas por mi plezuro, sinjoro, respondi la demandojn, kiujn oni bonvolas al mi fari, kiam faritaj sincere kaj sen kaŝita penso, kvankam mi ne pretendas, ke mi povas ilin ĉiujn solvi. Spiritismo estas scienco ĵus naskiĝinta kaj pri kiu oni ankoraŭ multe devas lerni; estus do tro vante de mia flanko pretendi formovi ĉiajn malfacilaĵojn: mi povas diri sole nur tion, kion mi scias.

Spiritismo rilatas kun ĉiuj branĉoj de la filozofio, de la metafiziko, de la psikologio kaj de la moralo; ĝi estas grandega kampo, kiun oni ne povas trairi en iaj kelke da horoj. Nu, vi ja komprenas, sinjoro, ke estus

por mi fizike ne eble ripeti per propra buŝo kaj al ĉiu persone ĉion, kion mi pri tio skribis por ĝenerala uzado.

Per antaŭa serioza legado oni cetere trovos la respondon je la plej multaj demandoj, nature venantaj en la menson: ĝi havas la duoblan meriton eviti senutilajn ripetojn kaj pruvi seriozan deziron instruiĝi. Se post ĝi ankoraŭ restas duboj aŭ malklaraj punktoj, ilia klarigo fariĝas pli facila, ĉar oni jam apogas sin sur io kaj ne perdas tempon por veni returne al la plej elementaj principoj. Se vi ĝin permesas, ni por momento limigos nin je kelkaj ĝeneralaj demandoj.

V. — Konsentite; bonvolu, mi petas, admoni min, se mi ne konvene kondutos.

Spiritismo kaj spiritualismo

Mi demandas vin unue, kian neceson oni havis krei la vortojn **spiritista**, **spiritisma**, **spiritisto**, **spiritismo**, por anstataŭigi **spiritualista**, **spiritualisma**, **spiritualisto**, **spiritualismo**, kiuj ekzistas en la vulgara lingvo kaj estas komprenataj de ĉiuj? Mi aŭdis iun kvalitigi tiujn vortojn **barbarismoj**.

A. K. — La vorto **spiritualisto** jam longe havas tute difinitan sencon, donitan de la Akademio: **SPIRITUALISTO**, **SPIRITUALISTINO**, **tiu homo, kies doktrino estas kontraŭa al la materialismo**. Ĉiuj religioj nepre sin bazas sur spiritualismo. Kiu kredas, ke en ni ekzistas io krom materio, tiu estas spiritualisto, el kio ne sekvas, ke li kredas la ekziston de la Spiritoj kaj ties manifestiĝojn. Kiel vi distingus lin de tiu, kiu kredas tion? Vi devus uzi ĉirkaŭfrazon, dirante: Li estas spiritualisto, kiu kredas, aŭ ne kredas la ekziston de la Spiritoj. Por novaj aferoj estas necesaj novaj vortoj, se oni volas eviti dubasencaĵojn. Se mi estus doninta al mia REVUE la kvalifikon **spiritualisma**, mi tute neniel estus difininta ĝian celon, ĉar, ne neigante ĝian titolon, mi povus tie ne diri eĉ unu vorton pri la Spiritoj kaj eĉ ilin kontraŭbatali. Antaŭ kelka tempo mi legis en gazeto, pri ia

filozofia verko, artikolon, en kiu oni diris, ke la aŭtoro ĝin skribis el la vidpunkto **spiritualisma**; nu, la partianoj de la Spiritoj sentus sin profunde trompitaĵ, se, fidante tiun aserton, ili kredus, ke ili tie trovos eĉ la plej malgrandan akordon kun iliaj ideoj. Se do mi alprenis la vortojn **spiritista, spiritisma, spiritisto, spiritismo**, tiel mi agis tial, ke ili sen ia dubo esprimas la ideojn rilatajn al la Spiritoj. Ĉiu **spiritisto** estas nepre **spiritualisto**, sed ne ĉiuj **spiritualistoj** estas **spiritistoj**. Eĉ se la Spiritoj estus ia ĥimero, estus ja utile havi specialajn terminojn por tio, kio ilin koncernas, ĉar estas necesaj vortoj por la ideoj malveraj, kiel ankaŭ por la ideoj veraj.

Tiuj vortoj cetere ne estas pli barbaraj ol tiuj, kiujn la sciencoj, la artoj kaj la industrio ĉiutage kreas; ili tiaj certe ne estas pli ol tiuj, kiujn Gall (*) imagis por sia nomenklaturado de la fakultoj, kiel **sekretiveco, amativ-eco, bataliveco, nutriveco, afekciiveco** k. a.

Iuj homoj pro kontraŭemo kritikis ĉion, kio ne venas de ili kaj pretendas afekti oponon; tiuj, kiuj elmovas tiajn mizerajn ĉikanajn, elmontras nur unu aferon, nome la malvastecon de siaj ideoj.

Alkroĉiĝi al tiaj bagatelaĉoj estas montri mankon de bonaj motivoj.

Spiritualismo, spiritualisto respondas al la anglaj vortoj, uzataj en Usono ekde la komenco de la manifestiĝoj de Spiritoj, unue kaj dum kelka tempo ankaŭ en Francujo; sed de kiam aperis la terminoj **spiritismo, spiritisto**, oni tiel bone komprenis ties utilecon, ke la publiko ilin tuj akceptis. Hodiaŭ ilia uzado estas tiel konfirmita, ke la kontraŭuloj mem, tiuj, kiuj la unuaj ilin kvalitigis barbarismoj, ne aliajn uzas. La predikoj kaj la episkopaj mandatoj, kiuj anatemas **Spiritismon** kaj la **spiritistojn**, ne povus, sen konfuzo de ideoj, esti anatemintaj la **spiritualismon** kaj la **spiritualistojn**.

Ĉu barbarismoj aŭ ne, ĉi tiuj vortoj jam eniris en la komunuzan parolon en ĉiuj eŭropaj lingvoj; nur ilin sol-

(*) Francisko Jozefo Gall, germana kuracisto (1758-1828), elpensinto de la frenologio. — *La Trad.*

ajn uzadas ĉiuj publikigaĵoj, favoraj aŭ malfavoraj, en ĉiuj landoj. Ili okupas la supron de la nomenklature de la nova scienco; por esprimi la fenomenojn proprajn al ĉi tiu scienco, estis necesaj specialaj terminoj; Spiritismo de nun havas sian nomenklaturon tiel bona, kiel la Ĥemio.

La vortojn **spiritualismo** kaj **spiritualisto**, por la manifestiĝoj de la Spiritoj, hodiaŭ uzas nur la adeptoj de la tiel nomata usona skolo.

Malakordoj

V. — Tiu diverseco de opinioj pri tio, kion vi nomas scienco, estas, ŝajnas al mi, kondamno. Se tia scienco sin bazus sur efektivaj faktoj, ĉu do ĝi ja ne estus unu sama en Usono kaj en Eŭropo?

A. K. — Je tio mi respondas unue, ke tia diverseco kuŝas pli bone en la formo ol en la fundo; en la realco ĝi konsistas nur en la maniero rigardi iujn punktojn de la doktrino, sed ne prezentas ian radikalan antagonismon en la principoj, kiel afekte distrumpetas niaj kontraŭuloj, ne studinte la demandon.

Nu, diru al mi kia scienco en sia komenco ne naskis skismojn, ĝis ĝiaj principoj estis klare starigitaj? Ĉu tiaj malakordoj ankoraŭ hodiaŭ ne ekzistas en la plej bone organizitaj sciencoj?

Ĉu ĉiuj kleruloj ĉiam akordas inter si? Ĉu ĉiu el ili ne havas sian personan sistemon? Ĉu la kunsidoj en la Instituto de Francujo ĉiam prezentas bildon de perfekta konkordo? Ĉu en la medicino ja ne ekzistas la skolo de Parizo kaj la skolo de Montpellier? Ĉu ĉiu eltrovo en iu scienco ne estas motivo de malkonsento inter tiuj, kiuj volas iri antaŭen, kaj tiuj, kiuj volas plue staradi?

Kio koncernas Spiritismon, ĉu ne estas nature, ke, kiam aperis la unuaj fenomenoj, tiam, kiam oni ne konis la leĝojn, laŭ kiuj ili fariĝas, ĉiu elkovis sian sistemon kaj rigardis la faktojn laŭ sia persona maniero? Kio fariĝis ĉiuj primitivaj apartaj sistemoj? Ili falis ĉe

pli profunda observado de la faktoj. Kelke da jaroj sufiĉis, por ke stariĝu la grandioza unueco, kiu hodiaŭ regas en la Doktrino kaj kunligas la grandegan plimulton de ĝiaj adeptoj, escepte de iaj nemultaj individuoj, kiuj, en ĉi tiu, kiel en ĉiuj aferoj, alkroĉiĝas al la primitivaj ideoj kaj kune kun ili mortas. Kia scienco, kia filozofia aŭ religia doktrino prezentas similan ekzemplon? Ĉu en Spiritismo iam okazis eĉ la centono de la dispartigoj, kiuj dum pluraj jarcentoj distranĉis la Eklezion kaj kiuj ankoraŭ hodiaŭ ĉi tiun diserigas?

Estas ja kurioze vidi la infanaĵojn, al kiuj algluiĝas la kontraŭuloj de Spiritismo: ĉu tio ne signas la senhavedon de seriozaj pravigoj? Se ili tiajn havus, ili nepre tiujn uzus. Kion ili kontraŭmetas al ĝi? Pikmokojn, kontestojn, kalumniojn sed da nediskuteblaj argumentoj neniom, kaj la pruvo, ke oni ĝis nun trovis en ĝi nenian vundeblan lokon, estas tio, ke nenio haltigis ĝian supreniradon kaj ke post dek jaroj (*) ĝi enkalkulas plimulte da adeptoj, ol ia ajn sekto post unu centjaro. Ĉi tio estas fakto, konstatita de la sperto kaj konfesata eĉ de ĝiaj kontraŭuloj. Por ĝin ekstermi, ne sufiĉus diri: tio ne estas, tio estas absurdo; estus necese pruvi kategorie, ke tiuj fenomenoj ne ekzistas, ne povas ekzisti: jen kion neniu ankoraŭ faris.

Ŝajnegaj spiritismaj fenomenoj

V. — Ĉu ne estas pruvite, ke ekster Spiritismo oni povas okazigi tiajn samajn fenomenojn? El tio oni povas konvinki, ke ili ne havas tian originon, kiun la spiritistoj atribuas al ili.

A. K. — Ĉu el tio, ke oni povas imiti ion, sekvas, ke ĝi ne ekzistas? Kion vi diros pri la logikeco de iu, kiu pretendus, ke ĉia ŝaŭmvino estas Selters-akvo, ĉar oni faras ŝaŭmvino el Selters-akvo? Tio estas la aparta eco de ĉiuj aferoj, kiuj havas grandan famon, naski falsaj-

(*) Spiritismo jam festis sian centjarecon, en 1957. — *La Trad.*

ojn. Kelkaj prestidigitatoroj pensis, ke la nomo **spiritismo**, dank'al sia populareco kaj la polemikoj, kies objekto ĝi estis, bone taŭgas por esti ekspluatata, kaj, por allogi la vulgararon, pli aŭ malpli fuŝe ŝajnis kelke da mediumecaj fenomenoj, tute same, kiel ili iam ŝajnis la somnambulan klarvidecon, kaj ĉiuj mokantoj ilin aplaudis, ekkriante: "Jen kio estas Spiritismo!" Kiam oni sprite aperigis spektrojn sur la scenejo, ĉu ili ĉie ne proklamis, ke tio estas la finofara bato kontraŭ ĝi? Antaŭ ol eldiri tiel formalan verdikton, ili devus esti pripensintaj, ke la asertoj de trompisto ne estas paroloj de iu evangelio, kaj certiĝintaj, ĉu ekzistas reala identeco de la imitaĵo kun tio imitata. Neniu aĉetas brilanton, antaŭ ol certiĝi, ĉu tio ne estas ia straso. Studo, eĉ neprofunda, konvinkus ilin, ke la spiritismaj fenomenoj fariĝas em tute aliaj kondiĉoj, ili sciis ankaŭ, ke la spiritistoj ne zorgas pri aperigo de spektroj, nek pri antaŭdirado de homaj destinoj.

Nur malbonvolemo kaj malsincereco povis similigi Spiritismon al la magio kaj sorĉarto, ĉar ĝi ja forpuŝas de si ties celon, farojn, formulojn kaj mistikajn parolojn. Kelkaj eĉ kuraĝis kompari la spiritistajn seancojn kun la sabatorgiaj kunvenoj, kie oni atendas la fatalan noktomezan horon, por aperigi fantomojn.

Unu spiritisto, mia amiko, foje troviĝis, dum ludado de la dramo **Macbeth**, apud gazetisto, kiun li ne konis. Kiam montriĝis la sceno pri la sorĉistinoj, li aŭdis tiun diri al sia najbaro:

"— Jen! Ni nun ĉeestos spiritisman seanon; ĝuste ĉi tion mi bezonis por mia plej proksima artikolo; mi nun vidos, kiel okazas la aferoj. Se ĉi tie estus unu el tiuj frenezuloj, mi demandus lin, ĉu li rekonas sin en tiu sceno."

"— Mi estas unu el tiaj frenezuloj — diris al li la spiritisto —, kaj mi povas certigi vin, ke mi tie tute ne rekonas min, ĉar, kvankam mi ĉeestis centojn da spiritistaj seancoj, mi tamen tie neniam vidis ion similan. Se ĉi tien vi venis, por ĉerpi informojn por via artikolo, ĉi tiu ne distingiĝos per sia vereco."

Multaj kritikantoj ne havas pli seriozan bazon. Kiu alia ridindiĝos, ol tiuj, kiuj tiel ventkape elpaŝas? Rilate Spiritismon, ĝia fidindeco, anstataŭ suferi de tiaj kritikoj, kreskis, dank'al rezonado, kiun al ĝi havigis ĉiuj tiuj manovroj, atentigante al ĝi multajn homojn, kiuj pri ĝi neniam antaŭe aŭdis; tiuj kritikoj instigis ĝian ekzamenon kaj pligrandigis la nombron de ĝiaj adeptoj, ĉar oni ja konstatis, ke ĝi estas ne ia frivolajo, sed serioza afero.

Senpoveco de la misfamigantoj

V. — Mi konsentas, ke el la misfamigantoj de Spiritismo kelkaj estas homoj senkonsideraj, kiel tiu, pri kiu vi ĵus parolis, sed krom tiuj, ĉu aliaj ne havas realan meriton kaj ties opinio ne havas iom da pezo?

A. K. — Mi tion tute ne kontestas. Tion mi respondas dirante, ke ankaŭ Spiritismo enkalkulas multe da homoj kun ne malpli reala merito; eĉ plue: la grandega plimulto el la spiritistoj konsistas el intelektuloj kaj studentuloj; nur la malsincereco povas diri, ke oni varbas al ĝi simplanimajn virinojn kaj malklerulojn.

Nediskutebla fakto cetere respondas ĉi tiun kontraŭdiron, nome, ke, malgraŭ sia klereco aŭ oficiala situacio, neniu el tiuj sukcesis haltigi la iradon de Spiritismo, kaj tamen neniu, komencante de la plej senvalora felietonisto, ne flatis al si, ke li donis la finofaran baton al nia afero; ankaŭ, ke ĉiuj senescepte kunhelpis pretervole por ĝin diskonigi. Ĉu iu ideo, kiu rezistas al tiom da atakoj, kiu senŝanceliĝe iradas tra la hajlo da sagoj, kiujn oni ĵetas kontraŭ ĝin, ja ne pruvas sian forton kaj la profundecon de siaj radikoj? Ĉu tiu fenomeno ne indas la atenton de la seriozaj pensitoj? Tial pluraj el ili hodiaŭ diras en sia animo, ke tie devas ekzisti io, eble unu el tiuj nerezisteblaj movadoj, kiuj de tempo al tempo skuas la socion, por ĝin transformi.

Tiel ĉiam estas kun ĉiuj novaj ideoj, destinitaj por revoluciigi la mondon, ili renkontas barojn, ĉar ili devas

batali kontraŭ la interesoj, la antaŭjuĝoj, la trouzoj, kiujn ili disbatas, sed, ĉar ili troviĝas en la planoj de Dio, por ke estu plenumata la leĝo de progreso de la homaro, tial, kiam sonas la horo, nenio povus ilin reteni: ĉi tio estas la pruvo, ke ili esprimas la veron.

Tiu senpoveco de la kontraŭuloj de Spiritismo antaŭ ĉio pravas, kiel dirite, mankon de bonaj motivoj, ĉar tiuj, kiujn ili al ĝi kontraŭmetas, ne konvinkas; sed tiu senpoveco estas ligita kun alia kaŭzo, kiu vanigas ĉiujn iliajn aranĝojn. Ili miras la disvastiĝon de tiu doktrino, malgraŭ ĉio, kion ili faras, por ĝin haltigi; neniu el ili trovas la kaŭzon de tio, ĉar ili ĝin serĉas tie, kie ĝi ja ne estas. Unuj vidas ĝin en la granda povo de la diablo, kiu tiele montriĝus pli forta ol ili kaj eĉ pli ol Dio, kaj aliaj en la pligrandiĝo de la homa frenezeco. La eraro de ĉiuj estas kredi, ke la fonto de Spiritismo estas unu sola kaj sin apogas sur la opinio de unu sola homo; el tio la ideo, ke, nuligante la opinion de tiu homo, ili nuligus Spiritismon. Ili serĉas tiun fonton sur la Tero, dum ĝi troviĝas en la spaco: ne en unu punkto, sed ĉie, ĉar la Spiritoj manifestiĝas ĉie, en ĉiuj landoj, kiel en palacoj, tiel en kabanjoj. La vera kaŭzo kuŝas do en la naturo mem de Spiritismo, kiu ne ricevas sian movadon de unu sola homo, sed permesas al ĉiu rekte ricevi komunikaĵojn de la Spiritoj kaj tiel certiĝi pri la realeco de la faktoj. Kiel konvinki milionojn da homoj, ke ĉio tio estas nur ĵonglaĵoj, ĉarlatanaĵoj, prestidigitajoj, artifikoj, se ili mem ricevas tiujn rezultatojn sen ies kunhelpo? Ĉu oni kredigus al ili, ke ili mem estas siaj kunludantoj kaj ĉarlatanas kaj artifikas nur kontraŭ si solaj?

Tiu ĉiea okazanteco de la manifestiĝoj de la Spiritoj, kiuj sur ĉiuj lokoj de la terglobo kontraŭasertas la misfamigantojn kaj konfirmas la principojn de la Doktrino, estas forto, kiun ne povas kompreni tiuj, kiuj ne konas la nevideblan mondon, tiel same, kiel tiuj, kiuj ne konas la leĝojn de la elektraj fenomenoj, ne povas kompreni la rapidecon de la transsendo de iu tia depeŝo; kontraŭ tiun forton rompiĝas ĉiaj kontestoj, ĉar tio estas tute sama, kiel se oni dirus al homoj, kiuj ricevas la radiojn de la suno, ke la suno ne ekzistas.

Flanke lasante la kvalitojn de la Doktrino, kiu plaĉas pli multe, ol tiuj, kiujn oni kontraŭmetas al ĝi, tio estas la kaŭzo de la fiaskoj de tiuj, kiuj penas ĝin haltigi; por sukcesi, ili devus trovi ian rimedon, por malhelpi la Spiritojn manifestiĝi. Jen kial la spiritistoj tiel malmulte zorgas pri ties manovroj; por ili, spiritistoj, parolas la sperto kaj la aŭtoritateco de la faktoj.

Tio mirakleca kaj tio supernatura

V. — Spiritismo evidente inklinas revivigi la kredojn, bazitajn sur tio mirakleca kaj tio supernatura; nu, en nia pozitiva jarcento tio ŝajnas al mi malfacila, ĉar ĝi fidindigus la superstiĉojn kaj la popolajn erarojn, kiujn la racio elmontras en ilia nudeco.

A. K. — Iu ideo estas superstiĉa nur tial, ke ĝi estas malvera; ĝi tia ne plu estas de la momento, kiam ĝi estas rekonata kiel vera. La demando estas do scii, ĉu fariĝas, aŭ ne, manifestiĝoj de Spiritoj; nu, vi ne povas alnomi ion superstiĉo tiel longe, ĝis vi **pruvos**, ke ĝi ne ekzistas. Vi eble diros: mia prudento rifuzas ĝin akcepti, sed ĉiuj, kiuj ĝin kredas — kaj ili ne estas iaj stultuloj —, sin turnas ankaŭ al sia prudento kaj krom tio al faktoj; kiu el ambaŭ prudentoj triumfos la venkon? La granda juĝanto, en ĉi tiu rilato, estas la estonteco, kiel okazis al ĉiuj sciencaj kaj industriaj demandoj, en sia komenco rigardataj kiel absurdaj kaj ne eblaj. Vi antaŭjuĝas laŭ via opinio; mi, mi juĝas, nur longe vidinte kaj observinte. Mi aldiras, ke la klare vidanta Spiritismo, kiel ĝi hodiaŭ estas, celas, kontraŭe, forbati la superstiĉajn ideojn, ĉar ĝi montras, kio vera aŭ malvera ekzistas en la popolaj kredoj, kaj ĉion, kion absurdan al ĝi almiksas la malklereco kaj la antaŭjuĝoj.

Mi iras pli malproksimen kaj diras, ke ĝuste la pozitiveco de nia jarcento instigas la akcepton de Spiritismo kaj al ĝi oni parte devas danki ties rapidan disvastiĝon, kaj ne, kiel kelkaj pretendas, al ia pliflamiĝo de la inklino al tio mirakleca kaj supernatura. Supernaturaĵoj malaperas ĉe la torĉo de la scienco, de la filozofio

kaj de la racio, tiel same, kiel la dioj de la paganismo disfumiĝis ĉe la lumo de la Kristianismo.

Supernaturaĵo estas io ekster la leĝoj de la Naturo. La pozitivismo akceptas nenion ekster tiuj leĝoj, sed — ĉu ĝi ilin ĉiujn konas? En ĉiuj tempoj tiuj fenomenoj, kies kaŭzo estis nekonata, estis rigardataj kiel supernaturaj; ĉiu nova leĝo, eltrovita de la scienco, forŝovis la limojn de tio supernatura; nu, Spiritismo elmontras iun novan leĝon, laŭ kiu la konversacio kun la Spirito de mortinto sin bazas sur leĝo tute same natura kiel tiu, laŭ kiu la elektro ebligas la interkomunikiĝon de du homoj en la distanco de du mil kilometroj unu de la dua; kaj same pri ĉiuj ceteraj spiritismaj fenomenoj. Spiritismo, kio ĝin koncernas, forpuŝas de si ĉian fakt-on miraklecan, t. e. ekster la leĝoj de la Naturo; ĝi faras nek miraklojn, nek potenciaĵojn, sed klarigas, laŭ iu leĝo, certajn faktojn, ĝis hodiaŭ rigardatajn kiel miraklojn kaj potenciaĵojn, kaj ĝuste tiel ĝi pruvas ilian eblecon. Ĝi tiele plivastigas la kampon de la scienco, kaj pro tio ĝi mem estas scienco; sed, ĉar la eltrovo de tiu nova leĝo kuntrenas moralajn sekvojn, tial la kodo de tiuj sekvoj faras ĝin samtempe filozofia doktrino.

El ĉi tiu lasta punkto de vidadado ĝi respondas sur pozitivaj kaj raciaj bazoj al la aspiroj de la homo koncerne lian estontecon, tial ĝi konvenas al la pozitiva spirito de nia jarcento; tion vi komprenos, kiam vi prenos sur vin la penon ĝin studi. (**La Libro de la Mediumoj**, Ĉap. II; **Revue Spirite**, Decembro 1861, pĝ. 393, kaj Januaro 1862, pĝ. 21; ankaŭ Ĉap. II de ĉi tiu verko.)

Opono de la scienco

V. — Vi apogas vin, vi diras, sur faktoj, sed oni kontraŭmetas al vi la opinion de la scienculoj, kiuj ilin kontestas aŭ klarigas alie ol vi. Kial ili ne atentis la fenomenon de la turniĝantaj tabloj? Se ili en tio estus vidintaj ion seriozan, ili tute ne ekpensus, ŝajnas al mi, preterlasi tiel eksterordinarajn faktojn, des malpli ilin malŝate repuŝi de si, kaj tamen ili ĉiuj estas kontraŭ vi. Ĉu la scienculoj ne estas la lumilo de la nacioj, kaj ĉu

ilia devo ne estas disverŝi la lumon? Kial ili kovrus la lumon ĝuste tiam, kiam ekmontriĝis al ili tiel bela okazo prezenti al la mondo novan forton?

A. K. — Jen vi ĵus mirinde pentris la devon de la scienculoj; estas bedaŭrinde, ke ili en pli ol unu cirkonstanco ĝin forgesis. Sed, antaŭ ol respondi tiun saĝan rimarkon, mi devas refuti gravan eraron, kiun vi faris dirante, ke ĉiuj scienculoj estas kontraŭ ni.

Kiel mi diris antaŭ momento, ĝuste ĉe la instruita klaso Spiritismo rikoltas al si plej multe da prozelitoj, kaj ĉi tio en ĉiuj landoj de la mondo; el tiuj granda nombro estas kuracistoj en ĉiuj nacioj, kaj la kuracistoj estas ja scienculoj; la ŝtatadministrantoj, la instruistoj, la artistoj, la literatoroj, la oficistoj, la altaj funkciuloj, la altranguloj, la ekleziuloj k. a., kiuj staras ĉirkaŭ ĝia standardo, ĉiuj estas homoj, ĉe kiuj oni ne povas ne konfesi iom da klereco. Kleruloj ne ekzistas nur en la oficiala scienco kaj en la leĝaj korporacioj.

Ĉu tio, ke Spiritismo ankoraŭ ne havas civitanecon en la oficiala scienco, estas motivo por ĝia kondamno? Se la scienco neniam estus erarinta, ĝia opinio ĉi tie povus pezi; bedaŭrinde la sperto montras la malon. Ĉu ĝi ne repuŝis kiel ĥimerojn multegon da elpensoj, kiuj poste glorigis la memoron de iliaj aŭtoroj? Ĉu ne dank'al raporto de nia plej alta korporacio el kleruloj Francujo perdis la iniciativon de la uzado de la vaporo? Kiam Fulton venis al la kampo de Bulonjo prezenti sian planon al Napoleono I, kiu rekomendis ĝian tujan ekzamenon al la Instituto de Francujo, ĉu ĉi tiu ne konkludis, ke tia plano estas **neefektivigbla** fantazio pri kiu oni ne devas zorgi? Ĉu el tio oni konkludu, ke la membroj de tiu Instituto estas malkleruloj? Ĉu tio pravigas la trivialajn epitetojn, per kiuj certaj homoj el malnobla impulso ilin plezure regalias? Certe ne; neniu saĝa homo malkonfesas la meritojn de ilia eminenta klereco, kvankam rekonante, ke ili ne estas neeraremaj kaj ke sekve ilia juĝo ne estas la lasta vorto, precipe rilate novajn ideojn.

V. — Mi tute konsentas, ke ili ne estas neeraremaj, tamen ne malpli vera estas tio, ke, dank'al ilia sciaro, ilia opinio iom valoras kaj ke se ili estus el viaj, tio alportus grandan gravecon al via sistemo.

A. K. — Vi ja konsentu ankaŭ, ke ĉiu estas bona juĝanto nur pri tio, kio apartenas al lia fako. Se vi ekdeziros konstruigi domon, ĉu vi dungos muzikiston? Se vi estas malsana, ĉu vi konfidus vian kuracadon al arkitekto? Se vi havas juĝan aferon, ĉu vi aŭdos danciston? Fine, se iu demando estas pri teologio, ĉu vi komisius ĝian solvon al ĥemiisto aŭ al astronomo? Ne, ĉiu en sia metio. La ordinaraj sciencoj sin bazas sur la proprecoj de la materio, kiun oni povas manipuli laŭplaĉe; la fenomenoj, kiun ĝi okazigas, havas kiel agantojn fortojn materiajn. Tiujn en Spiritismo okazigas inteligentoj, kiuj ĝuas sendependecon, havas sian liberan volon, ne estas submetitaj al niaj kapricoj; ili do ne estas submetebaj al niaj laboratoriaj procedoj kaj al niaj kalkuloj, kaj sekve ne apartenas al la kadro de la ĝustasenca scienco.

La scienco do vojeraris, volante eksperimenti pri la Spiritoj kiel pri ia voltaeca pilo; ĝi fiaskis, kiel ja devis esti, ĉar ĝi procedis el analogeco ne ekzistanta; poste, ne irinte pluen, ĝi konkludis per neado: tro kuraĝa juĝo, kiun la tempo ĉiutage korektas, kiel multajn aliajn; kaj tiuj, kiuj ĝin eldiris, hontos, ke ili ventkape ribelis kontraŭ la senlima povo de la Kreinto.

La klerulajn korporaciojn tute ne koncernas kaj neniam koncernos opinii pri ĉi tiu demando; ĉi tiu estas al ili tiel fremda, kiel tiu, proklami la ekziston aŭ neekziston de Dio; estas do eraro fari ilin juĝantoj de ĝi. Spiritismo estas demando de persona kredo, kiu ne povas dependi de la voĉo de iu institucio, ĉar tia voĉo, eĉ se favora al ĝi, ne kapablas trudi konvinkojn. Kiam la publiko estos al si farinta opinion pri ĝi, tiuj kleruloj ĝin akceptos kiel individuoj, kliniĝos antaŭ la forto de la faktoj. Lasu forpasi ĉi tiun generacion kaj, kune kun ĝi, la antaŭjuĝojn de la malmolnuka memestimo: vi vid- os, ke kun Spiritismo estos same, kiel kun tiom da aliaj

veraĵoj, kiujn oni kontraŭbatalis kaj kiujn dubi estus nun ridinde. Hodiaŭ frenezuloj oni alnomas la kredantojn, morgaŭ estos la vico de la nekredantoj: tute same, kiel oni alnomis frenezuloj tiujn, kiuj kredis la turniĝon de la Tero.

Sed ne ĉiuj kleruloj juĝis same, kaj kiel klerulojn mi komprenas homojn, sin donantajn al la studoj kaj al la sciencoj, kun aŭ sen ia oficiala titolo. Multaj el ili faris jenan rezonon:

"Ne estas efiko sen ia kaŭzo, kaj pli ordinaraj efikoj povas havigi la ŝlosilon de la plej grandaj problemoj. Se Neŭtono malatentus la falon de iu pomo, se Galvani repuŝus sian servistinon alnomante ŝin frenezulino, kiam ŝi parolis al li pri la ranoj, dancantaj en la plado, ni eble ankoraŭ estus trovontaj la mirindan leĝon de la universa gravito, kaj la fekundajn proprecojn de la pilo. Tiu fenomeno, kiun oni burleske nomis "dancoj de la tabloj", ne estas pli ridinda, ol la dancoj de la ranoj, kaj eble entenas ankaŭ kelkajn el tiuj sekretoj de la Naturo, kiuj agitas la homaron, kiam oni havas ilian ŝlosilon."

Ili en sia animo diris ankaŭ:

"Ĉar pri tio sin okupas tiom da homoj, ĉar homoj seriozaj ĝin studas, io sendube tie estas; ia iluzio, ia kaprico, se oni volas ĝin tiel nomi, ne povas esti tiel ĝenerala; ĝi povas enlogi iun rondon, iun grupeton, sed ĝi ne ĉirkaŭiras la mondon. Ni do nin gardu neigi la eblecon de io, kion ni ne komprenas, timante pli aŭ malpli frue ricevi malkonfirmon, kiu ne flatus nian saguecon."

V. — Tre bone; jen klerulo, kiu rezonas saĝe kaj prudente, kaj mi, kiu ne estas klerulo, mi pensas same kiel li, sed rimarku, ke li asertas nenion: li dubas; nu, sur kio oni bazu la kredon je la ekzisto de la Spiritoj kaj precipe je la ebleco de komunikigo kun ili?

A. K. — Tiu kredo sin bazas sur la rezonado kaj la faktoj. Mi mem ĝin akceptis nur post matura ekzameno. Ĉerpinte el la studado de la ekzaktaj sciencoj la kutimon al la pozitivaj aferoj, mi sondis, esploris tiun

novan sciencan en ĝiaj plej intimaj faldoj; mi penis klarigi al mi ĉion, ĉar mi akceptas iun ideon nur tiam, kiam mi scias ties kialon kaj kielon. Jen la rezono, kiun elvolvis al mi klera kuracisto antaŭe nekredanta kaj hodiaŭ fervora adeptoj:

"Oni diras, ke nevideblaj estuloj komunikiĝas kun la homoj: kial do ne? Ĉu antaŭ la elpenso de la mikroskopo oni suspektis la ekziston de tiuj miliardoj da bestetoj, kiuj kaŭzas tiom da ruinoj al la ekonomio? Kial ĝi estus materiale ne ebla, ke ekzistus en la spaco estuloj, kiujn niaj sentumoj ne perceptas? Ĉu ni havus la ridindan pretendon ĉion scii kaj diri al Dio, ke Li povas nenion pli konigi al ni? Se tiuj nevideblaj estuloj, nin ĉirkaŭantaj, estas inteligentaj, kial do ili ne komunikiĝas kun ni? Se ili rilatas kun la homoj, ili devas ludi ian rolon en ties destinoj kaj en la okazaĵoj. Kiu scias? Ili estas eble unu el la potencoj de la Naturo, unu el tiuj kaŝitaj fortoj pri kiuj ni ne konjektas. Kian novan horizonton tio malkovrus al la pensado! Kia vasta observokampo! La eltrovo de la mondo de la nevidebluloj estus tute io alia, ol tiu de la supermezure malgrandaj estaĵoj; tio estus pli ol iu eltrovo: tio estus ia revolucio en la ideoj. Kia lumo povas el ĝi ŝpruci! Kiom da misteraj aferoj klarigitaj! Ĝiaj kredantoj estas ridindigitaj, sed kion tio pruvas? Ĉu tio sama ne okazis al ĉiuj grandaj eltrovoj kaj elpensoj? Ĉu Kristoforo Kolumbo ne estis repuŝita, superĵetata per maŝato, traktata kvaŝaŭ frenezulo?

"Tiuj ideoj, oni diras, estas tiel strangaj, ke oni ilin ne povas kredi, sed al iu, kiu antaŭ nur duona jarcento estus dirinta, ke en kelke da minutoj oni korespondos de unu rando de la mondo al la kontraŭa; ke en kelke da horoj oni trairos Francujon; ke per la vaporo de iom da bolanta akvo ŝipo veturos kontraŭ la venton; ke oni ĉerpos el la akvo rimedojn por lumigi al si kaj sin varmigi; ke oni proponis lumigi la tutan Parizon en unu momento per la sola tenujo de ia nevidebla substanco — al tiu oni ridus ĝuste en la vizaĝon. Ĉu tio estas io pli mireginda ol tio, ke la spaco estus plena de prudentaj

estuloj, kiuj, vivinte sur la Tero, ĉi tie demetis sian materian envolvajon? Ĉu en ĉi tiu fakto ne troviĝas la klarigo de multego da kredoj, kiuj datiĝas de la plej antikva tempo? Tiaj aferoj ja meritas profundan studadon."

Jen la konsideroj de klerulo, sed de klerulo sen antaŭjuĝoj; tiaj estas ankaŭ tiuj de multego da klarmensaj homoj: ili vidis, sed ne supraĵe kaj ne antaŭjuĝinte; ili studis serioze kaj sen antaŭdecido; ili estis tiel modestaj kaj ne diris: "Mi ĝin ne komprenas, sekve ĝi ne ekzistas"; ilia konvinko estiĝis el observado kaj rezonado. Se tiuj ideoj estus ĥimeroj, ĉu vi pensas, ke ĉiuj tiuj elitaj homoj estus ilin alprenintaj? Ke ili tiel longe estus mokataĵoj de ia iluzio? Ne estas do materie nebla la ekzisto de estuloj nevideblaj por ni kaj pleningantaj la spacon, kaj ĉi tiu konsidero sola devus postuli pli da singardemo. Kiu antaŭ nelonge iam pensis, ke unu guto da klara akvo povas enhavi milojn da estaĵoj de tia malgrandeco, ke ĝi konfuzas nian imagpovon? Nu, mi diras, ke estas por la prudento pli malfacile koncepti estaĵojn tiel subtilajn, kiuj havas ĉiujn organojn kaj vivas kiel ni, ol akcepti tiujn estulojn, kiujn ni nomas Spiritoj.

V. — Sendube, sed el tio, ke io estas ebla, ne sekvas ke ĝi ekzistas.

A. K. — Konsentite, sed vi ja konsentu, ke, se ĝi ne estas neebla, tio estas do io grava, ĉar ĝi jam havas nenion, kion la prudento malakceptos. Restas do ĝin konstati per la observado de la faktoj. Tiu observado ne estas io nova: la historio, kiel la religia, tiel ankaŭ la laika, pruvas la malnovecon kaj la ĉiecon de tiu kredo, kiu daŭris tra ĉiuj ŝanĝiĝoj de la mondo kaj retroviĝas ĉe la plej sovaĝaj popoloj en la stato de denaskaj kaj intuiciaj ideoj, gravuritaj en la menso, kiel tiu pri la Plejaltulo kaj la estonta ekzistado. Spiritismo ne estas do ia moderna kreaĵo, tute kontraŭe: ĉio pruvas, ke la antikvuloj ĝin konis tiel bone aŭ eble pli bone ol ni; kio okazis, tio estis, ke ĝi estis instruata nur kun

misteraj antaŭzorgoj, kiuj faris ĝin neatingebla por la vulgarularo, kiu estis intence forlasita en la ŝlimejo de la superstiĉo.

Koncerne la faktojn, ili estas duspecaj: unuj estas spontaneaj, aliaj estas okazigataj. Inter la unuajn oni envicigu la viziojn kaj la aperaĵojn, tre oftajn; ankaŭ la bruojn, bruegojn kaj malordojn de objektoj sen ia materia kaŭzo, kaj multegon da strangaj fenomenoj, kiujn oni konsideradis supernaturaj kaj kiuj hodiaŭ aspektas al ni tute simplaj, ĉar laŭ ni nenio estas supernatura: ĉio estas submetita al la senŝanĝaj leĝoj de la Naturo. La faktoj okazigataj estas tiuj, kiujn oni ricevas pere de medioj.

Malveraj klarigoj de la fenomenoj

Halucino. — Magneta fluidaĵo. — Reradiado de la penso — Cerba superekscitiĝo. — Somnambula stato de la medioj.

V. — La kritiko celas precipe la okazigitajn fenomenojn. Ni flanke lasu ĉian supozon pri ĉarlataneco kaj konsentu absolutan bonfidon: ĉu oni ne povus pensi, ke la medioj mem estas ludilo de ia halucino?

A. K. — Mi ne estas informita, ĉu oni jam plene klarigis la mekanismon de la halucino. Eĉ tia, kiel oni komprenas la halucinon, ĝi tamen estas forte stranga kaj tre studinda okazaĵo. Kial do tiuj, kiuj pretendas interpreti la spiritismajn fenomenojn kiel halucinon, ne povas klarigi la halucinon? Kelkaj faktoj cetere nuligas tiun supozon: kiam iu tablo aŭ alia objekto moviĝas, leviĝas, frapas; kiam la tablo libere trakuras la ĉambron sen ies kontakto; kiam ĝi deteniĝas de la planko, kaj sen ia apogo sin tenas en la aero; fine, kiam, refalinte, ĝi rompiĝas — tio certe ne estas ia halucino. Ĉe la supozo, ke la medio, kiel efiko de sia imagemo, kredas, ke li vidas ion, kio ne ekzistas, ĉu estas probable, ke tutan ĉeestantaron kaptas la sama senseraro, ke tia sama eraro fariĝas ĉie, en ĉiuj landoj?

Se tiel estus, la halucino estus io pli mireginda, ol la fakto mem.

V. — Se oni konsentas la realecon de la fenomeno de la turniĝantaj kaj frapantaj tabloj, ĉu ne estas pli racie atribui ĝin al la agado de ia fluidaĵo, ekzemple la magneta fluidaĵo?

A. K. — Tio estis la unua penso, kaj mi mem ĝin havis, kiel tiom da aliaj. Se la faktoj estus simple faktoj materiaj, sen ia dubo oni ilin povus klarigi en tia maniero; sed, kiam tiuj movoj kaj tiuj frapoj pruvas inteligentecon; kiam oni konstatis, ke ili tute libere respondas la penson, tiam oni tiris jenan sekvon: **Se ĉia efiko havas ian kaŭzon, ĉia efiko inteligenta havas do ian kaŭzon inteligentan.** Ĉu tio estas la efiko de ia fluidaĵo, se nur oni ne diras, ke tia fluidaĵo estas inteligenta? Kiam vi vidas la stangeton de telegrafo faranta signalojn, kiuj transsendas la penson, vi ja scias, ke tiu stangeto el ligno aŭ fero ne estas inteligenta: vi diras, ke ĝin movas ia inteligento. Same estas kun la tablo. Ĉu ekzistas aŭ ne ekzistas inteligentaj faktoj? Jen la demando. Tiuj, kiuj tion kontestas, estas homoj, kiuj ne ĉion vidis kaj kiuj rapidas konkludi laŭ siaj propraj ideoj kaj el supra observado.

V. — Je tio oni respondas, ke, se fariĝas iu inteligenta efiko, tiu estas nenio alia ol la inteligento mem, ĉu de la mediumo, ĉu de la demandanto, ĉu de la ĉeestantoj, ĉar, oni diras, la respondo ĉiam troviĝas en ies menso.

A. K. — Ĉi tio estas ankoraŭ unu eraro, frukto de neperfekta observado. Se tiuj, kiuj tiel pensas, estus pentintaj studi la fenomenon laŭ ĉiuj ĝiaj aspektoj, ili estus sur ĉiu paŝo konstatintaj la absolutan sendependecon de la manifestiĝanta inteligento. Kiel ĉi tiu tezo povus akordi kun respondoj trans la komprenpovo kaj la instruiteco de la mediumo? respondoj, kontraŭantaj liajn ideojn, liajn dezirojn, liajn opiniojn, aŭ tute fiaskigantaj la antaŭvidojn de la ĉeestantoj? respondoj per medium-

oj, kiuj skribas en lingvo, de ili ne konata, aŭ en sia propra lingvo, dum ili povoscias nek legi, nek skribi? Tiu opinio, ĉe la unua ekrigardo, neniel estas neracia, mi konsentas, sed ĝin neigus tiom multaj kaj tiel konkludigaj faktoj, ke oni jam neniel povas dubi ilian originon.

Cetere, eĉ se oni akceptus ĉi tiun teorion, la fenomeno, anstataŭ plisimpligita, estus multe pli eksterordinara. Kio! ĉu la penso reradius de iu supraĵo, simile al la lumo, la sono, la varmo? Efektive, tie estus io, kio ekzercus la sagacecon de la scienculoj. Eĉ plue, kio aldoniĝus al la miregindaĵo, tio estas, ke el dudek kunsidantaj personoj reradius la penso de tia persono kaj ne la penso de tia alia. Tia sistemo estas netenebla. Estas efektive kurioze vidi la kontraŭdirantojn streĉantaj la cerbon serĉe de kaŭzoj centoble pli eksterordinaraj kaj pli malfacile kompreneblaj ol tiuj, kiujn oni al ili prezentas.

V. — Ĉu oni ne povus akcepti, laŭ la opinio de kelkaj, ke la mediumo troviĝas en ia krizostato kaj ĝuas ian mensklarecon, kiu havigas al li somnambulan perceptokapablon, kvazaŭan duoblan vidadon, kio klarigus la momentan pliampleksiĝon de liaj intelektaj fakultoj? Tiel estus, ĉar, oni diras, la komunikajoj, ricevataj per la medioj, ne atingas pli malproksimen, ol tiuj per la somnambuloj.

A. K. — Jen ankoraŭ unu sistemo, kiu ne eltenas profundan ekzamenon. La mediumo nek troviĝas en ia krizostato, nek dormas, sed tute maldormas, agas kaj pensas kiel ĉiuj homoj, sen io eksterordinara. Eble certaj unuopaj faktoj naskis tiun miskomprenon, sed kiu ĉe la juĝado de la aferoj ne rigardas nur unu el iliaj aspektoj, tiu senpene konstatas, ke la mediumo estas dotita per ia speciala kapablo, laŭ kiu oni ne povas intermiksi lin kun la somnambulo; krom tio, plej evidentaj faktoj pruvas la absolutan sendependecon de lia pensado. Ne konsiderante la skribitajn komunikajojn, kia somnambulo iam ŝprucigis ian penson el iu inerta korpo? Kia estigis videblajn, eĉ tuŝeblajn aperaĵojn? Kia povis

tenadi multepezan korpon senapoge en la aero? Ĉu per somnambulismo unu mediumo foje desegnis en mia domo, antaŭ dudek personoj, la portreton de junulino, mortinta antaŭ dek ok monatoj kaj kiun li neniam vidis, portreton, kiun rekonis ŝia patro, ĉeestanta en la kunsido? Ĉu per somnambulismo, tablo precize respondas proponitajn demandojn, eĉ mensajn? Certe, se oni akceptas, ke la mediumo troviĝas en ia magnetiza stato, ŝajnas al mi malfacile kredi, ke la tablo estas somnambulo.

Oni diras ankaŭ, ke la mediumoj parolas klare nur pri konataj aferoj. Kiel do klarigi jenan fakton kaj multegon da aliaj similaj? Unu mia amiko, tre bona skribiva mediumo, demandis Spiriton, ĉu iu homo, kiun li jam de dek kvin jaroj ne vidis, ankoraŭ apartenas al ĉi tiu mondo. "Jes, li ankoraŭ vivas — tiu respondis —; li loĝas en Parizo, strato tia, numero tioma." La mediumo tien iris kaj trovis la homon en la indikita loko. Ĉu tio estis ia iluzio? Lia menso des malpli povus sugestis al li ĉi tiun respondon, ĉar pro la aĝo de tiu homo tute probable estis, ke ĉi tiu jam tiam ne vivis sur la Tero. Se en iuj okazoj oni vidis, ke respondoj akordas kun la penso, ĉu estas racie el tio konkludi, ke tia akordo estas ĝenerala normo? En ĉi tiu, kiel en ĉiu alia rilato, la trorapidaj juĝoj estas ĉiam danĝeraj, ĉar ilin povas neigi faktoj, kiujn oni ankoraŭ ne observis.

La nekredemaj ne kapablas vidi por konvinkiĝi

V. — Faktoj pozitivaj, jen kion la nekredemuloj dezirus vidi kaj petas, sed kion oni plej ofte ne povas al ili havigi. Se ĉiuj povus atesti tiajn faktojn, dubo jam ne trovus al si lokon. Kial do tiom da homoj vidis nenion, malgraŭ sia bonvolo? Oni al ili kontraŭmetas, ili diras, ilian mankon de fido; je tio ili rediras, ja prave, ke ili ne povas havi ian antaŭan fidon kaj ke, se oni volas, ke ili kredu, oni devas havigi al ili rimedojn por kredi.

A. K. — La motivo de tio estas tre simpla. Ili volas la faktojn sub sia ordono, sed la Spiritoj obeas neniajn ordonojn: estas necese atendi ilian volontecon. Ne

sufiĉas do diri: "Montru al mi tian fakton, kaj mi kredos"; oni devas voli persistadi, lasi la faktojn okazi per si mem, ne volante ilin perforte estigi aŭ direkti; tiu, kiun vi celas, eble ne estas ĝuste tiu, kiun vi ricevos, sed aliaj montriĝos, kaj tiu, kiun vi deziras, venos en la momento, kiam vi tute ne pensas pri ĝi. Antaŭ la okuloj de atenta kaj penema observanto aperas da ili amasoj, kiuj konfirmas unu alian; sed homo, kiu pensas, ke sufiĉas ektorni ian krankon, por ekfunkciigi la maŝinon, tiu tute eraras. Kion faras naturisto, deziranta studi la kutimojn de iu besto? Ĉu li ordonas al ĝi fari tion aŭ alian, por, nerapidante, ĝin laŭplaĉe observadi? Ne, ĉar li ja scias, ke ĝi lin ne obeos; li **spionas** la spontaneajn manifestiĝojn de ĝia instinkto; li ilin atendas kaj preterpase kaptas. La sola komuna saĝo diras, ke des pli prave same devas esti kun la Spiritoj, inteligentoj multe pli sendependaj ol la bestoj.

Estas eraro pensi, ke por kredi estas necesa fido; ne, sed **bonfido**, kio estas io alia; nu, ekzistas skeptikuloj, kiuj neas eĉ evidentajojn kaj kiujn miregindaĵoj ne povus konvinki. Kiom da ili, vidinte, ĉiam ankoraŭ klarigas la faktojn laŭ sia maniero, dirante, ke tio pruvas nenion? Tiaj homoj taŭgas nur por malordigi la seancojn, sen ia profito por ili mem; tial oni ilin fortenas kaj oni ne volas perdi sian tempon kun ili. Kelkaj eĉ estus malkontentaj, se ili estus devigitaj kredi, ĉar ilian memestimon vundus la konfeso, ke ili eraras. Kion oni respondu al tiaj homoj, kiuj ĉie vidas nur iluzion kaj ĉarlatanisman? Nenion; oni ilin flanke lasu kaj diru, se ili tiel deziras, ke ili vidis nenion kaj eĉ, ke oni povis aŭ volis vidigi al ili nenion.

Krom ĉi tiuj harditaj skeptikuloj estas ankaŭ aliaj, kiuj volas vidi laŭ sia maniero, kiuj, farinte al si iun opinion, volas ĉion rilatigi al ĝi; ili ne komprenas, ke fenomenoj ne povas obei al ilia arbitro; ili ne scias aŭ ne volas trudi al si la necesajn kondiĉojn. Kiu volas observi bonafide, tiu devas, mi ne diras blinde kredi, sed flanken meti ĉian antaŭjuĝon; ne voli intersimiligi aferojn neakordigeblajn inter si; li devas atendi, sekvi,

observi kun senlaca pacienco; ĉi tiu kondiĉo eĉ utilas al la adeptoj, ĉar ĝi pruvas, ke ilia konvinkiteco ne estiĝis ventanime. Ĉu vi estas tiel pacienca? Ne, vi diras, mi ne havas tempon por tio. Vi do ne okupu vin pri ĝi, pri ĝi ne pensu: neniu devigas vin al tio.

Volonto aŭ malvolonto de la Spiritoj por konvinki

V. — Tamen la Spiritoj devas plej klopodi, por fari prozelitojn; kial ili ne volantas pli, ol ĝis nun, uzi rimedojn, por konvinki certajn homojn, kies opinio estus tre influa?

A. K. — Tiel estas, ĉar tute verŝajne ilin ne interesas por momento konvinki certajn homojn, kies gravecon ili ne same mezuras, kiel tiuj mem. Ĝi estas ne multe flata, mi konsentas, sed ni ne preskribas ilian opinion; la Spiritoj havas tian manieron juĝi la aferojn, kian ne ĉiam ni havas; ili vidas, pensas kaj agas laŭ aliaj elementoj; dum nia vidado estas ĉirkaŭlimita de la materio, ne transiras la malvastan rondon, kie ni staras, ili ĉirkaŭrigardas la tuton; la tempo, kiu aspektas al ni tiel longa, estas por ili momento; distanco estas nura paŝo; iaj detaloj, kiuj ŝajnas al ni ekstreme gravaj, en iliaj okuloj estas infanaĵoj, kaj kontraŭe, ili opinias gravaj aferojn, kies profundecon ni ne komprenas. Por ilin kompreni, ni devas per la penso leviĝi super nian materialan kaj moralan horizonton kaj loki nin sur ilia punkto de vidado; ne ilin koncernas malsuprenveni ĝis ni, sed nin supreniri ĝis ili: jen al kio kondukas nin la studado kaj la observado.

La Spiritoj amas la observantojn diligentajn kaj konsciencajn; por tiaj ili multigas la fontojn de lumo; kio ilin mallogas, tio estas ne la dubo, frukto de la nescienco, sed la vantamo de tiaj pseŭdoobservantoj, kiuj observas nenion, kiuj pretendas sidigi ilin sur la benketon de la juĝatoj kaj igi ilin moviĝi kvazaŭ marionetoj; tio estas la malamikemo kaj la diskreditemo, kiujn tiuj homoj portas en la menso, eĉ se tiaj sentoj ne manifestiĝas per ties paroloj. Por tiuj la Spiritoj faras nenion, kaj

tre malmulte zorgas pri tio, kion ili povas diri aŭ pensi, ĉar ties vico ja venos. Tial mi diris, ke necesa estas ne la fido, sed la bonfido.

Origino de la modernaj spiritismaj ideoj

V. — Unu afero, kiun mi dezirus scii, sinjoro, estas la deirpunkto de la modernaj spiritismaj ideoj: ĉu ili estas frukto de ia meminciata malkaŝo de la Spiritoj aŭ la rezultato de ia antaŭiranta kredo je ilia ekzisto? Vi ja komprenas la gravecon de ĉi tiu mia demando, ĉar, en ĉi tiu lasta okazo, oni povus supozi la partoprenon de la imagemo.

A. K. — Ĉi tiu demando, kiel vi diras, sinjoro, estas grava el tiu vidpunkto, kvankam estas malfacile akcepti — supozante, ke tiuj ideoj naskiĝis el ia antaŭa kredo —, ke la imagemo povis okazigi ĉiujn observitajn materiajn faktojn. Efektive, se Spiritismo estus bazita sur la antaŭa ideo pri la ekzisto de la Spiritoj, oni povus, kun iel verŝajna praveco, dubi la realecon de tiu ekzisto, ĉar ja, se iu kaŭzo estas ĥimero, la sekvoj devas mem esti ĥimeroj; sed ne tiel okazis.

Rimarku unue, ke tiu sinsekvo estus tute senlogika; la Spiritoj estas ne efiko, sed kaŭzo; vidante iun efikon, oni povas serĉi ĝian kaŭzon, sed ne nature estas imagi ian kaŭzon, **antaŭ ol esti vidinta la efikojn**. Oni do ne povus koncepti la Spiritojn, se ne estus montriĝintaj efikoj, kies probabla klarigo estis la ekzisto de nevideblaj estuloj. Nu, ne ĝuste tiel elkoviĝis tiu ideo, t. e. ĝi ne estas ia imagata hipotezo, por klarigi certajn fenomenojn; la unua farita supozo estas tiu pri ia kaŭzo tute materia. Tiel do, anstataŭ ke la Spiritoj estis ia antaŭnaskita ideo, oni deiris de la vidpunkto **materialisma**. Ĉar ĉi tiu vidpunkto ne ĉion kapablas klarigi, tial nur la observado kondukis al la kaŭzo spirita. Mi parolas pri la modernaj spiritismaj ideoj, ĉar, ni scias, ĉi tiu kredo estas tiel malnova kiel la mondo. Jen la irado de la aferoj.

Okazis spontaneaj fenomenoj, kiel strangaj bruoj,

frapoj, movoj de objektoj k. a., sen ia konata videbla kaŭzo, fenomenoj, kiuj povis refariĝi sub la influo de certaj personoj. Ĝis tiam nenio rajtigas, ke oni serĉu ilian kaŭzon aliloke ol en la agado de ia magnetata aŭ alispeca fluidaĵo, kies proprecoj ankoraŭ estis nekonataj. Sed oni baldaŭ konstatis en tiuj bruoj kaj movoj ian intencan kaj inteligentan karakteron, el kio oni konkludis, kiel mi jam diris, ke: Se ĉia efiko havas ian kaŭzon, ĉia efiko inteligenta havas do ian kaŭzon inteligentan. Tiu inteligento ne povas troviĝi en la objekto mem, ĉar la materio ja ne estas inteligenta. Ĉu ĝi estis la refiguraĵo de tiu de la homo aŭ homoj ĉeestantaj? En la komenco oni tiel pensis, kiel mi ankaŭ diris; nur la sperto povus juĝi, kaj la sperto per nerefuteblaj pruvoj, en multe da okazoj, elmontris la absolutan sendependecon de tiu inteligento. Ĝi do troviĝis ekster la objekto kaj ekster la persono. Kio ĝi estis? Ĝi mem respondis; ĝi diris, ke ĝi apartenas al la kategorio de la senkorpaj estuloj, nomataj "Spiritoj". Sekve, la ideo pri la Spiritoj ne antaŭekzistis, eĉ ne estis konsekvenca. Per unu vorto, ĝi ne elŝprucis el la cerbo, sed estas donita de la Spiritoj mem, kaj ĉion, kion ni poste eksciis pri ili, ankaŭ ili al ni informis.

Post la malkaŝo de la ekzisto de la Spiritoj kaj la starigo de la komunikrimedoj, oni povis teni konstantajn konversaciojn kaj ekhavi informojn pri la naturo de tiuj estuloj, la kondiĉoj de ilia vivado, ilia rolo en la videbla mondo. Se tiel same oni povus demandi la estaĵojn de la mondo de la supermezure malgrandaj, kiom da kuriozaj aferoj oni lernus pri ili!

Ni supozu, ke antaŭ la eltrovo de Ameriko ekzistis iu elektra drato tra Atlantiko kaj ke ĉe ĝia ekstremaĵo en Eŭropo oni ekrimarkis inteligentajn signojn: oni konkludus, ke ĉe la transa ekstremaĵo staras inteligentaj estuloj, penantaj komunikiĝi; oni povus demandi ilin kaj ili respondus. Oni tiele certiĝus pri ilia ekzisto, oni eksciis iliajn morojn, iliajn kutimojn, ilian estecon, ilin neniam antaŭe vidinte. Tiel same okazis pri la interrilatoj kun la nevidebla mondo; la materiaj manifestiĝoj

estis kvazaŭ signoj, atentigiloj, kiuj ebligis al ni pli regulajn kaj pli konstantajn komunikiĝojn. Kaj, kio estas rimarkinda, laŭgrade kiel ni disponas pli facilajn komunikrimedojn, la Spiritoj forlasas tiujn primitivajn, nesufiĉajn kaj neoportunajn, same kiel mutulo, ricevinte la parolon, ne plu uzas la signolingvon.

Kiuj estis la loĝantoj de tiu mondo? Ĉu estuloj apartaj, fremdaj al la homaro? Ĉu bonaj aŭ malbonaj? Ankoraŭ al la sperto estis donita la solvo de ĉi tiuj demandoj, sed ĝis multenombraj observoj prilumis la aferon, la kampo de la konjektoj kaj sistemoj estis malfermita, kaj Dio scias, kiom da tiaj aperis! Unuj homoj pensis, ke la Spiritoj estas superaj en ĉio, aliaj vidis en ili nur demonojn; oni povis ilin juĝi nur laŭ iliaj paroloj kaj agoj. Ni imagu, ke el tiuj nekonataj transatlantikaj loĝantoj, pri kiuj mi ĵus parolis, unuj diris tre bonajn vortojn, dum aliaj distingiĝis per la cinikeco de siaj esprimoj: oni el tio konkludus, ke inter ili ekzistas bonaj kaj malbonaj. Tiel same estas kun la Spiritoj; tiel oni agnoskis ĉe ili ĉiujn gradojn da boneco kaj da maliceco, da malklareco kaj da klareco. Ĉe la perfekta informiĝo pri iliaj bonaj kaj malbonaj ecoj, koncernas nian prudenton apartigi bonan de malbona, veran de malvera en iliaj rilatoj kun ni, tute tiel, kiel ni agadas kun la homoj.

La observado klarigis al ni ne nur la moralajn ecojn de la Spiritoj, sed ankaŭ ilian naturon kaj tion, kion ni povus nomi ilia fiziologia stato. Oni de la Spiritoj mem eksciis, ke unuj estas tre feliĉaj kaj aliaj tre malfeliĉaj; ke ili estas ne iaj apartaj estuloj, de escepta naturo sed la animoj mem de tiuj, vivintaj sur la Tero, kie ili forlasis sian korpan envolvajon, animoj, kiuj okupas la spacegon, nin senĉese ĉirkaŭas kaj tuŝas, kaj inter kiuj ĉiu el ni povis rekoni, laŭ nekontesteblaj signoj, **siajn parencojn, siajn amikojn kaj siajn surterajn konatojn**; oni povis sekvi ilin en ĉiuj fazoj de ilia transtomba ekzistado, de post la momento, kiam ili forlasis la korpon, kaj observi ilian situacion laŭ la speco de ilia morto kaj la maniero, kiel ili vivis sur la Tero. Fine oni eksciis, ke ili ne estas iaj estuloj abstraktaj, senmateriaj, laŭ la absoluta senco

de la vorto; ili portas ian envolvajon, kiun ni nomas **perispirito**, ian korpon fluidecan, vaporecan, diafanan, nevideblan en sia normala stato, sed kiu, en certaj okazoj, kaj per ia plidensiĝo aŭ molekula aranĝo, povas momente fariĝi videbla, eĉ tuŝebla; ĉe tio klariĝis la fenomeno de la aperaĵoj kaj tuŝoj. Tiu envolvajo ekzistas dum la vivo de la korpo: ĝi estas la ligilo inter la Spirito kaj la materio; ĉe la morto de la korpo, la animo aŭ Spirito — kio estas io sama — demetas de si nur la envolvajon maldelikatan: ĝi konservas la duan, simile kiel ni demetas supran veston, por plue porti nur tiun suban, kiel ankaŭ la semo seniĝas je sia ŝelo kaj konservas nur sian perispermion. Ĝuste tiu duonmateria envolvajo de la Spirito estas la rimedo por la diversaj fenomenoj, per kiuj li manifestas sian ĉeeston.

Jen, per malmulte da vortoj, sinjoro, la historio de Spiritismo; vi ja vidas, kaj tion ankoraŭ pli bone konsultas, kiam vi ĝin funde estos studinta, ke ĉio en ĝi estas la rezultato de la observado sed ne de ia antaŭforĝita sistemo.

Rimedo por komunikado

V. — Vi parolis pri la rimedoj por komunikado: Ĉu vi povus havigi al mi ian ideon pri ili, ĉar estas malfacile kompreni, kiel tiuj nevideblaj estuloj povas konversacii kun ni?

A. K. — Volonte, sed mi ĝin faros malmultvorte, ĉar tio postulus tro longan elvolvadon, kion vi legos precipe en **La Libro de la Mediumoj**. Tamen la malmulto, kiun mi nun diros al vi pri la afero, sufiĉos, por konigi al vi ĝian meĥanisman kaj precipe servos por igi vin kompreni kelkajn el la eksperimentoj, kiujn vi povus ĉeesti, antaŭ ol komenci vian efektivan iniciadon.

La ekzisto de tiu duonmateria envolvajo, aŭ perispirito, estas jam ia ŝlosilo, kiu klarigas multajn aferojn kaj montras la eblecon de certaj fenomenoj. Rilate la rimedojn, ili estas tre diversaj kaj dependas, ĉu de la pli aŭ malpli puriĝinta naturo de la Spirito, ĉu de la aparta

humoro de la homoj, servantaj al ili kiel perantoj. Tiu plej ordinara, tiu, kiun oni povus nomi universala, estas la intuicio, t. e. la ideoj kaj pensoj, kiujn ili inspiras al ni, sed ĉi tiu rimedo plejparte estas tro malmulte sentebla: ekzistas aliaj pli materiaj.

Iuj Spiritoj komunikiĝas per frapoj, respondantaj al **jes** kaj **ne**, aŭ signantaj la literojn, kiuj devas konstrui la vortojn. Oni povas ricevi la frapojn per la baskulmovado de iu objekto, ekzemple tablo, kiu frapas la plankon per unu piedo. Ofte ili aŭdiĝas en la materio mem de la korpoj sen ties moviĝo. Ĉi tiu primitiva procedo estas tro malrapida kaj apenaŭ taŭgas por iom vastaj komunikaĵoj; la skribado ĝin anstataŭis kaj fariĝas en pluraj manieroj. Oni unue uzis, kaj oni ankoraŭ kelkafoje uzas, ian oportune moveblan objekton, kiel tabuleto, korbo, skatolo, al kiu oni adaptas krajonon, kies pinto sin apogas sur la papero. La speco kaj la substanco de la objekto estas indiferentaj. La mediumo apogas la manojn sur tiu objekto, al kiu li transigas la influon, kiun li ricevas de la Spirito, kaj la kraiono strekas la literojn. Tiu objekto estas ja, ĝustadire, simpla kontinuaĵo de la mano, ia krajonigo. Oni poste konstatis la senutilecon de tiu perilo, kiu estas nura kvina rado ĉe veturado kaj kies sola merito estas pli materie montri la nedependecon de la mediumo; ĉi tiu povas skribi, tenante mem la krajonon.

La Spiritoj manifestiĝas ankaŭ kaj povas transigi siajn pensojn per artikitaj sonoj, kiuj rebruas ĉu ie en la aero, ĉu en la orelo; per la voĉo de la mediumo, per la vidado, per desegnoj, per la muziko kaj per aliaj rimedoj, kiujn kompleta studado konigas. Por ĉi tiuj diversaj rimedoj la mediumoj posedas specialajn kapablojn, kiuj dependas de ilia esteco. Tiel do ekzistas mediumoj por fizikaj efikoj, t. e. tiuj kapablaj okazigi materiajn fenomenojn, kiel la frapoj, la movado de korpoj k. a.; la mediumoj aŭdivaj, parolivaj, vidivaj, por desegnado, por muzikado, skribivaj. Ĉi tiu lasta kapableco estas la plej ordinara, tiu, kiu plej bone disvolviĝas per ekzerciĝado; ĝi estas ankaŭ la plej valora, ĉar ĝuste ĝi

ebligas la plej longajn kaj plej rapidajn komunikiĝojn.

La skribiva medio prezentas multenombrajn variaĵojn, el kiuj du forte distingiĝas de la ceteraj. Por ilin kompreni, oni devas ekscii, kiel fariĝas la fenomeno. La Spirito agas iafoje rekte sur la manon de la medio, donante al ĝi impulson tute ne dependantan de lia volo kaj sen la konscio de la medio pri tio, kion li skribas: tio estas la **skribiva medio mekanka**. Aliajn fojojn la Spirito agas sur la cerbon; lia penso trafluas la cerbon de la medio, kiu tiam, kvankam skribante pretervole, tamen pli aŭ malpli klare konscias tion, kion li ricevas: tio estas la **skribiva medio intuicia**; lia rolo estas ĝuste tiu de iu interpretanto, kiu transdiras penson, kiu estas ne lia, sed kiun tamen li devas kompreni. Kvankam en ĉi tiu okazo la pensoj de la Spirito kaj de la medio iafoje interkonfuziĝas, tamen la sperto instruas ilin klare distingi unu de alia. Per ĉi tiuj du specoj de medioj oni ricevas egale bonajn komunikaĵojn; tiuj mekankaj estas preferindaj precipe rilate la ankoraŭ ne konvinkitajn homojn. Cetere la esenca eco de iu medio kuŝas en la naturo de la lin influantaj Spiritoj kaj en la komunikaĵoj, kiujn li ricevas, multe pli bone, ol en la maniero de tiu ricevo.

V. — Ĉi tiu procedo ŝajnas al mi el la plej simplaj. Ĉu mi povus mem ĝin provi?

A. K. — Sendube, mi eĉ diras, ke se vi posedus la median kapablecon, tio estus la plej bona rimedo, per kiu vi mem konvinkiĝus, ĉar vi ne povus suspekti vian propran bonfidon. Mi nur vin forte admonas fari nenian provon, antaŭ ol esti zorge studinta la aferon. La transombajn komunikiĝojn implikas pli da malfacilaĵoj, ol kiom oni imagas; ili ne estas liberaj de malbonaĵoj kaj eĉ ne de danĝeroj por homoj sen la necesa sperto. Ĉi tie okazas tio sama al senspertulo, kiel al iu, kiu volus fari ĥemiajn manipuladojn, ne konante ĥemion tiu riskus brulan kripliĝon.

V. — Ĉu ekzistas ia signo, laŭ kiu oni povus konstati tiun kapablecon?

A. K. — Ĝis hodiaŭ oni konas neniajn simptomojn de la mediumeco; ĉiuj, pri kiuj oni pensis, ke oni ilin rekonis, havas neniom da valoro; iu provo estas la sola rimedo, por sciiĝi, ĉu oni ĝin posedas. Cetere mediumoj estas multenombraj, kaj tre malofte, se oni ne estas mem mediumo, oni ne trovas iun en iu sia familiano aŭ inter siaj konatoj. Sekso, aĝo kaj temperamento ne gravas: mediumeco ekzistas ĉe viroj kaj virinoj, ĉe infanoj kaj maljunuloj, ĉe bonfartantoj kaj malsanuloj.

Se la mediumeco elmontriĝus per ia ekstera signo, tio kuntrenus la konstantecon de tiu kapablo, dum ĝi estas esence moviĝema kaj pasema. Ĝia kaŭzo fizika troviĝas en la pli aŭ malpli facila asimilado de la perispiritaj fluidaĵoj de la enkarnulo kaj de la elkarniĝinta Spirito; ĝia kaŭzo morala kuŝas en la volo de la Spirito, kiu komuniĝas tiam, kiam tio plaĉas al li, sed ne laŭ nia volo; el tio sekvas, ke: 1-e, ne ĉiuj Spiritoj povas komuniĝi tute egale per ĉiaj mediumoj; 2-e, ĉiu mediumo povas perdi aŭ vidi interrompiĝi sian kapablon ĝuste en la momento, kiam li tion tute ne pensis. Ĉi tiuj malmultaj vortoj sufiĉas, por montri al vi, ke pri ĉi tio ekzistas vasta studado farenda, por ke oni sciiĝu pri la multaj flankoj de ĉi tiu fenomeno.

Estus do eraro pensi, ke ĉiu Spirito povas veni al la elvoko, kiun oni al li faris, kaj komuniĝi per ĉia mediumo. Por ke iu Spirito komuniĝu, estas necese unue, ke tio estu lia intereso; due, ke lia situacio aŭ liaj okupoj tion ebligas al li; trie, ke li trovu en la mediumo ilon taŭgan, konforman al lia naturo.

En principo oni povas komuniĝi kun ĉiaklasaj Spiritoj, kun siaj parencoj kaj amikoj, kiel kun la Spiritoj plej alte sidantaj, tiel ankaŭ kun tiuj plej vulgare, sed, ne konsiderante la individuajn kondiĉojn de ebleco, ili venas pli aŭ malpli volonte laŭ la cirkonstancoj kaj **precipe** dank'al sia simpatio al la elvokantoj, sed ne laŭ la peto de iu ajn, kiu ekhavas la fantazon elvoki ilin el scivolo; en tia okazo ili ne farus al si klopodon, kiam sur la Tero, kaj des malpli post sia morto.

La seriozaj Spiritoj venas nur al seriozaj kunsidoj,

kien ili estas elvokataj **kun pia enpenŝiĝo kaj por temoj seriozaj**; ili estas pretaj al nenia afero pri scivolo, pri elprovo aŭ havanta bagatelan celon, kaj ankaŭ al nenia eksperimento.

La frivolaj Spiritoj iras ĉien, sed en la seriozaj seancoj ili silentas kaj tenadas sin aparte, por aŭskulti, kiel farus lernejoj inter klera kunsidantaro. En la kolektiĝoj de ventkapuloj ili donas liberan kurson al sia petolemo, faras al si amuzon el ĉio, ofte mokas la ĉeestantojn kaj je ĉio respondas, ne zorgante pri la vero.

La tiel nomataj "frapantaj" Spiritoj, kaj entute ĉiuj, kiuj okazigas fizikajn manifestiĝojn, apartenas al mal-supera ordo, tamen pro tio ili ne estas esence malicaj; ili havas iel specialan kapablecon por la materiaj efikoj; la Superaj Spiritoj sin ne okupas pri tiaj aferoj, tiel same, kiel niaj kleruloj ne sin donas al akrobataĵoj; se ili trovas necesaj tiujn efikojn, ili uzas la servemon de tiuj Spiritoj, simile kiel ni uzas manlaboristojn por maldelikataj taskoj.

Profitamaj medioj

V. — Antaŭ ol sin doni al grandampla studado, iuj homoj dezirus esti certaj, ke ili ne perdos sian temp-on, kaj tiun certecon havigus al ili iu decidiga fakto, ricevita eĉ interŝanĝe kontraŭ mono.

A. K. — Kiu ne volas doni al si la penon studi, tiu portas prefere scivolon, ol efektivan soifon instruiĝi; nu, la Spiritoj, same kiel mi mem, ne ŝatas la scivolulojn. Cetere la profitamo estas al ili aparte antipatia kaj ili submetiĝas al nenio, kio taŭgas por ĝin kontentigi; oni devus fari pri la Spiritoj tre eraran ideon, por pensi, ke Superaj Spiritoj, kiel ekzemple Fénelon, Bossuet, Pascal, Sankta Aŭgusteno, sin metas al la dispozo de ĉiu ajn po tia monsumo hore. Ne, sinjoro; la komuniĝado kun la transtombo estas io treege serioza kaj postulas tro da respekto, ke ĝi taŭgas por parada elmontrado.

Cetere ni scias, ke la spiritismaj fenomenoj ne okazas tiel, kiel turniĝas la radoj de iu meĥanismo, ĉar ili

ja dependas de la volo de la Spiritoj; eĉ se mediumo, neniu povas garantii, ke li ilin okazigos en iu difinita momento. Se la nekredemuloj inklinas suspekti la honestecon de la medioj ĝenerale, tio estus multe pli danĝera, se la mediojn stimulus ia intereso: oni ja prave povus suspekti pagatan mediumon, ke li mem agas, se la Spirito mem ne agas, ĉar li ja antaŭ ĉio devus gajni sian monon. Krom tio ke neprofitamo absoluta estas la plej bona garantio pri sincereco, naŭzus la prudenton venigi pro mono la Spiritojn de homoj por ni karaj, ĉe la supozo ke ili tion konsentus, kio estas plej duba; ĉiaokaze tio estus Spiritoj malaltklasaj, malmulte skrupulaj pri la rimedoj kaj meritantaj nenian konfidon, kaj eĉ tiuj ofte faras al si la malican plezuron fiaskigi la aranĝojn kaj kalkulojn de sia entreprenisto.

La naturo de la mediumeco kontraŭas do al tio, ke ĝi fariĝu ia profesio, ĉar ĝi dependas de iu volo fremda al la mediumo, kaj povas ekmanĝi al li en tiu momento, kiam li ĝin bezonus, escepte se li ĝin anstataŭigas per ia artifiko. Sed, eĉ ĉe absoluta bonfido, ĉar la fenomenojn oni ne ricevas laŭplaĉe, tial estus efiko de hazardo, se en iu pagata seanco okazus ĝuste tio, kion oni dezirus vidi, por konvinkiĝi. Eĉ se vi donos al mediumo cent mil frankojn, vi ne igus lin ricevi de la Spiritoj tion, kion ili ne volas fari; tiu logilo, kiu falsus la intencon kaj ĝin aliigus en iun perfortan profitavidecon, eĉ, kontraŭe, estus motivo, por ke li fiasku. Se oni estas profunde konvinkita pri ĉi tiu veraĵo, ke la korinklino kaj la simpatio estas la plej potencaj motoroj, por altiri la Spiritojn, oni komprenos, ke oni ilin ne povas venigi, celante uzi ilin, por gajni monon.

Kiu do bezonas faktojn por konvinkiĝi, tiu devas elmontri al la Spiritoj sian bonvolon per serioza kaj pacienca observado, se li volas esti helpata; sed, se vero estas, ke la fido ne estas io trudebla, ne malpli vere estas, ke ĝi ne estas aĉetebla.

V. — Mi komprenas ĉi tiun rezonadon el la morala vidpunkto, tamen ĉu ne estas juste, ke kiu ofertas sian

tempon al la afero, tiu ricevus ian kompenson, se tio malhelpas lin labori por vivi?

A. K. — Unue: ĉu li tion faras por la intereso de la afero aŭ por sia propra? Se li forlasis sian oficon, tiel estas, ĉar li ne estis kontenta de ĝi kaj esperis pli multe gajni aŭ malpli peni en la nova metio. Nenia sinforgeso estas oferi sian tempon, se tio celas ĉerpi el ĝi ian profiton. Tio estas tute sama, kiel se oni dirus, ke la bakisto faras panon por la intereso de la homaro. La mediumeco ne estas la sola vivgajnilo; sen ĝi oni ja devus alie perlabori sian vivon. La vere seriozaj kaj sindonemaj mediumoj, kiam ne sufiĉe bonstataj, serĉas vivrimedojn en sia ordinara laborado kaj ne forlasis sian oficon; ili dediĉas al la mediumeco nur la tempon, kiun ili povas al ĝi oferi sen malutilo por sia ofico; se ili deprenas tempon de siaj liberaj aŭ ripozaj horoj, tiam tio estas ja sinofero, por kiu ili estas dankindaj: oni ilin tial pli profunde estimas kaj respektas.

La multeco de mediumoj en la familioj cetere faras senutilaj la profesiajn mediumojn, eĉ supozante, ke ili prezentu ĉiujn dezirindajn garantiojn, kio estas tre malofta. Se ne estus la senkreditiĝo, kiu ligiĝis al ĉi tiu speco de ekspluatado, senkreditiĝo pri kiu mi gratulas min, ke mi forte kunhelpis por ĝi, oni estus vidinta svarmi la komercemaĉajn mediumojn kaj la gazetojn kun paĝoj ŝmiritaj per iliaj reklamoj; nu, se unu povus esti lojala, cent ĉarlatanoj, misuzante realan aŭ **ŝajnigitan** kapablecon, farus la plej grandan malutilon al Spiritismo. Oni do prenu kiel principon, ke ĉiuj, kiuj vidas en Spiritismo ion alian, ol ia elmontrado de kuriozaj fenomenoj, tiuj, kiuj komprenas kaj ŝatas la dignon, la estimon kaj la verajn interesojn de la Doktrino, malaprobas ĉian ekspluaton, sub kia ajn formo aŭ **masko**, kiun ĝi prezentus. La seriozaj kaj sinceraj mediumoj — mi tiaj nomas la mediumojn, kiuj komprenas la sanktecon de la misio, kiun Dio al ili konfidis — evitas eĉ la ŝajnojn de ĉio, kio povus ĵeti sur ilin eĉ la plej malgrandan suspekton pri profitamo; la akuzon, ke ili iel ajn profitus el sia kapableco, ili rigardus kiel insulton.

Konsentu, sinjoro, kvankam vi estas nekredema, ke tia honesta medio impresas vin tute alie, ol se vi estus paginta monon, por vidi lin labori, aŭ eĉ se vi estus ricevinta senpagan enlason, se vi sciis, ke tio kaŝas en si ian demandon pri mono. Konsentu, ke ĉe tia konduto, de iu instigata de vere religia sento, nur de la fido, sed ne de ia monavidemo, li pretervole trudus vian respekton, eĉ se li estas la plej maleminenta proleto, kaj inspirus al vi pli da konfido, ĉar vi havus nenian motivon, por suspekti lian lojalecon. Nu, sinjoro, vi trovos multajn mediojn kontraŭ unu ne tia, kaj tio estas unu el la kaŭzoj, kiuj forte kunhelpis por la fidindeco kaj disvatiĝo de la Doktrino, dum, se ĝi havus nur profitamajn perantojn, ĝi hodiaŭ ne enkalkulus eĉ la kvaronon de ĝiaj nunaj adeptoj.

Oni ja bone komprenas, ke profesiaj medioj estas treege malmultaj, almenaŭ en Franclando; ke, ankaŭ, tiaj ne ekzistas en la plimulto el la provincaj spiritistaj grupoj, kie la reputacio de dungatoj sufiĉus, por forigi ilin de ĉiuj seriozaj societoj, kaj kie ili neniom profitus el tia metio dank'al la senkreditigo, kies objekto ili estus, kaj la konkurado de la neprofitamaj medioj, kiuj troviĝas ĉie. Por anstataŭigi la al si mankantan kapablecon, aŭ pligrandigi sian klientaron, pseŭdo-medioj pluroficas, manipulante ludkartojn, ovoblonkon, kafrekrementon k. a., por kontentigi ĉiajn gustojn, tiamaniere esperante, manke de la Spiritoj, enlogi homojn, kiuj ankoraŭ kredas tiajn malsaĝaĵojn. Se ili malutilus nur sin mem, ne tre malbone estus, sed iuj homoj, sen plua esplorado, intermiksas falsaĵon kaj realaĵon, kaj ankaŭ malicintenculoj profitas el tiu konfuzo por diri, ke ja en tio konsistas Spiritismo. Vi do vidas, sinjoro, ke ĉar la ekspluatado de la mediumeco kuntrenas misuzojn malutilajn al la Doktrino, tial la serioza Spiritismo ĝin prave malaprobas kaj forpuŝas kiel sian helpanton.

V. — Ĉio ĉi estas tre logika, mi konsentas, sed la neprofitamaj medioj ne estas sub la dispono de ĉiuj, kiu al ili venus, kaj oni ne povas permesi al si ilin ĝeni, dum oni ne farus al si skrupulon iri al tiu, kiu

postulas pagon, ĉar oni ja scias, ke oni ne igas lin perdisian tempon. Se ekzistus **mediumoj publikaj**, tio favorus al la homoj, kiuj volas konvinkiĝi.

A. K. — Sed, se la mediumoj publikaj, kiel vi ilin nomas, ne prezentas la deziratajn garantiojn, kion do ili povas utili por ies konvinko? La malbonaĵo, kiun vi montras, ne detruas tiujn multe pli gravajn, pri kiuj mi vaste parolis. Oni irus al ili prefere por amuziĝi aŭ por ilin konsulti pri la estonteco, ol por instruiĝi. Kiu serioze volas konvinkiĝi, tiu pli aŭ malpli frue ektrivos por tio la rimedojn, se en tio li uzas persistecon kaj bonvolon; sed, se li por tio ne estas preparita, li ne konvinkiĝas nur de tio, ke li ĉeestis unu seancon. Se el ĉi tiu li kunportos malfavoran impreson, li estos malpli konvinkita ĉe la eliro, ol ĉe la eniro, kaj eble malinklina daŭrigi la studon de iu afero, kie li vidis nenion seriozan: jen kion montras la sperto.

Sed ekster la morala flanko la progresoj de la spiritisma scienco, pli funde konigante al ni la kondiĉojn, en kiuj okazas la manifestiĝoj, prezentas al ni hodiaŭ iun materialan malfacilaĵon, kiun oni ne suspektis en la komenco: tiu malfacilaĵo estas la neceso, ke ekzistu afineco de fluidaĵoj de la elvokita Spirito kaj de la mediumo. Mi flanken metas ĉian penson pri ruzaĵoj kaj artifikaĵoj, kaj supozas la plej absolutan honestecon. Por ke iu profesia mediumo povu havigi al si la plenan konfidon de la personoj, kiuj venus por konsulti lin, estus necese, ke li posedu ĉiaman kaj universalan kapablon, t. e. ke li povu komunikiĝi facile kun ĉiu ajn Spirito kaj ĉe ĉiu difinita momento, por esti konstante al la dispono de la publiko, tiel same, kiel iu kuracisto, kaj plenumi ĉiajn elvokojn, pri kiuj oni lin petus; nu, jen kio ekzistas en nenia mediumo, ĉu inter tiuj neprofitamaj, ĉu inter la aliaj, kaj tio pro kaŭzoj, ne dependantaj de la volo de la Spirito, sed kiujn mi ne povas ĉi tie vaste pritrakti, ĉar mi ne faras al vi kurson pri Spiritismo. Mi diras nur, ke la afineco de fluidaĵoj, kiu estas la principo mem de la mediumaj kapabloj, estas ne **ĝenerala**, sed **individa**; ke ĝi povas ekzisti kiel fluo de la mediumo al tia

Spirito kaj ne al tia alia; ke sen tiu afineco, kies nuancoj estas sennombraj, la komunikiĝoj estas nekompletaj, malveraj aŭ neblaj; ke plej ofte la asimiliĝo de fluidaĵoj de la Spirito kun tiuj de la mediumo ekestas nur kun la tempo, kaj nur **unu fojon el dek** ĝi estas perfekta tuj ĉe la unua okazo. Kiel vi vidas, sinjoro, la mediumeco estas submetita al iel organaj leĝoj, al kiuj ĉiu mediumo estas subordigita; nu, oni ne povas nei, ke ĉi tio estas rifo por la profesia mediumeco, ĉar la ebleco kaj la ĝusteco de la komunikiĝoj fontas el kaŭzoj, dependantaj nek de la mediumo, nek de la Spirito. (Vd. tuj poste, Ĉap II, paragrafon pri la **mediumoj**.)

Se do ni malkonsentas la ekspluatadon de la mediumeco, tiel estas nek el kapricemo, nek el sistememo, sed tial, ĉar la principoj mem, kiuj kontrolas la interrilatojn kun la nevidebla mondo, kontraŭas la regulecon kaj precizecon necesajn al iu, kiu sin metas sub la disponon de la publiko kaj kiun la deziro kontentigi pagantan klientaron instigas al misuzado de sia kapableco. El ĉi tio mi ja ne konkludas, ke ĉiuj profitamaj mediumoj estas ĉarlatanoj, sed mi diras, ke la allogo de la gajno kondukas al ĉarlatanismo kaj permesas, se ĝi ne pravigas, la suspekton pri friponeco. Kiu volas konvinkiĝi, tiu devas antaŭ ĉio serĉi al si sincerajn homojn.

Mediumoj kaj sorĉistoj

V. — Ĉar la mediumeco estas rimedo por la rilatoj kun la okultaj inteligentoj, tial ŝajnas al mi, ke mediumoj kaj sorĉistoj estas pli aŭ malpli la sama unu.

A. K. — En ĉiuj tempoj ekzistis naturaj kaj nekonsciaj mediumoj, kiuj, nur pro tio, ke ili okazigas strangajn kaj ne komprenatajn fenomenojn, estis kvalifigitaj kiel sorĉistoj kaj akuzitaj pri interligo kun la diablo; tio sama estis kun la plej multaj kleruloj, kies scioj staris super tiu vulgara. La malkleruloj trovalorigis al si ilian povon, kaj ili mem ofte ekspluatis la publikan kredemon; el tio la justa riproĉo, kiu ilin trafis. Sufiĉas kompari la povon, atribuitan al la sorĉistoj, kun la kapabl-

eco de la veraj medioj, por distingi unu de la dua, sed la plimulto el la kritikantoj ne donas al si ĉi tiun penon. Anstataŭ revivigi la sorĉarton, Spiritismo ĝin per unu fojo disbatas, senigante ĝin je ĝia supozita supernatura potenco, je ĝiaj formuloj, sorĉolibroj, amuletoj kaj talismanoj, kaj kondukante la eblajn fenomenojn al ilia ĝusta valoro, ne flanken metante la naturajn leĝojn.

La identiĝo, kiun iuj personoj pretendas estigi, originas el ilia eraro, ke la **Spiritoj troviĝas sub la dispono de la medioj**; ilia prudento malvolontas akcepti, ke povas dependi de iu ajn laŭplaĉe kaj en iu difinita momento venigi la Spiriton de tia aŭ alia pli aŭ malpli klera homo; pri tio ili pensas tute laŭ la vero, kaj se, antaŭ ol ataki Spiritismon, ili penus ĝin ekkoni, tiam ili scius, ke ĝi formale asertas, ke **la Spiritoj obeas nenies kapricojn kaj ke neniu povas ilin arbitre kaj kontraŭvole venigi**; el tio sekvas, ke la medioj ne estas iaj sorĉistoj.

V. — Laŭ ĉi tio, ĉiuj efikoj, kiujn certaj fidindaj medioj laŭplaĉe kaj antaŭ la publiko okazigas, en viaj okuloj estas nuraj ĵonglaĵoj?

A. K. — Mi tion ne asertas en maniero absoluta. Tiaj fenomenoj ne estas neeblaj, ĉar kelkaj malaltklasaj Spiritoj povas esti pretaj al tiaj aferoj kaj amuziĝas ĉe tio, eble estinte ĵonglistoj sur la Tero, kaj ankaŭ kelkaj medioj speciale taŭgas por tiu speco de manifestiĝoj; sed la plej simpla komuna saĝo forpuŝas de si la ideon, ke Spiritoj, kiel ajn malaltrangaj ili estas, venas paradi kaj fari ĵonglaĵojn, por amuzi scivolulojn.

La okazigo de tiuj fenomenoj laŭplaĉe, kaj precipe antaŭ la publiko, estas ĉiam suspektinda; en ĉi tiu okazo la mediumeco kaj la prestidigitarto estas tiel proksimaj unu de la dua, ke ofte estas malfacile ilin distingi inter si; antaŭ ol vidi tie la agadon de la Spiritoj, oni devas fari detalajn observojn kaj konsideri ne nur la karakteron kaj la antecedentojn de la mediumo, sed ankaŭ multe da cirkonstancoj, kiujn nur profunda studado de la teorio de la fenomenoj spiritismaj povas instrui ĝuste

taksi. Estas rimarkende, ke ĉi tiu speco de mediumeco — se nur mediumeco tie ekzistas — limiĝas je la okazigo de unu sama fenomeno, eventuale je iaj variaĵoj de tiu, kio ne sufiĉas por forigi dubojn. La plej bona garantio de sincereco estus absoluta neprofitamo.

Kiel ajn realaj tiuj fenomenoj kiel mediumaj efikoj, ili havas bonan rezulton, nome, ke ili alportas famon al la spiritisma ideo. La diskutado, kiu naskiĝas pri ĉi tiu objekto, instigas multajn homojn al pli profunda studado. Certe ne tie oni iru ĉerpi seriozajn sciojn pri Spiritismo aŭ la filozofion de la Doktrino, sed tio estas tamen ia rimedo por altiri la atenton de la indiferentaj kaj devigi tiujn plej obstine kontraŭstarantajn paroli pri ĝi.

Diverseco de la Spiritoj

V. — Vi parolas pri Spiritoj bonaj aŭ malicaj, seriozaj aŭ senkonsideraj; mi konfesas, ke mi ne komprenas tian distingon; ŝajnas al mi, ke, demetante sian korpan envolvajon, ili devas seniĝi je la neperfektaĵoj propraj al la materio; ke lumo devas fariĝi al ili pri la veraĵoj, al ni kaŝitaj, kaj ke ili devas esti liberaj de la surteraj antaŭjuĝoj.

A. K. — Sendube ili sin liberigas de la fizikaj neperfektaĵoj, t. e. de la malsanoj kaj korpaj kadukaĵoj, sed la neperfektaĵoj moralaj apartenas ne al la korpo, sed al la Spirito. Inter ili ekzistas unuj, intelekto aŭ morale pli aŭ malpli progresintaj ol aliaj. Estus eraro pensi, ke, forlasinte sian materian korpon, la Spiritoj tuj ricevas la lumon de la vero. Ĉu vi kredas ekzemple, ke, kiam vi mortos, estos nenia diferenco inter via Spirito kaj tiu de iu sovaĝulo aŭ malbonfaranto? Se tiel estus, kion tio al vi utilis, ke vi klopodis por instruiĝi kaj pliboniĝi, ĉar ia sentaŭgulo estus egala al vi post la morto? La progresado de la Spiritoj fariĝas nur grade, kaj iafoje forte malrapide. Inter ili — tio dependas de la grado da puriĝo de ĉiu — unuj vidas la aferojn el vidpunkto pli ĝusta ol tiam, kiam ili estis sur la Tero; aliaj, kontraŭe, ankoraŭ havas la samajn inklinojn, la

samajn antaŭjuĝojn kaj la samajn erarojn, tiel longe, ĝis la tempo kaj novaj elprovaĵoj ebligas al ili klariĝon de la menso. Notu al vi, ke ĉi tio, kion mi diras, estas frukto de la sperto, ĉar ja tiele ili sin montras en siaj komunikiĝoj. Tio estas do elementa principo de Spiritismo, ke ĉe la Spiritoj ekzistas ĉiuj gradoj da inteligenteco kaj moraleco.

V. — Sed, kial do la Spiritoj ne estas ĉiuj perfektaj? Sekve, Dio kreis ilin de ĉiaj kategorioj?

A. K. — Tio estas tiel sama, kiel se mi demandus, kial ne ĉiuj kolegianoj lernas Filozofion. Ĉiuj Spiritoj havas saman originon kaj egalan destinon. La diferencoj inter ili ne signifas malsamajn specojn, sed diversajn gradojn da progreso.

La Spiritoj ne estas perfektaj, ĉar ili estas la animoj de la homoj, kaj la homoj ja ne estas perfektaj; pro la sama motivo, la homoj ne estas perfektaj, ĉar ili estas la enkarniĝo de pli aŭ malpli evoluintaj Spiritoj. La enkorpora kaj la spirita mondoj senĉese enverŝiĝas unu en alian: ĉe la morto de la korpo la enkorpora mondo liveras sian kontigenton al la spirita; per la naskiĝoj la spirita mondo nutras la homaron.

Dum ĉiu nova ekzistado la Spirito faras pli aŭ malpli grandan paŝon antaŭen, kaj kiam li sur la Tero akiris al si la kvanton da konoj kaj moralan altecon konformajn al nia planedo, li ĉi tiun forlasas kaj iras en iun pli altrangan mondon, kie li lernas novajn aferojn.

La Spiritoj, konsistigantaj la nevideblan loĝantaron de la Tero, estas kvazaŭ ia refiguraĵo de la enkorpora mondo: tie troviĝas samaj virtoj kaj samaj malvirtoj; inter ili vivas kleraj, malkleraj kaj pseŭdo-kleraj, saĝaj kaj stultaj, filozofaj, rezonemaj, sistememaj; ĉar ne ĉiuj seniĝis je siaj antaŭjuĝoj, tial ĉiuj politikaj kaj religiaj opinioj tie havas siajn reprezentantojn; ĉiu parolas laŭ siaj ideoj, kaj kion ili diras, tio ofte estas nur ilia persona opinio: jen kial oni ne devas blinde kredi ĉion, kion la Spiritoj diras.

V. — Se tiel estas, mi vidas grandegan malfacilaĵon: en tiu konflikto de malsamaj opinioj, kiel distingi inter eraro kaj veraĵo? Mi ne vidas, kiel utilaj por ni estus la Spiritoj kaj ke ni ion gajnus el interparoloj kun ili.

A. K. — Se eĉ ili utilis por sciigi nin, ke Spiritoj ekzistas kaj ke tiuj Spiritoj estas la animoj de la homoj, ĉu tio ne estus tre grava por ĉiuj, kiuj dubas, ĉu ili havas ian animon, kaj ne scias, kio ili fariĝos post la morto?

Kiel ĉiuj filozofiaj sciencoj, tiel ĉi tiu postulas longan studadon kaj detalan observadon: tiam oni lernas distingi inter vero kaj friponeco, kiel ankaŭ la rimedojn forigi la trompemajn Spiritojn. Super tiu bando da malaltklasuloj staras la Superaj Spiritoj, kiuj celas nur la bonon kaj havas la mision gvidi la homojn sur la bona vojo: nin koncernas scii ilin ŝati kaj kompreni. Ĉi tiuj instruas al ni grandajn aferojn, sed ne pensu, ke la studado de tiuj aliaj estas senutila: por koni iun popolon, oni devas observi ĉiujn ĝiajn klasojn.

Vi mem estas la pruvo de ĉi tio: vi pensis, ke sufiĉas al la Spiritoj demeti sian korpan envolaĵon, por liberigi sin de siaj neperfektaĵoj; nu, la interrilatoj kun ili sciigis al ni la malon kaj konigis al ni la veran estecon de la spirita mondo, kiu nin ĉiujn plej altgrade interesas, ĉar ni ĉiuj devas tien iri. Koncerne la erarojn, kiuj povas veni de la malsameco de opinioj ĉe la Spiritoj, ili forviŝiĝas per si mem laŭmezure, kiel oni lernas distingi inter la bonaj kaj la malicaj, inter kleraj kaj malkleraj, inter sinceraj kaj hipokritaj, tute same kiel ĉe ni; tiam la komuna saĝo nudigos la malverajn doktrinojn.

V. — Mia konsiderado ĉiam ankoraŭ firme staras koncerne la sciencajn kaj aliajn demandojn, kiujn oni povas submeti al la Spiritoj. La malsameco de iliaj opinioj pri la teorioj, kiuj dispartigas la scienculojn, nin konsternas. Mi ja komprenas, ke, ne egale instruitaj, ili ne povas ĉion scii, sed, kion do valoras la opinio de la sciantoj, se ni ja ne povas certiĝi, kiu pravas kaj kiu

malpravas? Tiel do estus tute egale turni sin al la homoj aŭ al la Spiritoj.

A. K. — Ĉi tiu konsiderado estas ankoraŭ sekvo de la nesciado de la vera karaktero de Spiritismo. Kiu pensas, ke li tie trovas ian facilan rimedon, por ĉion scii, tiu forte eraras. La Spiritoj ne estas komisiitaj por veni alporti al ni la klerecon tute pretan: tio ja estus tro oportuna, se ni devus nur pridemandi, por esti kontentigitaj, tiamaniere ŝparante al ni la penon de la esploroj. Dio volas, ke ni laboru, ke nia menso ekzerciĝu: klercon ni akiras al ni nur por ĉi tiu prezo; la Spiritoj ne liberigas nin de ĉi tiu devo; **ili estas tio, kio ili estas; Spiritismo celas ilin studi**, por ekscii, laŭ analogeco, kio ni iam estos, sed ne konigi al ni tion, kio devas resti kaŝita for de ni, aŭ senvualigi al niaj okuloj la aferojn pli frue ol konvene.

La Spiritoj same ne estas iaj antaŭdiristoj de ies sorto, kaj kiu ajn flatas al si, ke li ekhavas de ili siajn sekretojn, tiu, eble fariĝas mokataĵo de malsuperaj Spiritoj, per unu vorto: **Spiritismo estas scienco de observado, sed ne ia scienco de divenado aŭ de ekspluatado.** Ni ĝin studas, por ekkoni la staton de la estuloj de la nevidebla mondo, la rilatojn, ekzistantajn inter ili kaj ni, ilian kaŝitan agadon sur la videblan mondon, sed ne celante ian materian utilon, kiun ni povus el tio ĉerpi. El ĉi tiu vidpunkto ekzistas nenia Spirito, kies studado estus senutila; de ĉiu ni lernas ion, iliaj neperfektaĵoj, iliaj malvirtoj, ilia nekapableco, eĉ ilia malklereco estas observobjektoj, kiuj enkondukas nin en la intiman naturon de tiu mondo, kaj se ne ili klerigas nin per sia instruado, tiam ni mem nin instruas studante ilin, tiel same, kiel ni agas, observante la morojn de iu al ni nekonata popolo.

Koncerne la klerajn Spiritojn, tiuj nin multe instruas, sed en la limoj de tio ebla; oni ilin ne demandu pri io, kion ili ne povas aŭ ne devas malkaŝi; oni kontentiĝu per tio, kion ili diras al ni; voli iri pluen estas elmeti sin al mistifikoj de frivolaj Spiritoj, ĉiam pretaj

respondi je ĉio. La sperto instruas nin difini la kiomon da konfido, kiun ni povas havi al ili.

Praktika utileco de la manifestiĝoj

V. — Mi supozas, ke ĉio ĉi estas konstatita kaj ke Spiritismo estas rekonata kiel veraĵo: kia povas esti ĝia praktika utileco? Ĝis hodiaŭ oni ĝin malbezonis, tial ŝajnas al mi, ke oni povus ĝin plue malhavi kaj tre trankvile vivi sen tio.

A. K. — Tion saman oni povus diri rilate la fervojojn kaj la vaporon, sen kiuj oni tre bone vivadis.

Se, laŭ via kompreno, praktika utileco estas la rimedoj, por glate vivi, akiri al si riĉecon, koni la estontecon, eltrovi karbominojn aŭ kaŝitajn trezorojn, ekscii pri heredaĵoj, ŝpari al si la penon pri esploroj, tiam Spiritismo taŭgas por nenio; ĝi ne povas okazigi, ke la borso altiĝu aŭ malaltiĝu, ne povas esti disdividita en akciojn, eĉ ne liveri elpensojn tute elfaritajn, pretajn por ekspluatado. En ĉi tiu rilato, kiom da sciencoj estus senutilaj! Kiom da ili estas neprofitaj, el la komerca vidpunkto! La homoj vivadis tute same bone antaŭ la eltrovo de ĉiuj novaj planedoj; antaŭ ol oni sciis, ke ne la suno rondiras ĉirkaŭ la Tero, sed kontraŭe; antaŭ ol oni kalkulis la fariĝon de la eklipsoj; antaŭ ol oni konis la mikroskopan mondon kaj multegon da aliaj aferoj. Por vivi kaj kreskigi sian tritikon, la kamparano ne bezonas scii, kio estas kometo. Kial do la scienculoj sin donadas al tiaj esploroj, kaj kiu kuraĝus diri, ke ili perdas sian tempon?

Ĉio, kio taŭgas por levi unu angulon de la vualo, helpas la disvolviĝon de la intelekto, plivastigas la kadron de la ideoj, ebligante al ni penetri pli profunde en la leĝojn de la Naturo. Nu, la mondo de la Spiritoj ekzistas dank'al unu el tiuj leĝoj de la Naturo; Spiritismo konigas al ni tiun leĝon; ĝi sciigas nin pri la influo de la mondo nevidebla sur la mondon videblan kaj pri la rilatoj inter ili, tiel same, kiel la Astronomio konigas al ni la rilatojn de la ceteraj astroj kun la Tero; ĝi

montras tiun mondon kiel unu el la fortoj, kiuj kontrolas la Univerŝon kaj kunhelpas por la tenado de la ĝenerala harmonio. Eĉ ĉe la supozo, ke ĝia utileco estas nur tio, ĉu la malkaŝo de tia potenco ne estus tre grava, aparte de ĉia morala doktrino? Ĉu tio do neniom valoras, ke tuta nova mondo elmontriĝas al ni, se precipe la kondado de tiu mondo havigas al ni la ŝlosilon de multego da ĝis tiam nesolveblaj demandoj; se ĝi incas nin pri la transtombaj misteroj, kiuj nin almenaŭ iomete interesas, ĉar ja ni ĉiuj senescepte devas pli aŭ malpli frue transiri la fatalan limon? Sed Spiritismo havas alian pli pozitivan utilon, nome la moralan influon sur la homojn per la altrudo de la faktoj. Spiritismo estas la evidenta pruvo de la ekzisto de la animo, de ties individueco post la morto, de ties senmorteco, de ties venonta sorto; ĝi estas do la ruiniĝo de la materialismo, ne per la rezonado, sed per la faktoj.

Oni ne petu de Spiritismo tion, kion ĝi ne povas doni, kaj oni en ĝi ne serĉu ion trans ĝia providenca celo. Antaŭ ol fariĝis la seriozaj progresoj de la astronomio, oni kredis la astrologion: ĉu estus saĝe aserti, ke la astronomio taŭgas por nenio, ĉar oni jam ne povas trovi en la influado de la astroj la antaŭscion pri sia destino? Tiel same, kiel la astronomio detronigis la astrologojn, tiel Spiritismo detronigas la divenistojn, la sorĉistojn kaj la antaŭdiristojn de homaj sortoj. Ĝi estas rilate al la magio tio sama, kiel la astronomio rilate al la astrologio, kiel la ĥemio rilate al la alkemio.

Frenezeco, memmortigo, obsedo

V. — Iuj homoj konsideras la spiritismajn ideojn kapablaj konfuzi la mensajn fakultojn, pro kio ili opinias prudente reteni ilian disvastiĝon.

A. K. — Vi ja konas jenan proverbon: "Por hundon dronigi, oni nomas ĝin rabia". Ne estas do mirige, ke la malamikoj de Spiritismo penas uzi ĉiujn pretekstojn; tiu preteksto, pri kiu vi parolas, ŝajnas al ili taŭga por

veki la timemon kaj la ofendiĝemon, kaj tial ili ĝin fervore ekprenis; sed ĝi falas ĉe la plej malprofunda ekzameno. Aŭdu do pri tia frenezeco la rezonadon de iu frenezulo.

Ĉiaj grandaj zorgoj de la spirito povas okazigi frenezon: la sciencoj, la artoj, eĉ la religio liveras sian kontingenton. La frenezo havas kiel principon ian patologiigan staton de la cerbo, ilo de la pensado: se la ilo estas difektita, la pensado estas do konfuzita. La frenezo estas do sekva efiko, kies unua kaŭzo estas ia organa antaŭinklino, kiu faras la cerbon pli aŭ malpli frapebla por certaj impresoj, kaj ĉi tio estas des pli vera, ĉar ekzistas homoj, kiuj ekstreme streĉas la cerbon kaj tamen ne freneziĝas, aliaj, kiuj freneziĝas sub la potenco de eĉ la plej malgranda superekscitiĝo. Ĉe la ekzisto de ia antaŭinklino al frenezeco, ĉi tiu prenas la karakteron de precipa absorba zorgo, kiu do fariĝas fiksa ideo. Tiu fiksa ideo povas esti tiu pri la Spiritoj ĉe iu, kiu sin okupas pri ili, tiel same, kiel pri Dio, la anĝeloj, la diablo, la riĉeco, la povo, iu arto, iu scienco, la patrineco, iu politika aŭ socia sistemo. Estas probable, ke iu religia frenezulo estus fariĝinta spiritisma frenezulo, se Spiritismo antaŭe estus lia plej ĉefa absorba zorgo. Estas vero, ke unu gazeto diris, ke en unu sola loko en Usono, kies nomon mi jam ne memoras, oni kalkulis kvar mil okazojn de frenezeco pro Spiritismo; sed oni scias, ke inter niaj kontraŭuloj estas prempenso kredi, ke nur ili havas prudenton, kaj jen tio estas ja manio, kiel ĉiu alia. En iliaj okuloj ni ĉiuj meritus enŝloson en frenezulejoj, kaj sekve la kvar mil spiritistoj en tiu citita loko certe estis tiaj samnombraj frenezuloj. Laŭ ĉi tiu vidmaniero Usono havas centojn da miloj da frenezuloj kaj ĉiuj ceteraj landoj multe pli grandan nombron. Ĉi tiu triviala ŝerco nun komencas fariĝi sengusta, de tiam, kiam oni vidas tiun frenezon ekposedi la plej altajn rangojn de la socio. Oni forte bruas ĉe iu konata ekzemplo, nome de Victor Hennequin, sed oni forgesas, ke antaŭ ol okupi sin pri la Spiritoj, li jam antaŭe elmontradis ekscentrecon de la ideoj; se ne estus aperintaj la turniĝantaj tabloj, kiuj, laŭ tre sprita vortludo de niaj kontraŭuloj,

turnis al li la kapon, lia frenezeco estus preninta alian direkton.

Mi diras do, ke Spiritismo ĝuas nenian privilegion en ĉi tiu rilato, kaj mi iras pluen: mi diras, ke, bone komprenata, ĝi estas antaŭgardilo kontraŭ freneziĝo kaj memmortigo.

Inter la plej multenombraj kaŭzoj de cerba super-ekscitiĝo oni menciuj la disreviĝojn, la malfeliĉaĵojn, la kontraŭatajn korinklinojn, kiuj estas ankaŭ la plej oftaj kaŭzoj de memmortigo. Nu, la vera spiritisto rigardas la aferojn de ĉi tiu mondo el tiel alta vidpunkto, ke la ĉagrenoj estas en liaj okuloj nur malagrablaj incidentoj de iu vojaĝo. Kio al iu alia kaŭzus fortegan afekcion, tio lin apenaŭ tuŝas. Li cetere scias, ke la ĉagrenoj de la vivo estas provoj, kiuj utilas al lia progresado, se li ilin suferas sen plendo, ĉar li estos iam rekompencita laŭ la braveco, kun kiu li ilin elportis. Liaj konvinkoj havigas do al li ian rezignacion, kiu gardas lin kontraŭ malespero kaj, sekve, kontraŭ senĉesa kaŭzo de freneziĝo kaj memmortigo. Li scias, krom tio, laŭ la scenoj, kiujn al li prezentas la komunikiĝoj kun la Spiritoj, la plorindan sorton de tiuj, kiuj propravole mallongigas siajn surterajn tagojn, kaj tiu sceno estas sufiĉe efekta, por igi lin pripensi sian intencon; tial grandega estas la nombro de tiuj, kiuj haltis sur tiu pereiga deklivo. Jen unu el la rezultatoj de Spiritismo.

En la nombron de la kaŭzoj de freneziĝo ni enkal-kulu ankoraŭ la timegon, kaj la timego al la diablo jam difektis pli ol unu cerbon. Ĉu oni konas la nombron da viktimoj, kiujn oni faris el homoj kun malforta imag-povo, frapante ĉi tiun per tia bildo, kiun oni plej penas aspektigi pli timegiga per teruraj detaloj? La diablo, oni diras, teruras nur infanojn, li estas ia brido, por ilia saĝ-iĝo, jes, same kiel la infanmanĝanto kaj la lupkoboldo; sed, kiam ili tion ne plu timas, ili fariĝas pli malbon-aj ol antaŭe, kaj jen, kiel rezulto, nekalkulebla estas la nombro da epilepsioj, kaŭzita de la difekto de delikat-aj cerboj.

Oni ne intermiksi la **patologian fenezecon** kun la

obsedo: ĉi tiu lasta ne originas de ia cerba difektiĝo, sed de la subjugigo, al kiu malicaj Spiritoj submetas iujn homojn, kaj iafoje mienas kvazaŭ la ĝustasenca frenezo. Ĉi tiu afekcio, tre ofta, estas sendependa de ĉia kredo je Spiritismo kaj ekzistis en ĉiuj tempoj. En ĉi tiu okazo la ordinara kuracado estas senpova kaj eĉ malutila. Konigante ĉi tiun novan kaŭzon de organisma perturbo, Spiritismo samtempe havigas la solan rimedon por ĝin venki, agante ne sur la malsanulon, sed sur la obsedantan Spiriton. Ĝi estas ne la kaŭzo, sed la forigilo de la malordo.

Forgeso pri la pasinteco

V. — Mi ne sukcesas klarigi al mi, kiel la homo povas profiti de la sperto, kiun li akiris al si en siaj antaŭaj ekzistadoj, se li ilin ne memoras, ĉar, se li ilin ne memoras, ĉiu ekzistado estas por li kvazaŭ la unua, kaj tio estas senfina rekomencado. Ni supozu, ke ĉiutage, ĉe vekigo, ni forgesus tion, kion ni faris hieraŭ: aĝante sepdek jarojn, ni ne estus pli progresintaj, ol tiam, kiam ni estis dekjaraj, dum, se ni memorus niajn erarojn, niajn mallertaĵojn kaj la punojn, kiujn ni altiris sur nin, ni penus ne rekomenci. Uzante la komparon, kiun vi faris pri la homo sur la Tero, kun la koleĝiano, mi ne komprenas, kiel tiu lernanto povus profiti el la lecionoj de la kvara klaso, ekzemple, se li ne memoras tion, kion li lernis en la tria klaso. Tiuj rompoj de la kontinueco en la vivo de la Spirito ĉesigas ĉiujn rilatojn kaj faras el li kvazaŭ ian novan estulon; el tio ni povas diri, ke niaj pensoj mortas ĉe ĉiu ekzistado kaj ne renaskiĝas, kaj sekve oni ne konscias, kio oni iam estis; tio estas ia neniigo.

A. K. — Demando post demando, vi kondukus min al la farado de kompleta kurso pri Spiritismo. Ĉiuj viaj kontraŭdiroj estas ja naturaj de la flanko de iu, kiu scias nenion, sed kiu per serioza studado trovas iun solvon multe pli eksplicitan ol tiu, kiun mi povus doni per mallonga klarigo, kiu siavice devas senĉese almovi novajn

demandojn. Ĉio interrilatas en Spiritismo, kaj kiam oni observas la tuton, tiam oni vidas, ke la principoj fluas unu de alia kaj sin reciproke apogas; kaj tiam, kio ŝajnis anomalio kontraŭa al la justeco kaj la saĝeco de Dio, tio montriĝas tute natura kaj konfirmas tiun justecon kaj tiun saĝecon.

Jen la demando rilata al la forgeso pri la pasinteco, kiu estas ligita al aliaj egale gravaj demandoj, kaj tial mi ĉi tie ĝin nur supraĵe pritraktas.

Ĉe ĉiu ekzistado ia vualo ja envolvas la pasintecon, tamen pro tio la Spirito perdas neniom el tio, kion li iam akiris al si: li forgesas nur la manieron, kiel li ĝin havigis al si. Uzante la komparon pri la koleĝiano, mi diras, ke por li ne gravas scii, kie, kiel kaj ĉe kiuj instruistoj li kursis la trian klason, se venante al la kvara klaso, li scias, kion oni lernas en la tria klaso. Kio grava ĝi estas al li, scii, ke li estis vergita pro sia maldiligenteco kaj ekribelo, se tiuj punoj faris lin laborema kaj obeema? En ĉi tiu maniero la Spirito, reenkarniĝante, kunportas, intuicie, kaj kiel denaskajn ideojn, ĉion, kion li lernis pri scienco kaj pri moraleco. Mi diras "pri moraleco", ĉar, se dum iu ekzistado li pliboniĝis, se li profitis el la lecionoj de la sperto, tiam, kiam li revenos, li estos per si mem pli bona; hardite en la forĝejo de sufero kaj laboro, li estos pli solida; anstataŭ devi ĉion rekomenci, li posedas fundon ĉiam pli riĉan, sur kiu li sin apogas por pluaj akiroj.

La dua parto de via kontraŭdiro, tuŝanta la neniigon de la pensado, ne staras sur pli bona bazo, ĉar tiu forgeso fariĝas nur dum la enkorpora vivo; forlasinte ĉi tiun, la Spirito ricevas la memoron pri sia pasinteco: li tiam povas juĝi pri la irita vojo kaj pri tiu ankoraŭ irota; ne ekzistas do ia rompo de la kontinueco en la spirita vivo, kiu estas la normala vivo de la Spirito.

La kelkatempa forgeso estas bonfaro de la Providenco; sperton oni akiras al si ofte per severaj elprovoj kaj teruraj pagoj, kies memoro estus tre suferiga kaj pliakrigus la turmentojn de la sortobatoj en la nuna vivo. Se la suferoj dum la vivo ŝajnas longaj, kio do estus al

ni, se al ili aldoniĝus la memoro pri la suferoj en la pasinteco? Vi ekzemple, sinjoro, hodiaŭ estas digna homo, sed vi tia estas tre verŝajne dnak'al la severaj punoj, kiujn vi ricevis pro la malbonfaroj, kiuj nun naŭzus al via konscienco; ĉu estus al vi agrabla la memoro, ke vi pro tio estis iam pendigita? Ĉu honto vin ne persekutus ĉe via penso, ke la mondo scias la malicaĵon, kiun vi faris? Kio do grava tio estas, kion vi eble faris kaj kion vi eble elportis por ĝin pagi, se nun vi estas estiminda homo! En la okuloj de la mondo vi estas nova homo kaj en la okuloj de Dio vi estas renobliĝinta Spirito. Sen la memoro pri ia ĝena pasinteco, vi agas pli libere; vi staras ĉe nova deirpunkto; viaj antaŭaj ŝuldoj estas pagitaj, koncernas vin ne fari al vi novajn.

Kiom da homoj dezirus same povi, dum la vivo, sterni ian vualon sur siaj unuaj jaroj! Kiom multaj, ĉe la fino de sia migrado, diris en sia animo: "Se mi devus rekomenci, mi ja ne farus, kion mi faris!" Nu, kion ili ne povas refari dum ĉi tiu vivo, tion ili refaros dum iu alia; ĉe iu nova ekzistado iliaj Spiritoj kunportos en formo de intuicio la bonajn decidojn, kiujn ili prenis. Jen kiel ŝtupo post ŝtupo fariĝas la progresado de la homaro.

Ni supozu ankaŭ — kio estas io tre ordinara —, ke inter viaj konatoj, inter viaj familianoj mem, iu donis al vi motivon por via plendo kontraŭ li, eble vin ruinigis aŭ nigrigis vian honoron en iu alia akzistado, kaj nun, pentinta Spirito, enkarniĝis en via medio, ligiĝis al vi kiel samfamiliano, por kompensi al vi, per sia sindoneco kaj korligiteco, la malutilojn, kiujn li faris kontraŭ vi: ĉu vi ne starus unu kontraŭ la dua en plej ĝena situacio, se vi ambaŭ memorus vian malamikecon? Anstataŭ kvietigi, la malamoj eterniĝus.

Vi el tio povas konkludi, ke la memoro pri la pasinteco malordigis la sociajn interrilatojn kaj malhelpus la progreson. Ĉu vi volas pri tio efektivan pruvon? Ni prezentu al ni, ke unu homo, kondamnita al punlaboroj, ekprenas la firman decidon fariĝi honesta: kio okazos ĉe lia liberiĝo? La socio lin repuŝos, kaj tia repuŝo preskaŭ ĉiam redronigas lin en la malvirton. Ni supozu, kon-

traŭe, ke neniu scias liajn antecedentojn: li do estos plaĉe akceptata; se li mem povus ilin forgesi, li pro tio ne estus malpli honesta kaj povus vivi, tenante la kapon alte anstataŭ klinite, sub la honto de la rememoro.

Ĉi tio absolute akordas kun la doktrino de la Spirit-
oj pri la mondoj superaj ol nia. En tiuj mondoj regas nur bono, la memoro pri la pasinteco estas neniel mal-
agraba; jen kial oni tie memoras sian antaŭan ekzist-
adon tiel same, kiel ni memoras tion, kion ni faris hie-
raŭ. Rilate la migradon, kiun oni eble faris en la mal-
superaj mondoj, la memoro pri ĝi estas tia sama, kiel
pri ia malbela sonĝo.

Rimedoĵ por konvinko

V. — Mi konsentas, sinjoro, ke el la vidpunkto filo-
zofia la spiritisma doktrino estas absolute racionala, ta-
men ĉiam restas la demando pri la manifestiĝoj, kiun nur
la faktoj povas solvi; nu, ĝuste la realecon de la faktoj
multaj homoj kontestas; vi do devus ne trovi miriga
la deziron, kiun oni esprimas, ilin atesti.

A. K. — Mi opinias ĝin tute natura, tamen, ĉar mi
penas, ke la faktoj estu profitaj, mi tial klarigas, kiujn
kondiĉojn oni devas kontentigi, por pli bone observi kaj
precipe por ilin kompreni; nu, kiu ne volas kontentigi
tiujn kondiĉojn, tiu ja ne serioze deziras instruiĝi, kaj
tiam estas senutile perdi sian tempon kun li.

Vi ja ankaŭ konsentos, sinjoro, ke io stranga tio
estus, se iu racionala filozofio elkoviĝus el iluziaj kaj
kontestebraj faktoj. Laŭ sana logiko la realeco de iu
efiko kuntrenas la realecon de ĝia kaŭzo; se unu estas
vera, la alia ne povas do esti malvera, ĉar, kie arbo tute
ne estas, tie oni povus rikolti nenian fruktojn.

Ne ĉiuj homoj, estas vero, povis konstati la faktojn,
ĉar ja ne ĉiuj kontentigis la kondiĉojn necesajn por ties
observado kaj al tio ne oferis la necesajn paciencon kaj
persiston. Sed ĉi tie okazas same, kiel en ĉiuj sciencoj:
kion unuj ne faras, tion faras aliaj; oni ĉiutage akceptas
la rezultaton de la astronomiaj kalkuloj, ilin ne farinte

mem. Kiel ajn ĝi estas, se vi trovas bona la filozofion, vi do povas akcepti ĝin, tiel same, kiel vi akceptus alian, rezervante vian opinion pri la vojoj kaj rimedoj, kiuj kondukis al ĝi, aŭ almenaŭ, akceptante ĉi tiujn nur kiel hipotezon ĝis plena konstato.

La rimedoj por konvinko ne estas unuj samaj por ĉiuj homoj; kio konvinkas unujn, tio neniel impresas aliajn: jen kial estas necese iom de ĉio. Sed estas eraro pensi, ke la sola rimedo por konvinko estas la fizikaj eksperimentoj. Mi vidis homojn, kiujn la plej frapantaj fenomenoj ne kapablis ŝanceli, kaj kiujn simpla respondo skribita konvinkis. Kiam oni vidas iun fakton, kiun oni ne komprenas, ju pli eksterordinara ĝi estas, des pli suspektinda ĝi aspektas, kaj tiam la menso tie ĉiam elserĉas ian kaŭzon ordinaran; se oni ĝin klarigas al si, oni ĝin pli facile akceptas, ĉar ĝi havas ian pravon de ekzisto: tio mirakleca kaj tio supernatura forviŝiĝas. Certe la klarigoj, kiujn mi ĵus donis al vi dum ĉi tiu konversacio, tute ne estas kompletaj; tamen, kiel ajn supraĵaj ili estas, mi estas konvinkita, ke ili instigos vin al pripensado, kaj se la cirkonstancoj havigas al vi okazon, por vidi kelkajn manifestiĝojn, vi ilin vidos per okuloj kun malpli da antaŭjuĝo, ĉar vi povos starigi rezonadon sur iu bazo.

Ekzistas du aferoj en Spiritismo, nome: la eksperimenta parto de la manifestiĝoj kaj la filozofia doktrino. Nu, ĉiutage vizitas min personoj, kiuj vidis nenion, sed kiuj kredas tiel solide, kiel mi, dank'al la sola studado, kiun ili faris pri la filozofia parto; laŭ ilia sento, la manifestiĝoj estas io akcesora, la fundo estas la doktrino, la scienco; ili vidas ĝin tiel granda, tiel racionala, ke ili en ĝi trovas ĉion, kio povas kontentigi iliajn animajn aspirojn, aparte de la manifestiĝoj mem; el tio ili konkludas, ke, eĉ ĉe la supozo, ke la manifestiĝoj ne ekzistas, tamen la doktrino estus ankoraŭ tiu, kiu plej bone solvas multegon da problemoj, kiujn oni opinias nesolveblaj.

Kiom da homoj diris al mi, ke tiuj ideoj ja ekĝermis en ilia cerbo, sed ĉio tie estis konfuza! Spiritismo ord-

igis, korpigis tiujn ideojn, kaj por tiuj homoj estis kva-zaŭ ia lumradio. Jen kio klarigas la nombron da adeptoj, kiujn varbis al ĝi la sola legado de **La Libro de la Spiritoj**. Ĉu vi opinias, ke tiel okazus, se oni restadus plu ĉe la turniĝantaj kaj parolantaj tabloj?

V. — Vi estis prava, sinjoro, dirante, ke el la turniĝantaj tabloj ekfontis filozofia doktrino, kaj mi tute ne imagis al mi la sekvojn, kiuj povus rezulti el afero, kiun oni rigardis kiel nuran scivolobjekton. Mi nun vidas, kiel vasta estas la kampo, kiun malfermis via sistemo.

A. K. — Ĉi tie mi interrompas vin, sinjoro; vi min tro honoras atribuante tiun sistemon al mi, ĉar ĝi ne al mi apartenas: ĝi tute elfluis el la instruado de la Spiritoj; mi vidis, observis, kunaranĝis, kaj penas komprenigi al la ceteraj homoj, tion, kion mi mem komprenas: jen el tio la tuta parto, kiu min koncernas. Inter Spiritismo kaj la ceteraj filozofiaj sistemoj ekzistas jena esenca diferenco, ke ĉi tiuj lastaj ĉiuj estas verko de pli aŭ malpli klarmensaj homoj, dum en tiu, kiun vi atribuas al mi, mi ne meritiĝas je la elpenso eĉ de unu sola principo. Oni diras: la filozofio de Platono, de Descartes, de Leibniz, sed oni tute ne diras la doktrino de Allan Kardec, kaj ĉi tio estas feliĉo, ĉar, kiom pezus ia nomo en tiel grava demando? Spiritismo havas helpantojn multe pli elstarajn, ĉe kies flanko ni estas nenio krom iaj atomoj.

Societo por la kontinuigo de la spiritismaj laboroj De Allan Kardec, Strato de Lille, 7.

V. — Vi havas societeton, kiu sin okupas pri ĉi tiuj studoj; ĉu mi povus esti ano de ĝi?

A. K. — Por la momento ja ne, ĉar se, por esti akceptata, oni ne bezonas esti doktoro de Spiritismo, oni tamen devas almenaŭ havi pri ĉi tiu afero ideojn pli solidajn ol la viaj. Ĉar la societo ne volas esti malordig-

ata en siaj studoj, ĝi tial ne povas akcepti homojn, kiuj igus ĝin perdi tempon por elementaj demandoj, kaj ankaŭ ne tiujn, kiuj, ne simpatiante ĝiajn principojn kaj konvinkojn, tumultigus ĝin per malĝustatempaj diskutoj aŭ per ia kontraŭemo. Ĝi estas societo scienca, kiel tiom da aliaj, kiu sin okupas pri la profunda studado de la diversaj punktoj de la spiritisma scienco kaj penas instrui ĝi; ĝi estas la centro, kien venas la informoj el ĉiuj flankoj de la mondo kaj kie ellaboriĝas kaj kunordiĝas tiuj demandoj, rilatantaj al la progresado de la scienco, sed ĝi ja ne estas ia lernejo aŭ kursejo de elementa instruado. Post kelka tempo, kiam via konvinkiteco ellaboriĝos per la studado, ĝi esploros, ĉu estas oportune enlasi vin. Vi dume povos maksimume ĉeesti unu aŭ du el ĝiaj kunsidoj kiel aŭdanto, se nur vi tie faros nenian rimarkon, kiu ofendus iun, alie mi kiu vin estus enkondukinta, riskus riproĉojn de miaj kolegoj, kaj ĝia perdo estus de tiam fermita al vi por ĉiam. Vi tie vidos kolekton da gravaj kaj bonsocietaj homoj, kies plimulto rekomendas sin pro la supereco de sia klereco kaj pro sia socia pozicio, kaj kiuj ne tolerus, ke tiuj, kiujn ĝi bonvolas akcepti, eĉ la plej malmulte dekliniĝu de la dececo; ĉar ne pensu, ke al siaj seancoj ĝi invitas la publikon kaj enlasas la unuan veninton. Ne farante elmontraĵojn, por kontentigi scivolulojn, ĝi ĉi tiujn zorge forpuŝas de si. Kiuj do pensus, ke ili tie trovus ian tempopasigilon kaj ian spektaklon, tiuj estus desapontitaj kaj pli bone farus tien ne irante. Jen kial ĝi rifuzas akcepti, eĉ kiel nurajn aŭdantojn, personojn, kiujn ĝi ne konas aŭ kies malamikaj sentoj kontraŭ la Doktrino estas ĉiekonataj.

Malpermeso de Spiritismo

V. — Unu lasta demando, mi petas. Spiritismo havas potencajn malamikojn: ĉu ili ne povus fari, ke oni malpermesu ĝian praktikadon kaj ĝiajn societojn, kaj, per ĉi tiu rimedo, ke ĉesu ĝia disvastiĝo?

A. K. — Tio estus la rimedo, por iom pli rapide perdi la ludon, ĉar perforto estas la argumento de tiuj, kiuj povas kontraŭmeti nenion valoran. Se Spiritismo estas ia ĥimero, ĝi falos per si mem sen la neceso de tia granda peno, kiun oni por tio donas al si; se oni ĝin persekutas, oni do ĝin timas, kaj oni timas nur ion seriozan. Se ĝi estas realaĵo, ĝi troviĝas, kiel mi jam diris, en la Naturo, kaj oni ne nuligas iun leĝon naturan per ia nura plumstreko.

Se la manifestiĝoj de Spiritoj estus privilegio de unu sola homo, tiam, forigante tiun homon, oni sendube metus finon al tiuj manifestiĝoj; bedaŭrinde por la kontraŭuloj, tiuj fenomenoj estas ia mistero por neniu: nenio sekreta, nenio kaŝita, ĉio okazas tagohele; ili estas al la dispono de ĉiuj kaj estas konataj ekde palacoj ĝis mansardoj. Oni povas malpermesi ilian plenumadon antaŭ la publiko, sed oni precize scias, ke ne antaŭ la publiko ili la plej bone fariĝas, sed en intima rondo; nu, ĉar ĉiu povas esti mediumo, tial, kiu povas malhelpi iun familion en sia domo, iun homon en la silento de sia kabineto, iun malliberulon en la karcero, komunikiĝi kun la Spiritoj sen la scio kaj antaŭ la nazo de la provosoj? Ni tamen konsentu, ke iu registaro estas sufiĉe forta, por malhelpi tiujn manifestiĝojn en sia lando: ĉu ĝi ilin malhelpus en la najbaraj landoj, en la tuta mondo, ĉar en nenia lando, en la du hemisferoj, ne ekzistas mediumoj?

Cetere Spiritismo havas sian fonton ne inter la homoj; ĝi estas faritaĵo de la Spiritoj, estuloj, kiujn oni povas nek bruligi, nek enkarcerigi. Ĝi konsistas en la individua kredo, sed ne en la societoj, kiuj estas neniel necesaj. Se oni sukcesus eldetruĝi ĉiujn spiritismajn librojn, la Spiritoj diktus ilin denove.

Per unu vorto, Spiritismo estas hodiaŭ plenumita fakto; ĝi gajnis sian lokon ĉe la publika opinio kaj inter la filozofiaj doktrinoj; tiuj, al kiuj ĝi ne konvenas, devas rezignacii, vidante ĝin ĉe ilia flanko, kaj restante tute liberaj ne ekirilati kun ĝi.

TRIA DIALOGO

LA PASTRO

Abato — Ĉu vi, sinjoro, permesus al mi miavice fari al vi kelke da demandoj?

A. K. — Jes, volonte, via abata moŝto, sed antaŭ ol respondi al vi, mi opinias utile konigi al vi la terenon, sur kiu mi intencas stari kune kun vi.

Mi antaŭ ĉio diru al vi, ke mi tute ne penos konverti vin al miaj ideoj. Se vi volas ilin detale koni, vi ilin trovos en la verkoj, kie ili estas pritraktitaj; tie vi povos ilin ne rapide studi, kaj vi estos libera ilin akcepti aŭ malakcepti.

Spiritismo celas batali kontraŭ la nekredemo kaj ties pereigaj sekvoj, prezentante evidentajn pruvojn pri la ekzisto de la animo kaj pri ties estonta vivo; ĝi do sin turnas al tiuj homoj, kiuj kredas nenion aŭ kiuj dubas la religiajn veraĵojn, kaj la nombro de tiaj estas granda, kiel vi scias; kiuj havas ian religian kredon kaj al kiuj **tiu kredo sufiĉas**, tiuj ne bezonas Spiritismon. Al homo, kiu diras: "Mi kredas la aŭtoritatecon de la Eklezio kaj mi tenas min je ĝiaj instruoj, nenion serĉante ekster ĉi tiuj", Spiritismo respondas, ke ĝi altrudas sin al neniu kaj devigas nenium konvinkiĝi pri ĝia vereco.

La libereco de konscienco estas sekvo de la libereco de pensado, kiu estas unu el la propraĵoj de la homo; Spiritismo kontraŭus siajn principojn pri karito kaj toleremo, se ĝi ne respektus ĉi tiun liberecon. En ĝiaj okuloj ĉia kredo, se nur sincera kaj ne instiganta malutili la proksimulon, estas respektinda, eĉ se erara. Se iun lia konscienco kondukus al la kredo, ke, ekzemple, tio estas la Suno, kiu rondiras ĉirkaŭ la Tero, ni dirus al tiu: "Kredu tion, se ĝi al vi plaĉas, ĉar tiu via kredo ne malhelpas, ke la Tero ja rondiras, ĉirkaŭ la Suno; tamen, same kiel ni ne penas perforti vian konvinkiĝon, tiel vi ne penu perforti aliulan. Se el iu kredo, per si mem senkulpa, vi faras ilon por persekutado, ĝi fariĝas malutila kaj povas esti kontraŭbatalata".

Jen, via abata moŝto, la normo de konduto, kiun mi tenadas kontraŭ la servantoj de la diversaj kultoj, kiuj venas al mi. Kiam ili demandis min pri kelkaj el la punktoj de la Doktrino, mi donis al ili la necesajn klarigojn, tute detenante min diskuti certajn dogmojn, pri kiuj Spiritismo tute ne zorgas, ĉar ĉiu juĝas libere; sed mi neniam iris propramove al ili, celante ŝanceli ilian kredon per ia ajn premo. Kiu venas al ni kiel frato, tiun ni akceptas frate; kiu nin repuŝas, tiun ni lasa trankvila. Jen la konsilo, kiun mi ne ĉesas doni al la spiritistoj, ĉar mi neniam konsentis kun tiuj, kiuj atribuas al si la mision konverti la klerikaron. Mi al ili ĉiam diras: "Semu en kampon de la nekredemaj, ĉar tie estas riĉa rikolto por fari."

Spiritismo sin ne altrudas, ĉar, kiel mi diris, ĝi respektas la liberecon de konscienco; ĝi cetere scias, ke ĉia altrudita kredo estas supraĵa kaj havigas nur la eksterajn de la fido, sed ne la fidon sinceran. Ĝi elvolvas siajn principojn antaŭ la okuloj de ĉiuj, en tia maniero, ke ĉiu povu fari al si iun opinion, plene konante la aferon. Tiuj, kiuj ilin akceptas, ĉu ekleziuloj, ĉu laikoj, agas libere, kaj tial, ke ili trovas tiujn principojn racionalaj, sed ni neniel koleras kontraŭ tiuj, ne opiniantaj same kiel ni. Se hodiaŭ ekzistas lukto inter la Eklezio kaj Spiritismo, nia konscienco diras, ke ne ni ĝin elmovis.

Pastro — Se la Eklezio, vidante elkoviĝi ian novan doktrinon, konstatas en ĉi tiu principojn, pri kiuj, en sia konscienco, ĝi pensas, ke ĝi devas ilin kondamni, ĉu vi do kontestas al ĝi la rajton ilin diskuti kaj kontraŭbatali, la rajton averti la fidelulojn kontraŭ io, kion ĝi konsideras eraroj?

A. K. — Ni neniel kontestas rajton, kiun ni postulas por ni mem. Se la Eklezio estus teninta sin en la limoj de la diskutado, nenio pli bona estus; sed legu la plimulton el la skribaĵoj, venintaj de ĝiaj anoj aŭ publikigitaj en la nomo de la religio, kaj el la faritaj predikoj, kaj vi tie vidos insulton kaj kalumnion, elbordigantajn el ili ĉiuj, la principojn de la Doktrino ĉie indignige kaj

malice falsitaj. Ĉu oni ne aŭdis el la predikseĝoj, ke la partianoj de tiu Doktrino estas malamikoj de la socio kaj de la publika ordo? Ĉu oni ne vidis la homojn, kiujn ĝi regajnis al la kredo, anatemitaj kaj elpelitaj de la Eklezio pro tio, ĉar estas preferinde esti nekredanto, ol kredi je Dio kaj je sia animo per Spiritismo? Ĉu oni ne resopiris la ŝtiparojn de la Inkvizicio, ke ili tie mortus? Ĉu en iuj lokoj oni ne montris ilin al la malamikemo de iliaj samlokanoj, ĝis ĉi tiuj ilin persekutis kaj insultis sur la stratoj? Ĉu oni ne ordonis al ĉiuj fideluloj foriĝi de ili, kvazaŭ de pestuloj; ĉu oni ne deadmonis servantojn dungi sin ĉe ili? Ĉu oni ne instigis edzinojn disiĝi de siaj edzoj, kaj edzojn de siaj edzinoj kaŭze de Spiritismo? Ĉu oni ne igis oficistojn perdi siajn servolokojn, ĉu oni ne forprenis de laboristoj la panon el ilia laboro, de mizeruloj tiun de la karito, ĉar ili estis spiritistoj?

Ĉu oni ne forpelis de iuj hospitaloj eĉ blindulojn, ĉar ili ne volis fornei sian kredon? Diru al mi, via abata moŝto, ĉu tio estas la lojala diskutado? Ĉu la spiritistoj iam repagis insulton per insulto, malbonon per malbono? Ne. Al ĉio ili kontraŭmetis serenecon kaj moderecon. La publika konscienco jam faris al ili tiun justaĵon, ke ne ili estas la atakintoj.

Pastro — Ĉiu saĝa homo bedaŭras tiujn ekscesojn, sed la Eklezio ne povus respondi por la ekscesoj de kelkaj el ĝiaj ne tre klarmensaj anoj.

A. K. — Mi konsentas, sed, ĉu la purpuruloj estas ne tre klarmensaj? Vidu la cirkuleron de la episkopo de Alĝero kaj kelke da aliaj. Ĉu ne iu episkopo ordonis la aŭtodafeon en Barcelono? Ĉu la supera eklezia aŭtoritato ne havas plenan povon super siaj subuloj? Se do li toleras predikojn ne indajn de la evangelia katedro, se li favoras la publikigon de insultoj kaj misfamigaj skribaĵoj kontraŭ iu klaso da civitanoj, se li ne kontraŭstaras al persekutoj, farataj en la nomo de la religio, li do ilin aprobas.

Resume: sisteme repuŝante la spiritistojn, revenantajn al ĝi, la Eklezio devigis ilin organiziĝi ekster ĝi;

dank'al la naturo kaj la malmodereco de siaj atakoj, ĝi pliampleksigis la diskutadon kaj ĉi tiun kondukis sur novan terenon. Spiritismo estis simpla filozofia doktrino, kaj jen ĝuste la Eklezio ĝin pligravigis, prezentante ĝin kiel timindan malamikon; ankaŭ la Eklezio, fine, proklamis ĝin ia nova religio. Tio estis mallertaĵo, sed la pasio ne rezonas.

Liberpensulo — Vi antaŭ nelonge parolis pri la libereco de la pensado kaj de la konscienco kaj asertis, ke ĉiu sincera kredo estas respektinda. La materialismo estas kredo tia sama, kiel ĉiu alia; kial do ĝi ne ĝuus tian saman liberecon, kian vi konsentas al ĉiuj ceteraj kredoj?

A. K. — Ĉiu certe estas libera kredi tion, kio al li plaĉas, aŭ kredi nenion ajn, kaj ni ne plipravigus iun persekuton kontraŭ iu, kiu kredas la nenion post la morto, ol kontraŭ iu defalinto de ia religio. Batalante kontraŭ la materialismo, ni atakas ne la individuojn, sed la doktrinon, kiu, se ĝi estas sendanĝera por la socio, kiam ĝi tenas sin en la profundo de la konscienco de klarmensaj homoj, tamen fariĝas ia socia kancero, se ĝi ĝeneraliĝas.

La kredo, ke ĉiu por la homo finiĝas post la morto, ke ĉia solidareco ĉesas kune kun la vivo, kondukas lin al tio, ke li konsideras ia moktrompo la oferon de sia nuna komforteco al la aliula bono; el tio la maksimumo: "Ĉiu por si dum la vivo sur la Tero, ĉar nenio transe estas". La karito, la frateco, per unu vorto la moralo havas nenian bazon, nenian pravon de ekzisto. Kial sin ĝeni, sin perforti, sin deteni de ia ĝuo hodiaŭ, se eble morgaŭ ni jam estos nenio? La neado de la estonteco, la sola dubo pri la estonta vivo estas la plej fortaj stimuloj de egoismo, fonto de la plej multaj mizerajoj de la homaro. Oni devas esti tre virta, por halti sur la deklivo de malvirto kaj krimo sen alia brido krom la forto de sia volo. La moktimo povas reteni la mondumanon, sed ne homon kiu tute ne timas la publikan opinionon.

Montrante la ĉiamecon de la rilatoj inter la homoj,

la kredo al la estonta vivo kreas inter ili solidarecon, kiu ne rompiĝas ĉe la tombo; ĝi tiel ŝanĝas la iradon de la ideoj. Se tiu kredo estus nenio krom ia vana timigilo, ĝi daŭrus nur kelkan tempon, sed ĉar ĝia realeco estas fakto akirita el la sperto, tial oni devas propagandi ĝin kaj batali kontraŭ la mala kredo, por la intereso mem de la socia ordo. Ĝuste tiel Spiritismo agas, kaj ja sukcese, ĉar ĝi havigas pruvon pri tiu vivo kaj, vere, la homo preferas esti certa, ke li vivos kaj povos vivi feliĉe en iu pli bona mondo, kompense por la mizerajoj de nia, ol kredi, ke li estos mortinta por eterne. La penso vidi sin por ĉiam neniiginta, opinii, ke filoj kaj karuloj estas senrevene perditaj, ridas al tre malmultaj, kredu al mi; jen kial la atakoj kontraŭ Spiritismo en la nomo de la nekredemo tiel malmulte sukcesas kaj eĉ momente ĝin ne ŝancelis.

Pastro — La religio ĉion ĉi instruas; ĝis hodiaŭ ĝi sufiĉis: kial do necesa ia nova doktrino?

A. K. — Se la religio sufiĉas, kial do ekzistas tiom da nekredemuloj laŭ la religia senco? La religio ĉion ĉi ja instruas al ni, vere; ĝi admonas nin kredi, sed kiom da homoj ne kredas el simpla aserto de alia! Spiritismo pruvas kaj elmontras tion, kion la religio instruas teorie. Cetere, de kie venas tiuj pruvoj? De la manifestiĝado de la Spiritoj. Nu, estas probable, ke la Spiritoj manifestiĝas nur kun la permeso de Dio; se do Dio favorokore sendas al la homoj tian helpon, por ilin preni for de nekredemo, forpuŝi tiun helpon estas ja malpiaĵo.

Pastro — Vi tamen ne malkonsentus, ke Spiritismo ne ĉe ĉiuj punktoj akordas kun la religio.

A. K. — Pro Dio, via abata moŝto! Ĉiuj religioj tion saman asertas: protestantoj, judoj, muzulmanoj, tiel same, kiel katolikoj. Se Spiritismo neus la ekziston de Dio, de la animo, de ties individueco kaj senmorteco, de la estontaj punoj kaj rekompencoj, de la libera volo de la homo; se ĝi instruas, ke ĉiu troviĝas en ĉi tiu mondo

sole nur por si kaj devas pensi sole nur pri si, ĝi do kontraŭus ne nur la religion katolikan, sed ankaŭ ĉiujn religiojn de la mondo; ĝi estus la neado de ĉiuj moralaj leĝoj, bazoj de la homa socio. Tute kontraŭe: la Spiritoj proklamas unu solan Dion, superege justan kaj bonan; ili diras, ke la homo havas liberecon de agado kaj respondas por siaj agoj, estas premiata aŭ punata laŭ la bono aŭ malbono, kiun li faris; ili super ĉiuj virtoj starigas la evangelian kariton kaj jenan superbelan regulon, instruitan de la Kristo: "Kiel vi volas, ke la homoj faru al vi, faru ankaŭ al ili tiel same." (*) Ĉu tio ne estas la fundamentoj de la religio? La Spiritoj faras pli: ili inicas nin en la misterojn de la estonta vivo, kiu por ni jam ne estas ia abstraktaĵo, sed realaĵo, ĉar tiuj mem, kiujn ni konis, venas pentri sian situacion, diri, kial kaj kial ili suferas aŭ estas feliĉaj. Kio tie estas kontraŭ-religia? Ĉu tiu certeco pri la estonteco, ke ni retrovos tiujn, kiujn ni amis, ne estas ja konsolo? Ĉu tiu grandiozeco de la spirita vivo, kiu estas nia esenco, komparata kun la mizeraj absorbaj zorgoj de la surtera vivo, ne estas taŭga, por altigi nian animon kaj por vigligi nin al la farado de bono?

Pastro — Mi konsentas, ke en la ĝeneralaj demandoj Spiritismo estas konforma al la grandaj veraĵoj de la Kristianismo, sed ĉu same estas koncerne la dogmojn? Ĉu ĝi ne kontraŭparolas iujn principojn, kiujn la Eklezio instruas al ni?

A. K. — Spiritismo estas antaŭ ĉio scienco, ne zorgas pri dogmaj demandoj. Kiel ĉiuj filozofiaj sciencoj, tiel ĉi tiu scienco havas moralajn sekvojn; ĉu tiuj sekvoj estas bonaj aŭ malbonaj? Oni povas ilin juĝi laŭ la ĝeneralaj principoj, kiujn mi ĵus rememorigis. Iuj personoj tute eraris pri la vera karaktero de Spiritismo. Ĉi tiu demando estas sufiĉe grava, por meriti iom vastan preparoladon. Ni unue faru komparon. Estante natura

(*) Luko, 6:31. — *La Trad.*

elemento, la elektro ĉiam ekzistis kaj ĉiam okazigis la efikojn, kiujn ni konas, krom multaj aliaj, kiujn ni ankoraŭ ne konas. Ne sciante la veran kaŭzon, la homoj klarigis tiujn efikojn en pli aŭ malpli stranga maniero. La eltrovo de la elektro kaj de ties proprecoj renversis multegon da absurdaj teorioj, prilumante plurajn misterojn de la Naturo. Kiel agis la elektro kaj ĝenerale la fizikaj sciencoj rilate certajn fenomenojn, tiel Spiritismo agis rilate alispecajn fenomenojn.

Spiritismo estas bazita sur la ekzisto de ia nevidebla mondo, konsistanta el senkorpaj estuloj, kiuj plenigas la spacon kaj kiuj estas neniuaj aliaj, ol la animoj de homoj, kiuj vivis sur la Tero, aŭ en aliaj mondoj, kie ili forlasis sian materian envolvajon. Ili estas la estuloj, kiujn ni nomas Spiritoj. Ili ĉiam staras apud ni, havas sur la homojn, sen ties konscio, grandan influon, ludas tie aktivan rolon en la morala mondo kaj eĉ, ĝis certa grado, en la mondo fizika. Spiritismo troviĝas do en la Naturo, kaj oni povas diri, ke ĉiamaniere ĝi estas ia potenco, same kiel la elektro el alia vidpunkto, kiel la gravito el ankoraŭ alia. La fenomenoj, kies fonto estas la nevidebla mondo, efektive okazis en ĉiuj tempoj, kaj tial ilin mencias la historio de ĉiuj popoloj. Nur, en sia neklereco, kiel pri la elektro, la homoj atribuis tiujn fenomenojn al pli aŭ malpli raciaj kaŭzoj kaj en ĉi tiu rilato donis liberan kuron al sia imagpovo.

Pli bone observata de tiam, kiam ĝi vulgariĝis, Spiritismo prilumas multegon da demandoj ĝis hodiaŭ nesolveblaj aŭ miskomprenitaj. Ĝia vera karaktero estas do tiu scienco, sed ne religio, kaj la pruvo de ĉi tio estas, ke inter ĝiaj aliĝintoj troviĝas homoj de ĉiaj kredoj, kiuj pro sia aliĝo ne rezignis siajn konvinkojn: fervoraj katolikoj, kiuj ĉiam ankoraŭ plenumas ĉiujn devojn de sia religio, se nur la Eklezio ilin ne forpuŝas, ĉiusektaj protestantoj, izraelidoj, muzulmanoj kaj eĉ budhistoj kaj bramanoj. Ĝi do staras sur principoj, dependantaj de nenia ajn dogma demando. Ĝiaj moralaj sekvoj iras tian saman linion kiel la Kristanismo, ĉar la Kristanismo estas el ĉiuj doktrinoj la plej spirita kaj plej pura, kaj tial

el ĉiuj religiuloj en la mondo la kristanoj la plej bone kapablas ĝin kompreni laŭ ĝia vera esenco. Ĉu oni ĝin riproĉus je tio? Ĉiu sendube povas fari al si el siaj opinioj ian religion, laŭplaĉe interpreti la konatajn religiojn, sed inter tion fari kaj starigi ian novan eklezion oscedas abismo.

Pastro — Ĉu vi tamen ne faras la elvokojn laŭ ia religia formulo?

A. K. — Ni certe portas ian religian senton ĉe la elvokoj kaj en niaj kunsidoj, sed ĉe tio ekzistas neniam rita formulo; por la Spiritoj la penso estas ĉio, la formo nenio estas. Ni vokas ilin en la nomo de Dio, ĉar ni kredas je Dio kaj scias, ke nenio fariĝas en ĉi tiu mondo sen Lia permeso kaj ke, se Dio ne permesas al ili veni, ili do ne venas; ni plenumas niajn laborojn kviete kaj enmemiĝe, ĉar tio estas kondiĉo necesa por la observoj, kaj ankaŭ tial, ĉar ni ja scias, ke oni devas respekti tiujn, jam ne vivantajn sur la Tero, kia ajn ilia stato, feliĉa aŭ malfeliĉa, en la mondo de la Spiritoj; ni alvokas la bonajn Spiritojn, ĉar, sciante, ke ekzistas inter ili bonaj kaj malbonaj, tial ni penas, ke ĉi tiuj lastaj sin trompe ne enmiksi en la komunikadojn, kiujn ni ricevas. Kion ĉio ĉi montras? Ke ni ne estas ateistoj, sed ĝi tute ne kuntrenas, ke ni estus iaj reformistoj.

Pastro — Nu, kion diras la Superaj Spiritoj, tuŝante la religion? Tiuj bonaj devas nin konsili, nin gvidi. Ni imagu, ke mi havas nenian religion: mi do deziras elekti unu el ili. Se mi pridemandos la Spiritojn: "Ĉu vi konsilas al mi fariĝi katoliko, protestanto, anglikano, kvakero, judo, mahometano aŭ mormonano", kion ili responddos?

A. K. — Ekzistas du konsiderendaj punktoj en la religioj: la principoj ĝeneralaj, komunaj al ili ĉiuj, kaj la principoj propraj al ĉiu. La unuaj estas tiuj, pri kiuj ni ĵus parolis; tiujn ĉiuj Spiritoj proklamas, kia ajn ilia rango. Rilate la duajn, la Spiritoj **vulgaraj**, mem ne mal-

bonaj, povas havi preferojn, opiniojn, povas rekomendi tian aŭ alian formon. Ili do povas stimuli la homojn pri certaj agoj, ĉu el persona konvinkiteco, ĉu tial, ke ili konservas la ideojn el la surtera vivo, ĉu el prudento, por ne teruri la timemajn mensojn. Ĉu vi kredas, ke ekzemple iu klera Spirito, eĉ Fénelon, parolante al muzulmano, mallerte dirus al li, ke Mahomet estas trompisto kaj ke li estos damnita, se li ne fariĝos kristano? Tia Spirito ja gardus sin tiel agi, ĉar li estus repuŝita.

La Superaj Spiritoj ĝenerale, kaj kiam ilin ne instigas ia aparta konsidero, ne zorgas pri detalajoj; ili diras sole nur jenon: "Dio estas bona kaj justa; Li volas nur bonon. La plej bona el ĉiuj religioj estas do tiu, kiu instruas nur tion konforman al la boneco kaj justeco de Dio; kiu pri Dio donas la ideon plej grandan, plej superbela, kaj Lin ne malaltigas atribuante al Li la mizerajojn kaj pasiojn de la homaro; kiu faras la homojn bonaj kaj virtaj, kaj instruas ilin ami ĉiujn kiel frat-ojn; kiu kondamnas ĉian malbonon, kiun oni faras al sia proksimulo; kiu ne rajtigas maljustaĵon sub ĉia ajn formo aŭ preteksto; kiu ordonas nenion kontraŭan al la senŝanĝaj leĝoj de la Naturo, ĉar Dio ne povas Sin mem kontraŭdiri; tiu, kies servantoj donas la plej bonan ekzemplon de boneco, karitemo kaj moraleco; tiu, kiu plej forte inklinas batali kontraŭ la egoismo kaj malplej flatas la fieron kaj la vantamon de la homoj; tiu, fine, en kies nomo oni faras malplej multe da malbono, ĉar bona religio povas esti preteksto por nenia malbono: ĝi al ĉi tiu devas lasi nenan pardonon malfermita, ĉu rekte, ĉu per interpreto. Esploru, juĝu kaj elektu."

Pastro — Mi pensas, ke iuj punktoj de la katolika doktrino estas kontestataj de tiuj Spiritoj, kiujn vi rigardas kiel superajn; mi eĉ pensas, ke tiuj punktoj estas eraraj; ĉu pri iu, kiu prave aŭ malprave konsideras tiujn punktojn sanktaj dogmoj kaj kiu do ilin observas, tia kredo povas, laŭ tiaj Spiritoj, malutili lian savon?

A. K. — Certe ne, se nur tia kredo lin ne deklinas de bonfarado, sed, kontraŭe, lin admonas al tio; aliflan-

ke, kredo, eĉ la plej solide bazita, lin evidente malutilus, se ĝi por li estus instigilo por fari malbonon, por ne esti karitema por sia proksimulo, se ĝi faras lin kruda kaj egoista, ĉar tiam li ne kondutas konforme al la leĝo de Dio, kaj Dio konsideras la penson antaŭ ol la agojn. Kiu kuraĝus aserti la malon?

Ĉu vi pensas, ke ekzemple por iu, kiu plene kredas je Dio, sed, kiu, en la nomo de Dio, farus agojn malhumanajn aŭ kontraŭ karito, lia fido lin tre utilis? Ĉu li ne estus des pli kulpa, ĉar li disponas je pli da rimedoj, por sin instrui?

Pastro — Ĉu do fervora katoliko, skrupule plenumanta la devojn de sia kulto, ne ricevas riproĉon de la Spiritoj?

A. K. — Ne, se tio estas por li demando de konscienco, se nur li ĝin faras sincere; jes, tute certe jes, se hipokrite kaj se li estas nur ŝajne pia.

La Superaj Spiritoj, havantaj kiel mision la progresadon de la homaro, leviĝas kontraŭ ĉiajn malbonuzojn, kiuj povas bridi tiun progresadon, kiaj ajn tiuj malbonuzoj kaj kiaj ajn la individuoj aŭ la klasoj de la socio, kiuj el ili profitas. Nu, vi ja ne malkonfesus, ke la religio ne ĉiam estis libera de malbonuzoj; se inter ĝiaj ekleziuloj kelkaj plenumas sian mision kun absolute kristana sindoneco, faras ĝin granda, bela kaj respektinda, vi tamen konsentas, ke ne ĉiuj ili ĉiam komprenis la sanktecon de sia pastrado. La Spiritoj vipas la malbonon ĉie, kie ĝi troviĝas; ĉu montri la ekscesajojn de la religio estas ĉi tiun ataki? Ĝi ne havas malamikojn pli grandajn, ol tiuj, kiuj defendas tiujn malbonuzojn, ĉar ĝuste tiuj malbonuzoj inspiras la penso, ke io pli bona povus ĝin anstataŭi. Se la religion minacus iu danĝero, oni devus por tio respondi tiujn, kiuj donas pri ĝi malveran ideon, farante el ĝi ian arenon de la homaj pasioj, kaj kiuj ekspluatas ĝin profite al sia ambicio.

Pastro — Vi diras, ke Spiritismo ne diskutas la dogmojn, tamen ĝi akceptas iajn aferojn, kontraŭbatal-

atajn de la Eklezio, kiel ekzemple la reenkarniĝon, la estadon de la homo sur la Tero pli frue ol Adamo; ĝi neas la eternecon de punoj, la ekziston de demonoj, la purgatorion, la fajron de la infero.

A. K. — Tiuj aferoj estas diskutataj jam de longe, kaj ne Spiritismo elmovis tiun diskuton; tio estas opinioj, el kiuj kelkaj estas debatataj de la teologio kaj kiujn juĝos la estonteco. Super ili ĉiuj staras granda principo, nome la bonfarado, kiu estas la plej alta leĝo, la nepra kondiĉo de nia estonteco, kiel pruvas la stato de la Spiritoj, kiuj komuniĝas kun ni. Tiel longe, ĝis por vi ne fariĝos lumo pri tiuj demandoj, kredu, se vi tion volas, la materiajn flamojn kaj torturojn se tio povas deteni vin fari malbonon: se ili efektive ne ekzistas, tiu kredo ja ne faras ilin realaj. Kredu, ke ni havas nur unu solan enkorpan ekzistadon, se tio al vi plaĉas: tio tamen ne malhelpas, ke vi renaskiĝos ĉi tie aŭ aliloke, se tio devas okazi kaj kontraŭ via volo; kredu, ke la mondo estas kreita per unu fojo en sesoble dudek kvar horoj, se vi tiel opinias: tio ne malhelpas, ke la Tero portas signitan en siaj geologiaj tavoloj la pruvon de io malsama; kredu, se vi volas, ke Josuo haltigis la sunon: tio ne malhelpas la Teron turniĝi; kredu, ke la homo estas sur la Tero nur de ses mil jaroj: tio ne malhelpas, ke la faktoj pruvas la neeblecon de tia difino. Kaj kion vi diros, se unu belan tagon tiu senemocia geologio per evidentaj postsignoj pruvas la pli fruan ekaperon de la homo, simile kiel ĝi pruvis tiom da aliaj aferoj? Kredu do ĉion, kion vi volos, eĉ je la diablo, se tia kredo povas fari vin bona, humana kaj karitema por viaj similuloj. Spiritismo, kiel doktrino morala, trudas nur unu aferon, nome la neceson fari bonon kaj tute ne fari malbonon. Ĝi estas observoscienca, kiu, mi ripetas, havas moralajn sekvojn, kaj tiuj sekvoj estas la jesigo kaj la pruvo de la grandaj principoj de la religio; koncerne la duarangajn demandojn, ĝi ilin lasas al la konscienco de ĉiu homo.

Via pastra moŝto bonvolu rimarki, ke kelkajn el tiuj malsame rigardataj aferoj, pri kiuj vi antaŭ momento parolis, Spiritismo ilin principe ne kontestas. Se vi estus

leginta ĉion, kion mi pri tio skribis, vi estus rimarkinta, ke ĝi simple donas al ili interpreton pli logikan kaj racian, ol la interpreto vulgara. Tiel, ekzemple, ĝi ne neas la ekziston de la purgatorio: ĝi, kontraŭe, pruvas ties neceson kaj justecon, kaj eĉ plue, ĝi tiun difinas. La infero estas priskribita, kvazaŭ ia grandega fajrejo, sed ja tiel ĝin komprenas la alta teologio? Ne, evidente; la altaj teologoj tute prave diras, ke tio estas ia figuro, ke la fajro, en kiu oni brulas, estas fajro morala, simbolo de la plej akraj doloroj.

Koncerne la eternecon de punoj, se estus farebla ia voĉdonado pri ĉi tiu punkto, por ekkoni la intiman opinion de ĉiu homo kapabla rezoni aŭ kompreni, eĉ ĉe tiuj plej religiemaj, tiam oni vidus, sur kiu flanko staras la plimulto, ĉar la ideo pri ia eterneco de torturoj estas la neado de la senlima kompatemeco de Dio.

Jen cetere, kion la spiritisma doktrino asertas en ĉi tiu rilato:

La daŭro de la puno dependas de la pliboniĝo de la kulpa Spirito. Kontraŭ li estas eldirata nenia kondamno por iu difinita tempo. Kion Dio postulas, por meti finon al la suferoj, tio estas la pento, la kulpelaĉeto kaj la kompenso de ofendoj, unuvorte, serioza, efektiva pliboniĝo kaj sincera reveno al bono. La Spirito estas do la absoluta decidanto de sia propra sorto; siajn suferojn li povas plidaŭrigi per sia obstinado en malbono, mildigi aŭ malplidaŭrigi per siaj klopodoj por fari bonon.

Ĉar la daŭro de iu puno dependas de la pento, tial sekvas, ke iu kulpa Spirito, kiu neniam pentus nek pliboniĝus, ĉiam suferus, kaj ke laŭ lia sento la puno estus eterna. La eterneco de punoj oni do devas kompreni ne laŭ la senco absoluta, sed laŭ la relativa.

Situacio propra al la malsupereco de la Spiritoj, estas tio, ke ili ne vidas la finon de sia situacio kaj pensas, ke ili suferos ĉiam: tio estas por ili puno. Sed de la momento, kiam ilia koro malfermiĝas al pento, Dio duonvidigas al ili radion da espero.

Ĉi tiu doktrino evidente estas pli konforma al la justeco de Dio, kiu punas tiel longe, dum oni persistas

en la malbono, kaj korfavoras, kiam oni ekiras la bonan vojon. Kiu ĝin imagis? Ĉu ni? Ne, sed la Spiritoj, kiuj ĝin instruas kaj pruvas ĝian verecon per la ekzemploj, kiujn ili ĉiutage elmetas antaŭ niaj okuloj.

La Spiritoj do ne neas la estontajn punojn, ĉar ili ja priskribas siajn proprajn suferojn, kaj tia bildo tuŝas nin pli forte, ol tiu de la ĉiamaj flamoj, ĉar tie ĉio estas absolute logika. Oni ja komprenas, ke tio estas ebla, ke tiel devas esti, ke tia situacio estas tute natura sekvo de la aferoj; la filozofia pensulo mem povas ĝin akcepti, ĉar tie nenio malplaĉas al la racio. Jen kial la spiritismaj kredoj rekondukis al bono multegon da homoj, eĉ materialistojn, kiujn la timo antaŭ la infero, tia, kia oni ĉi tiun pentras, ne tuŝis, ne deturnis de ilia sintenado.

Pastro — Se oni akceptas tiun vian rezonadon, ĉu vi ne pensas, ke la vulgarularo bezonas prefere frapantajn bildojn, ol ian filozofion, kiun ili ne komprenas?

A. K. — Jen eraro, kiu naskis pli ol unu materialiston aŭ almenaŭ deturnis de la religio pli ol unu homon. Venas momento, kiam tiuj bildoj jam ne frapas, kaj tiam la homoj, kiuj ne profunde observas la aferojn, ne akceptante unu parton, rifuzas la tuton, ĉar, ili diras: "Se oni instruis al mi, kiel nekontesteblan veraĵon, malveran aferon, se oni donis al mi ian imagon, ian figuron por la realaĵo, kiel do mi estu certa, ke la ceteraĵo estas pli vera?" Se, kontraŭe, la racio, krestante, havas nenion por malakcepti, la fido fortikiĝas. La religio ĉiam gajnos, sekvante la progresadon de la ideoj; se ĝi iam devis minaci falon, tiel estis tial, ke la homoj probable marŝis antaŭen, dum ĝi restis malantaŭe. Tiu eraras pri epoko, kiu pensas, ke oni hodiaŭ povas kondukadi la homojn per la timo antaŭ la demono kaj la eternaj turmentoj.

Pastro — Efektive, la Eklezio hodiaŭ rekonas, ke la materia infero estas figuro, sed tio ne esceptas la ekziston de la demonoj: sen ĉi tiuj, kiel do oni klarigus la influon de la malbono, io, kio ne povas veni de Dio?

A. K. — Spiritismo ne rekonas iajn demonojn, laŭ la ordinara senco de ĉi tiu vorto, sed ĝi akceptas la ekziston de la malicaj Spiritoj, kiuj ne estas pli dignaj ol tiuj kaj kiuj faras tiom same da malbono, enblovante pereigajn pensojn; estas nur tiu diferenco, ke ĝi diras, ke tiuj ne estas aparte starantaj estuloj, kreitaj por malbono kaj eterne sin dediĉantaj al malbono, iaj parioj de la Kreitaĵaro kaj ekzekutistoj de la homa genro; ili estas ja estuloj nemulte progresintaj, ankoraŭ neperfektaj, sed al kiuj Dio malfermas la estontecon. Pri ĉi tio ĝi akordas kun la greka katolika Eklezio, kiu akceptas la konvertiĝon de Satano, aludante al la revirtiĝo de la malicaj Spiritoj. Rimarku ankaŭ, ke la vorto **demono** implicas la ideon de malica Spirito nur laŭ la hodiaŭa senco, kiun oni donis al ĝi, ĉar la greka vorto **daimôn** signifas **genio, inteligento**. Iel ajn, oni nun ĝin komprenas nur en la malbona senco. Nu, akcepti la komunikadon kun malicaj Spiritoj estas ja rekoni principe la realecon de la manifestiĝoj de Spiritoj. Estas necese scii, ĉu nur tiuj solaj komuniĝas, kiel asertas la Eklezio, por motivi sian malpermeson je komunikado kun la Spiritoj. En ĉi tiu rilato mi alvokas la rezonadon kaj la faktojn. Se la Spiritoj, kiaj ajn ili estas, komuniĝas, tiel estas nur laŭ la permeso de Dio: ĉu oni akceptus en sia animo, ke Li tion permesas nur al la malicaj? Kiel do! dum Li al ĉi tiuj havigus plenan liberecon, por veni trompi la homojn, Li malpermesus al la bonaj veni kontraŭpezi tian agadon, nuligi iliajn pereigajn doktrinojn! Ĉu kredi, ke tiel estus, ne estus pridubi Lian potencon, Lian bonecon, kaj fari el Satano ian konkuranton de Dio? La Biblio, la Evangelio, la Patroj de la Eklezio plene rekonas la eblecon de komunikado kun la nevidebla mondo, kaj el tiu mondo la bonaj Spiritoj ne estas esceptitaj: kial do ĉi tiuj hodiaŭ estus eksterlasitaj? Cetere, akceptante la aŭtentikecon de iuj aĉaĵoj kaj komuniĝoj de sanktuloj, la Eklezio ĝuste tial forigas la ideon, ke oni havas aferon nur al la malicaj Spiritoj. Efektive, kiam komuniĝoj enhavas nur bonajn aferojn, kiam per ili estas predikataj nur la plej pura kaj plej alta evangelia moralo, la abnegacio, la neprofitamo kaj

la amo al la proksimulo; kiam per ili oni vipas la malbonon, kia ajn la farbo, per kiu ĝi sin ŝmiras, ĉu do estas racie pensi, ke la malbonulo tiel laboras por sia celo?

Pastro — La Evangelio instruas al ni, ke la anĝelo de mallumo, aŭ Satano, sin aliformas kvazaŭ anĝelon de lumo^(*), por delogi la homojn.

A. K. — Satano, laŭ Spiritismo kaj la opinio de multaj kristanaj filozofoj, estas ne ia reala estulo, sed la personiĝo de la malbono, simile kiel pasintatempe Saturno personigis la tempon. Tiun alegorian figuron la Eklezio rigardas laŭlitere: tio estas demando de opinio, kiun mi ne diskutos. Ni por momento konsentu, ke Satano estas reala estulo; la Eklezio tiel trograndigis lian potencon, celante semi teruron en la korojn, ke ĝi venis al tute mala rezultato, t. e. al la neniigo ne nur de ĉia timo, sed ankaŭ de ĉia kredo al lia persono, laŭ la proverbo: "Kiu volas tro multe pruvi, tiu pruvas nenion". Ĝi prezentas lin kiel eminente sagacan, lertan kaj ruzan, sed en la kadro de Spiritismo ĝi igas lin ludi rolon de ia stultulo aŭ mallertulo.

Ĉar la celo de Satano estas nutri la inferon per siaj viktimoj kaj forpreni de Dio la animojn, tial oni komprenas, ke li iras al tiuj, kiuj troviĝas en bono, por ilin faligi en malbonon, kaj ke por tio li aliĝas, laŭ tre bela alegorio, en anĝelon de lumo, t. e. ke li hipokritu, ŝajnigante virton; sed ke li lasas forgliti tiujn, kiujn li jam tenas en siaj ungegoj, jen kion oni ja ne komprenas. Tiuj, kiuj kredas nek je Dio, nek je sia animo, tiuj, kiuj malŝatas la preĝon kaj dronas en la malvirtoj, tiom, kiom eble, apartenas al li; jam nenion li bezonas fari, por ilin pli profunde enigi en la ŝlimon; nu, admoni ilin reveni al Dio, preĝi al ĉi Tiu, submeti al Ties volo, ilin stimuli rezigni la malbonon, montrante al ili la feliĉecon de la elektitoj kaj la plorindan sorton, kiu atendas la malbonulojn, tio estus ago de ia stultulo, ago pli mal-

^(*) Laŭ II Korintanoj, 11:14. — *La Trad.*

saĝa ol tio, se oni ellasus birdojn el kaĝo, pensante ilin poste rekapti.

Estas do en la doktrino de la ekskluziva komunik-igado de la demonoj memkontraŭaĵo, kiu frapas ĉiun saĝan homon; tial oni neniam iun konvinkus, ke la Spiritoj, kiuj rekondukas al Dio tiujn, kiuj Lin forneis, al bono, tiujn, kiuj faradis malbonon, Spiritoj, kiuj konsolas la afliktitojn, havigas viklecon kaj kuraĝon al la malfortaj; kiuj per la superbelego de siaj instruoj altigas la animon super la materialan vivon, tiuj estus satelitoj de Satano, kaj tial oni devas malpermesi ĉian rilaton kun la nevidebla mondo.

Pastro — La Eklezio malpermesas la komunikadon kun la Spiritoj de la mortintoj, ĉar tio estas kontraŭa al la religio, tion formale kondamnas la Evangelio kaj Moseo. Ĉi tiu lasta, kondamnante tian agadon, klare montras, kiel riproĉinda ĝi estas en la okuloj de Dio.

A. K. — Mi petas de vi pardonon; tiu malpermeso troviĝas nenie en la Evangelio, sed nur en la mosea leĝaro. Oni do devas scii, ĉu la Eklezio starigas la mosean leĝaron super la leĝaro evangelia, aŭ alivorte, ĉu ĝi estas pli juda ol kristana. Estas eĉ rimarkinde, ke el ĉiuj religioj tiu, kiu la plej malmulte oponas al Spiritismo, estas la juda, kaj ke kontraŭ la elvokoj ĝi ne faris uzon el la mosea leĝaro, sur kiu sin bazas la kristanaj sektoj. Se la bibliaj preskriboj estas la kodo de la kristana kredo, kial do malpermesi la legadon de la Biblio? Kion oni diru, se al iu civitano estus malpermesite studi la leĝaron de sia regno?

La malpermeso, ordonita de Moseo, havis tiam sian pravon de ekzisto, ĉar tiu hebrea leĝdonanto volis, ke lia popolo rompu kun ĉiuj kutimoj, kiujn ili faris al si ĉe la egiptoj kaj el kiuj tiun, nun pritraktatan, ili misuzadis. Oni ne elvokadis la mortintojn pro la respekto kaj korinklino al ili, nek kun pia sento; tio estis ia divenrimedo, objekto de hontinda komercado, ekspluatata de la ĉarlatanismo kaj superstiĉo: Moseo estis do prava, ĝin malpermesante. Kontraŭ tiu misuzado li eldiris se-

veran verdikton, ĉar li bezonis rigorajn rimedojn, por regi tiun sendisciplinan popolon; tial la mortpuno abundis en lia leĝaro. Oni erare sin apogas sur la severeco de la puno, por pruvi la gradon da kulpeco de elvokado de la mortintoj.

Se la malpermeso elvoki la mortintojn, venis de Dio mem, kiel pretendas la Eklezio, tiam ankaŭ Dio ordonis la mortpunon kontraŭ la krimintoj. La puno havas do originon tiel sanktan, kiel la malpermeso: kial oni ĝin ne konservis? Moseo eldonis ĉiujn siajn leĝojn en la nomo kaj laŭ la ordono de Dio. Se oni kredas, ke Dio estas ilia aŭtoro, kial do ili ne estas plu observataj? Se la leĝaro de Moseo estas Sankta dogmo pri unu artikolo, kial do ne pri ĉiuj? Kial peti ĝian helpon pri tio, kion oni bezonis, kaj ĝin forpuŝi ĉe tio nekonvena? Kial oni ne obeas ĉiujn ĝiajn preskribojn, inter kiuj estas la cirkumcido, al kiu Jesuo sin submetis kaj kiun li ne aboliciis?

En la mosea leĝaro estis du partoj: — 1-a, la leĝo de Dio, mallonge prezentita sur la Sinajaj tabeloj; tiu leĝo restis plu, ĉar ĝi estas dia, kaj la Kristo ĝin simple nur disvolvis; 2-a, la leĝo civila aŭ disciplina, alkonformigita al la tiutempaj moroj kaj kiun la Kristo forstrekis.

Hodiaŭ la cirkonstancoj jam ne estas tiaj samaj, kaj la malpermeso de Moseo jam havas nenian pravon de ekzisto. Cetere, se la Eklezio malpermesas la elvokadon de la Spiritoj, ĉu ĝi malhelpas ilin veni ne vokite? Ĉu oni ĉiutage ne vidas, trafatajn de ĉiaspecaj manifestiĝoj de Spiritoj, homojn, kiuj neniam sin okupis pri Spiritismo, kaj ĉu same oni ne vidis homojn ĉe tiuj manifestiĝoj, longe antaŭ ol oni parolis pri Spiritismo?

Ankoraŭ unu kontraŭdiraĵo: se Moseo malpermesis, ke oni elvoku la Spiritojn de la mortintoj, la Spiritoj povas do veni, alie lia malpermeso estus vana. Se ili povis veni en lia tempo, ili do povas veni ankoraŭ hodiaŭ; se ili estas la Spiritoj de la mortintoj, ili do ne estas sole nur demonoj. Antaŭ ĉio oni devas esti logika.

Pastro — La Eklezio ne neas, ke bonaj Spiritoj povas komunikiĝi, ĉar ĝi rekonas, ke la sanktuloj manifest-

iĝas, tamen ĝi ne povas rigardi kiel **bonajn** tiujn, kiuj kontraŭdiras ĝiajn neŝanĝemajn pricipojn. La Spiritoj diras, ke ekzistas estontaj punoj kaj rekompencoj, sed ili tiujn pentras malsame ol ĝi; nur ĝi sola povas juĝi iliajn asertojn kaj distingi inter bonaj kaj malbonaj.

A. K. — Jen la granda demando. Galileo Galilei estis akuzita kiel herezulo kaj inspirato de la demono, ĉar li malkaŝis leĝon de la Naturo, kiu pruvis la erarecon de iu kredo, tiam rigardata kiel neatakebla, kaj tial li estis komdamnita kaj ekskomunikita. Se la Spiritoj estus pri ĉiuj punktoj opiniintaj tiel same, kiel la Eklezio, se ili ne estus proklamintaj la liberecon de la konscienco kaj kondamnintaj certajn malbonuzojn, ili estus kore akceptitaj kaj oni ilin ne estus alnominta demonoj.

Ankaŭ tio estas la kaŭzo, kial ĉiuj religioj, kiel la muzulmanoj, tiel ankaŭ la katolikoj, kredante sin ekskluzivaj posedantoj de la absoluta vero, konsideras verko de la demono ĉian doktrinon ne absolute ortodoksan laŭ ilia vidpunkto. Nu, la Spiritoj ne renversas la religion, sed, same kiel Galileo Galilei, malkaŝas novajn leĝojn de la Naturo. Se iuj dogmoj suferas de tio, tiel estas, ĉar, simile al la kredo pri la rondirado de la Suno, ili kontraŭas tiujn leĝojn. Estas necese scii, ĉu iu kredartikolo povas nuligi leĝon de la Naturo, kiu estas verko de Dio, kaj ĉu, post la akcepto de tiu leĝo, ne estas pli saĝe interpreti la dogmon konforme al la leĝo, anstataŭ atribui ĉi tiun al la demono.

Pastro — Ni flanken metu la demandon pri la demonoj; mi ja scias, ke ĝi estas diverse interpretata de la teologoj; kio ŝajnas al mi pli malfacile akordigebla kun la dogmoj, tio estas la doktrino pri la reenkarneco, ĉar ĝi ja estas nenio alia, ol la renaskita metempsikozo, de Pitagoro.

A. K. — Nun ne estas oportuna momento, por diskuti demandon, kiu postulos longan paroladon; vi ĝin trovos pritraktita en "La Libro de la Spiritoj" kaj en

"La Evangelio laŭ Spiritismo" (*) tial mi ĉi tie diros pri ĝi nur iajn kelke da vortoj.

La metempsikozo, kiel ĉe la antikvuloj, konsistis en la transmigrado de la animo de la homo en la bestojn, kio kuntrenis ian malaltigon. Cetere tiu doktrino ne estis tio, kion oni ordinare prezentas al si. La transmigrado en la bestojn estis rigardata ne kiel ia kondiĉo esence propra al la naturo de la homa animo, sed kelkatempa puno; tiel ekzemple la animoj de la murdintoj eniradis en la korpojn de la sovaĝbestoj, por tie ricevi sian punon; tiuj de la malĉastaj en la porkojn kaj aprojn; tiu de la ŝanĝanimaj kaj ventkapaj en la birdojn; tiuj de la mallaboremaj kaj malkleraj en la akvovivajn bestojn. Post miloj da jaroj, pli aŭ malpli longe laŭ la kulpeco, en tiu speco de malliberejo, la animo revenadis en la homaron.

La enkarniĝo kiel animalo ne estis do nepre necesa kondiĉo; ĝi povis esti kiel homo, kaj la pruvo pri ĉi tio estas, ke la puno de la timemaj viroj estis ilia transiĝo en virinajn korpojn submetitajn al malestimo kaj ofendoj ⁽¹⁾. Ĝi estis pli timigilo por la simpluloj, ol dogmo ĉe la filozofoj. Same kiel oni diras al la infanoj: "Se vi estos malbonaj la lupoj vin manĝos". La antikvuloj diris al la krimuloj: "Vi fariĝos lupoj". Hodiaŭ oni diras al ili: "La diablo vin prenos kaj vin portos en la inferon".

La plureco de la ekzistoj, laŭ Spiritismo, estas tute malsama ol tiu de la metempsikozo, ĉar ĝi ne kredas al reenkariniĝo de la homa animo en bestoj eĉ ne kiel puno. La Spiritoj instruas, ke la animo ne retroiras, sed ke ĝi senĉese progresas. Ĝiaj pluraj enkorpoj ekzistadoj efektiviĝas en la homeco; ĉiu ekzistado estas por ĝi plia paŝo antaŭen sur la vojo de la intelekta kaj morala progreso, kio estas tute alia afero. Ne povante akiri plenan el-

(*) Vd. en *La Libro de la Spiritoj* n-roj 166 kaj sekvantaj, 222, 1010; en *La Evangelio laŭ Spiritismo* la Ĉap. IV kaj V. — *Noto de la Aŭtoro*.

(1) Vidu en *La plureco de la ekzistadoj de la animo*, de Pezzani.

volviĝon en unu sola ekzistado ofte tre mallongigita de akcidentoj, la animo ricevas de Dio la permeson daŭrigi en nova enkarniĝo la taskon, kiun ĝi ne povis plenumi, aŭ rekomenci tion, kion ĝi malbone faris. La kulpelaĉetado dum la enkorpora vivo konsistas en la ĉagrenoj, kiujn oni tiam suferas.

Pri la demando ĉu la plureco de la ekzistadoj estas aŭ ne estas kontraŭa al iaj dogmoj de la Eklezio, mi diros nur:

El du aferoj nur unu estas vera, aŭ la reenkarnekiĝo ekzistas aŭ ĝi ne ekzistas; se ĝi ekzistas, ĝi estas en la leĝoj de la Naturo. Por pruvi, ke ĝi ne ekzistas, estas necese pruvi, ke ĝi estas kontraŭa, ne al la dogmoj, sed al tiuj leĝoj, kaj ke oni povus trovi iun alian, kiu klarigus pli precize kaj pli logike la aferojn, kiujn nur ĝi povas solvi.

Cetere, estas facile demonstri, ke iuj dogmoj trovas en ĝi racian klarigon, kiu faras ilin tute akcepteblaj por la homoj, ilin rifuzintaj pro nekomprene. Ne temas do pri detruado, sed pri interpretado; ĉi tio poste efektiviĝos per la forto de la okazontaĵoj mem. Kiuj ne volas akcepti la interpretadon, tiuj estos tute liberaj, kiel ili estas por kredi hodiaŭ, ke la Suno rondiras ĉirkaŭ la Tero. La ideo pri la plureco de la ekzistadoj disvastiĝas kun mirinda rapideco, dank'al sia fortega logikeco kaj al sia konformeco kun la justeco de Dio. Kiam ĝi estos rekonita kiel natura veraĵo kaj agnoskita de ĉiuj, kion tiam faros la Eklezio?

Resume, la reenkarnekiĝo ne estas ia sistemo elpensita por la bezonoj de iu afero, nek ia persona opinio; ĝis estas aŭ ne estas fakto. **Se estas demonstrite, ke iuj ekzistantaj aferoj estas tute neeblaj sen la reenkarnekiĝo, estas nepre necese akcepti, ke ili estas sekvo de la reenkarnekiĝo;** sekve, se ĝi estas en la Naturo, ĝin ne povas nuligi ia kontraŭa opinio.

Pastro — Laŭ la diro de la Spiritoj, ĉu tiuj nekredantaj al ili kaj al iliaj manifestiĝoj, estas malpli favorataj en la estonta vivo?

A. K. — Se tiu kredo estus nepre necesa al la savo de la homoj, kio fariĝus al tiuj, de kiam la mondo ekzistas, kiuj ne havis rimedojn por ĝin posedi, kaj al tiuj, kiuj ankoraŭ dum longa tempo mortos sen ĝi? Ĉu Dio povus fermi al ili la pordon de la estonteco? Ne; la nin instruantaj Spiritoj estas pli logikaj; ili diras al ni: Dio estas suverene justa kaj bona, kaj ne lasas la estontan sorton de homo en dependeco de kondiĉoj ekster lia volo. La Spiritoj ne diras: "**Ekster Spiritismo, nenia savo**", sed kiel la Kristo: "**Ekster karito, nenia savo**".

Pastro — Permesu do al mi diri, ke, se la Spiritoj instruas nur la principojn de la moralo, kiun ni trovas en la Evangelio, mi ne vidas la utilecon de Spiritismo, ĉar ni povis nin savi antaŭ ĝi kaj povas ankoraŭ sen ĝi. Ne estus tiel nur se la Spiritoj venus por instrui al ni grandajn novajn veraĵojn, iajn principojn, kiuj ŝanĝus la supraĵon de la mondo, kiel faris la Kristo. Almenaŭ la Kristo estis sola, lia doktrino estis nur unu, dum la Spiritoj estas miloj kaj kontraŭdiras unuj aliajn; unuj diras "blanka", aliaj "nigra"; el kio sekvas, ke iliaj partianoj ekde la komenco jam formas plurajn sektojn. Ĉu ne estus plibone lasi la Spiritojn trankvilaj, kaj teni nur tion, kion ni jam posedas?

A. K. — Vi faras la eraron, sinjoro, ne eliri el via vidpunkto, kaj rigardi la Eklezion kiel unikan mezurilon de la homa scio. Se la Kristo diris la veron, Spiritismo ne povus diri ion alian, kaj anstataŭ ĵeti sur ĝin ŝtonojn, oni devus ĝin akcepti kiel potencon helpanton por konfirmi per ĉiuj voĉoj de la transmondo la fundamentajn verojn de la religio, funde rompitaĵoj de nekredemo. Oni facile komprenas, ke la materialismo ĝin batalas; sed ke la Eklezio aliĝu al la materialismo kontraŭ ĝi, estas malpli kompreneble. Tute senlogike ankaŭ estas, ke la Eklezio deklaras demona iun instruadon apogitan sur la sama aŭtoritateco kaj proklamantan la dian mision de la fondinto de Kristianismo.

Sed ĉu la Kristo ĉion diris? Ĉu li povis ĉion malkaŝi? Ne, ĉar li mem diris: "Mi havus ankoraŭ multon por diri

al vi, sed vi ĝin ne komprenus, tial mi parolas per paraboloj." Spiritismo venas hodiaŭ, kiam la homo estas matura por lin kompreni, kompletigi kaj klarigi tion, kion la Kristo intence nur tuŝetis aŭ nur diris en alegoria formo. Sendube vi diros, ke la zorgo pri tiu klarigo apartenas al la Eklezio. Sed al kiu el ili? Ĉu al la roma, al la greka, aŭ al la protestanta Eklezio? Tial ke ili ne akordiĝas, ĉiu klarigus laŭ sia maniero kaj postulus por si la privilegion de la vereco. Kiu el ili regroupigus ĉiujn apartajn kultojn? La saĝeco de Dio, antaŭvidante, ke la homoj tien metus siajn pasiojn kaj antaŭjuĝojn, ne volis konfidi al ili la taskon de tiu nova revelacio; Li komisiis la Spiritojn, Liajn mesaĝistojn, ke ili ĝin proklamnu sur ĉiuj punktoj de la terglobo, kaj ekster ĉiu aparta kulto, ke ĝi servu al ĉiuj, kaj neniu povu deturni ĝin al sia profito.

Pri alia aspekto, ĉu la diversaj kristanaj kultoj neniel deflankiĝis de la vojo strekita de la Kristo? Ĉu liaj moralaj reguloj estas ĉiam skrupuleme respektataj? Ĉu oni ne falsis liajn parolojn por apogigi sur ilin la ambicion kaj la homajn pasiojn, kiajn liaj vortoj kondamnas? Nu, per la voĉo de la Spiritoj senditaj de Dio, Spiritismo venas admoni al la strikta plenumado de liaj reguloj tiujn de ili deflankiĝintajn. Ĉu ne estas ĉefe ĉi tiu lasta motivo, kiu igas iujn homojn vidi en ĝi satanan laboron?

Malprave vi donas la nomon de **sektoj** al kelkaj malegalecoj de opinioj koncerne la spiritismajn fenomenojn. Ne estas mirinde, ke en la komenco de iu scienco, kiam por multaj la observado estis ankoraŭ nekompleta, estis aperintaj interkontraŭaj teorioj; sed tiuj teorioj temas pri detaloj, ne pri la fundamenta principo. Tiuj diferencoj povas formi **skolojn**, kiuj klarigas certajn faktojn laŭ sia maniero, sed ili ne estas sektoj, same kiel diferencaj sistemoj, kiujn partoprenas niaj scienculoj en la naturaj sciencoj, — en medicino, en fiziko k. a. — ne estas sektoj. Forsteku do la vorton "**sekto**", kiu neniel taŭgas por la afero, pri kiu ni parolas. Cetere, ekde la origino de Kristianismo, ĉu ĝi mem ne naskigis amason da sektoj? Kial la parolo de la Kristo ne estis sufiĉe

potenca por trudi silenton al ĉiuj debatoj? Kial ĝi taŭgas por interpretadoj, kiuj dividas ankoraŭ hodiaŭ la kristanojn en malsamajn Ekleziojn, ĉiu el ili asertanta posedi sola la vero necesan al la savo, forte abomenantajn unuj aliajn kaj sin reciproke anatemantajn en la nomo de ilia dia majstro, kiu predikis nur amon kaj kariton? La malforteco de la homoj, vi diros. Jes; kial vi volas, ke Spiritismo venku subite tiun feblecon kaj transformu la homaron kvazaŭ per sorĉo?

Mi venas al la demando pri utileco. Vi diras, ke Spiritismo instruas al ni nenion novan; ĉi tio estas eraro: ĝi instruas multon al tiuj, kiuj ne haltas sur la surpraĵo. Se ĝi estus nur instruinta la maksimumon: "**Ekster karito, nenia savo**", kiu unuigas la homojn, anstataŭ: "Ekster la Eklezio, nenia savo", kiu ilin disigas, ĝi estus markinta novan epokon por la homaro.

Vi diras, ke oni povus vivi sen ĝi; mi konsentas; same kiel oni povis vivi sen multaj aliaj sciencaj eltrovoj. La homoj fartis ankaŭ tute bone antaŭ la eltrovo de ĉiuj novaj planedoj; antaŭ ol ni scipovis kalkuli la eklipsojn, antaŭ ol oni konis la mikroskopan mondon kaj cent aliajn aferojn; por vivi kaj kreskigi sian tritikon la kamparano ne bezonas scii kio estas kometo, tamen neniu neas, ke ĉiuj tiuj aferoj plivastigas la rondon de la ideoj kaj ebligas al ni pli progresi en la ekkono de la naturaj leĝoj. Nu, la mondo de la Spiritoj estas unu el tiuj leĝoj, kiujn Spiritismo igas nin koni; ĝi instruas nin pri la influado de la mondo de la Spiritoj sur la enkorpan mondon; ni supozu, ke tie limiĝas ĝia utileco, ĉu jam ne estus multo la malkaŝo pri tia potenco?

Ni atentu nun ĝian moralan influon. Ni konsentu, ke nenion novan ĝi instruas en tiu senco; kiu estas la plej granda malamiko de religio? La materialismo, ĉar la materialismo kredas al nenio; nu, Spiritismo estas la neo de materialismo, kiu jam ne havas pravon de ekzisto; kaj ne per simpla rezonado, ne per blinda fido oni diras al la materialisto, ke ĉio ne finiĝas kun lia korpo, sed per faktoj; oni montras al li, oni igas lin tuŝi per la fingro kaj vidi per la okulo. Ĉu tio estas malgranda

servo farata de ĝi al la homaro, al la religio? Sed tio ne estas ĉio: la certeco pri la estonta vivo, la vivanta bildo de tiuj nin antaŭintaj, montras la bezonon de la bono kaj la neeviteblajn sekvojn de la malbono; tial ĝi gvidas rekte al la religiaj ideoj, ilin elvolvigas ĉe tiuj, kiuj ilin ne havas, ilin fortigas ĉe tiuj ne firme konvinkitaj, kvankam ĝi mem ne estas iu religio.

La religio trovas do en ĝi apogon, ne por tiuj homoj mallarĝmensaj, kiuj vidas la tutan religion en la doktrino de la eterna fajro, pli en la litero, ol en la spirito, sed por tiuj, vidantaj ĝin laŭ la grandeco kaj majestato de Dio.

Unuvorte, Spiritismo grandigas kaj altigas la ideojn; ĝi batalas kontraŭ la malbonoj kreataj de egoismo, avideco, ambicio; sed kiu kuraĝus defendi tiujn malbonojn kaj sin deklari ties probatalantoj? Se ĝi ne estas nepre necesa al la savo, ĝi faciligas ĉi tiun, ĉar ĝi nin pli firmigas sur la vojo de la bono. Cetere, kiu saĝa homo aŭdacus aserti, ke ia malĝusteco de ortodokseco estas pli riproĉinda en la okuloj de Dio, ol ateismo kaj materialismo? Mi faras la jenajn difinitajn demandojn al ĉiuj atakantoj de Spiritismo pro religiaj sekvoj:

1.e Kiu estas malpli preparata por la estonta vivo, ĉu tiu kredanta al nenio, aŭ tiu kredanta la ĝeneralajn veraĵojn, sed ne akceptanta iujn partojn de la dogmo?

2.e Ĉu la protestanto kaj skismano estas tiel malaprobataj kiel la ateisto kaj la materialisto?

3.e Kiu ne estas ortodoksa laŭ la rigora senco de la vorto, sed faras ĉian bonon laŭ sia povo, estas bonkora, indulgema por sia proksimulo, lojala en siaj sociaj rilatoj, ĉu tiu estas malpli sekura pri sia savo ol iu, kiu kredas al ĉio, sed estas malmolkora, egoista kaj senkarito?

4.e Kio pli valoras en la okuloj de Dio: ĉu la praktikado de la kristanaj virtoj sen la devoj de la ortodokseco, aŭ la praktikado de ĉi tiuj sen tiu moralo?

Mi respondis, Sinjoro Abato, viajn demandojn kaj kontraŭdirojn, sed, kiel mi diris en la komenco, sen ia intenco vin gvidi al miaj ideoj kaj ŝanĝi viajn konvinkojn, celante nur igi vin rigardi Spiritismon sub ĝia vera vidpunkto. Se vi ne estus veninta al mi, mi certe ne estus serĉinta vin. Ĉi tio ne volas diri, ke mi malŝatus vian aliĝon al niaj principoj, se ĝi devus efektiviĝi, tute ne; ni estas feliĉaj, kontraŭe, pro ĉiuj farataj akiroj, des pli, ĉar ili ĉiuj estas liberaj kaj volontaj. Ni ne nur ne havas iun ajn rajton trudi niajn ideojn al iu, sed ni havas skrupulon por ne malserenigi la konsciencan de tiuj havantaj kredon, kiu ilin kontentigas kaj tial ne venas spontanee al ni.

Ni diris, ke la plej bona maniero por sin instrui pri Spiritismo estas studi unue ĝian teorion; poste venos nature faktoj kaj oni ilin komprenos en kiu ajn ordo la cirkonstancoj ilin prezentos.

Niaj publikigaĵoj celas faciligi tion studon; kaj ni konsilas ilian legadon laŭ la jena ordo:

La unua legaĵo estas ĉi tiu resumo, kiu prezentas kune ĉiujn pli elstarajn punktojn de tiu scienco; per ĝi oni jam povas havi ian ideon pri la afero kaj konvinkiĝi, ke en ĝi estas io serioza. En ĉi tiu rapida raporto ni klopodis por montri la punktojn, kiuj meritas atenton de la observanto. Nescio pri la fundamentaj principoj kondukas al eraraj konkludoj la plimulton el tiuj, kiuj juĝas aferon, kiun ili ne komprenas, aŭ taksas ĉion laŭ siaj antaŭjuĝoj.

Se ĉi tiu unua resumo donas al la observanto la deziron scii pli multe, li legos "La Libron de la Spiritoj", kie la principoj de la Doktrino estas plene klarigitaj; poste "La Libron de la Mediumoj" por la eksperimentado kiel gvidlibro de tiuj, kiuj deziras mem eksperimenti, kaj tiuj, dezirantaj kompreni la fenomenojn. Poste sekvas la diversaj verkoj elvolvantaj la aplikadon kaj la konsekvencojn de la Doktrino, t. e. "La Evangelio laŭ Spiritismo", "La Ĉielo kaj la Infero laŭ Spiritismo" k. a.

La **Revue Spirite** iel estas kurso de ties aplikado

dank'al la multenombraj ekzemploj kaj elvolviĝoj teoriaj kaj eksperimentaj en ĝi troveblaj.

Ni havas plezuron doni parole la necesajn klarigojn al seriozaj personoj, kiuj havas antaŭstudojn, sed bezonas klarigojn pri punktoj, kiujn ili ne plene komprenis.

ĈAPITRO II

Elementaj principoj de Spiritismo

ANTAŬRIMARKOJ

1. Erare oni supozas, ke vidi eksterordinarajn fenomenojn sufiĉas por konvinki iajn nekredantojn. Ne kredante je la ekzisto de animo aŭ Spirito en la homo, ili ne povas akcepti ĝin ekster la homo; sekve, neante la kaŭzon, ili neas ankaŭ la efikon. Ili venas preskaŭ ĉiam kun antaŭjuĝo kaj nea partiece, kiuj malebligas al ili fari seriozan, senpartian observadon. Ili prezentas demandojn kaj kontraŭdirojn, al kiuj ne estas eble tuj kaj kontentige respondi, ĉar por ĉiu aparta persono estus necese fari specialan kurson kaj preni ĉion de la komenco. La antaŭstudo respondas tiujn kontraŭdirojn, kies plej granda parto fondiĝas sur la nescio pri la kaŭzo de la fenomenoj kaj pri la kondiĉoj en kiuj ili efektiviĝas.

2. Kiuj ne konas Spiritismon, tiuj opinias, ke oni produktas la spiritismajn fenomenojn tiel same kiel oni faras eksperimentojn de Fiziko kaj Ĥemio. Tial ili volas submeti la fenomenojn al sia volo kaj ne submetiĝas al kondiĉoj necesaj al ties observado. Ne kredante en principo je la ekzisto de la Spiritoj, aŭ ne konante ilian naturon nek ilian agmanieron, tiuj kondukas kvazaŭ ili agus sur krudan materion; kaj ĉar ili ne ricevas tion, kion ili postulas, ili konkludas, ke ne ekzistas Spiritoj.

Lokante sin sur alian vidpunkton, oni komprenas, ke la Spiritoj estas la animoj de la homoj kaj post nia morto ni mem estos Spiritoj kaj ni ne volonte akceptos la taskon fariĝi ludilo por kontentigi la fantazion de scivoluloj.

3. Kvankam certaj fenomenoj povas esti de ni instigataj, ili tamen venas de liberaj inteligentuloj, kiuj neniam estas sub absoluta dispono de iu ajn. Kiu fanfaronus ricevi tiajn fenomenojn laŭ sia plaĉo, montrus nescion aŭ malbonan fidon. Estas necese ilin atendi, ilin kapti kiam ili preterpasas, kaj ofte en momento, kiam oni tute ne atendas, efektiviĝas la plej interesaj kaj konvinkantaj faktoj. Kiu volas serioze instruiĝi devas do en tio, kiel en ĉio alia, havi paciencon kaj persistemon por fari ĉion necesan, alimaniere estas preferinde por li tute ne okupiĝi pri la temo.

4. Ne ĉiam la kunvenoj por ricevi manifestiĝojn de Spiritoj estas en bonaj kondiĉoj por atingi kontentigajn rezultojn aŭ por konduki al konvinko; kaj ni devas konsenti, ke el iuj kunsidoj la nekredantoj eliras eĉ malpli konvinkitaj ol ili eniris. Al tiuj, kiuj parolas al ili pri la serioza karaktero de Spiritismo, ili rakontas la ofte ridindajn aferojn, kiujn ili ĉeestis. Ili ne estas pli logikaj ol tiu, kiu juĝus iun arton per iuj ekzercaĵoj de lernanto, iun personon per lia karikaturo, aŭ iun tragedion per ĝia parodio. Spiritismo ankaŭ havas siajn lernantojn; kiu volas instruiĝi ne ĉerpas ĉiujn informojn el unu sola fonto; nur per ekzamenado kaj komparado oni povas firmigi sian juĝadon.

5. La frivolaj kunvenoj havas gravan malutilon por la novuloj ilin ĉeestantaj, ĉar ili donas al tiuj falsan ideon pri la karaktero de Spiritismo. Kiuj nur ĉeestis tiajn kunvenojn, tiuj ne povas akcepti serioze aferon, kiu estas traktata kun frivoleco de tiuj samaj homoj, kiuj sin deklaras ties adeptoj. Per antaŭa studo ili lernos juĝi la signifon de tio, kion ili vidas, kaj distingi inter la bono kaj la malbono.

6. La sama rezonado aplikiĝas al la homoj, kiuj juĝas Spiritismon laŭ iuj ekztravagancaj verkoj, kiuj donas pri ĝi nur nekompletan kaj ridindan ideon. La serioza Spiritismo ne respondas por tiuj, kiuj malbone ĝin komprenas aŭ malsaĝe praktikas, same kiel la poezio ne res-

pondas por la faranto de malbonaj versoj. Estas bedaŭrinde, ke tiaj verkoj ekzistas, oni diras, ĉar ili malutilas la veran scienccon. Sendube estus preferinde, ke ekzistus nur bonaj verkoj; sed la pli granda eraro estas ĉe tiuj, kiuj ne penas ĉion studi. Cetere, al ĉiuj artoj, al ĉiuj sciencoj okazas la samo; ĉu ne estas pri ĉiuj plej seriozaj aferoj traktatoj absurdaj kaj plenaj de eraroj?

Kial Spiritismo havus ian privilegion kontraŭ mistraktatoj, precipe en la komenco? Se ĝiaj kritikantoj ne ĝin juĝus laŭ la ŝajnoj, ili sciuz kion ĝi akceptas kaj kion ĝi rifuzas, kaj ne akuzus ĝin pri tio, kion ĝi forpuŝas pro la racio kaj la spertado.

Pri la Spiritoj

7. La Spiritoj neniel estas, kiel oni ofte supozas, estuloj apartaj en la kreado; ili estas la animoj de la homoj vivintaj sur la Tero aŭ en aliaj mondoj, nur senigitaj el sia korpa envolvajo. Kiu kredas al la ekzisto de la animo postvivanta la korpon, tiu kredas sekve ankaŭ al la ekzisto de la Spiritoj; nei la Spiritojn estus nei la animon.

8. Ordinare oni havas tute eraran ideon pri la stato de la Spiritoj. Ili ne estas, kiel kelkaj opinias, malprecizaj, nedifinitaj estuloj, nek flamoj kiel la erarlumoj, nek fantomoj kiel en la rakontoj pri reaperantoj. Ili estas estuloj similaj al ni, havantaj korpon kiel la nia, sed fluidecan kaj nevideblan en sia normala stato.

9. Kiam la animo estas kunigita kun la korpo, dum la vivo, ĝi havas duoblan envolvajon: unu estas peza, maldelikata kaj detruoble, kiu estas la korpo; la dua, fluideca, malpeza, nedetruoble, nomata perispirito.

10. Estas do en la homo tri esencaj partoj; 1.e la **animo** aŭ **Spirito**, la inteligenta principo, kie loĝas la penso, la volo kaj la morala sento; 2.e la **korpo**, materia envolvajo, kiu metas la Spiriton en rilatoj kun la ekstera

mondo; 3.e la **perispirito**, fluideca, malpeza envolvajo, kiu funkcias kiel ligilo inter la Spirito kaj la korpo.

11. Kiam la ekstera envolvajo estas eluzita kaj ne povas plu funkcii, ĝi falas kaj la Spirito seniĝas de ĝi, kiel la frukto el sia ŝelo, la arbo el sia basto, la serpento el sia felo, unuvorte, kiel oni demetas malnovan veston eluzitan: ĉi tion oni nomas **morto**.

12. La morto estas la detruo nur de la materia envolvajo; la animo ĝin forlasas same kiel la papilio lasas la kokonon; sed ĝi konservas sian fluidecan korpon aŭ perispiriton.

13. La morto de la korpo liberigas la Spiriton el la envolvajo, kiu lin alligis al la Tero kaj lin suferigis; kiam liberigita el tiu ŝarĝo, li havas nur sian eterecan korpon, kiu permesas al li trakuri la spacon kaj transpaŝi la distancojn kun la rapideco de la penso.

14. La unuiĝo de la animo, de la perispirito kaj de la materia korpo formas la **homon**; la animo kaj la perispirito aparte de la korpo konsistigas la estulon nomatan **Spirito**.

Rimarko. La animo estas do estulo simpla; la *Spirito*, estulo *duobla*, kaj la *homo* estas estulo *triobla*. Estus do pli ĝuste rezervi la vorton *animo* por nomi la intelligentan principon, kaj la vorton *Spirito* por la estulo duonmateria, formata per tiu principo kaj la fluideca korpo. Sed ĉar oni ne povas koncepti la intelligentan principon izolita de ĉia materio, nek la perispiriton ne animita de la inteligenta principo, la vortoj *animo* kaj *Spirito* ordinare estas uzataj kvazaŭ sinonimoj. Ĝi estas la figuro, kiu konsistas en diro de la parto por esprimi la tuton, kiel oni diras, ke iu urbo estas loĝata de tiom da animoj, iu vilaĝo havas tiom da fajrujoj; sed en filozofio estas necese fari distingon.

15. Envestitaj en la materiaj korpoj, la Spiritoj konsistigas la homaron aŭ la korpan videblan mondon; eliĝintaj el tiuj korpoj, ili formas la spiritan mondon aŭ nevideblan mondon, kiu loĝas en la spaco kaj en kies

medio ni vivas, neniel pri ĉi tio suspektante, same kiel ni vivas en medio de la malgrandegaj estuloj pri kies ekzisto ni neniam konsciis antaŭ la invento de mikroskopo.

16. La Spiritoj ne estas do abstraktaj estuloj senformaj kaj nedifinitaj, sed konkretaj kaj ĉirkaŭlimigitaj, kiuj ne similas al la homoj nur tial, ke ili ne estas videblaj; sekve se en iu momento la vualo, ilin kaŝanta al nia vido, povus esti levita, ili formus por ni tutan loĝantaron nin ĉirkaŭantan.

17. La Spiritoj havas ĉiujn perceptojn, kiujn ili havis sur la Tero, sed en pli alta grado, ĉar iliaj kapabloj ne estas malakrigitaj de la materio. Ili havas sensaĵojn, kiujn ni ne konas: ili vidas kaj aŭdas aferojn, kiujn niaj limigitaj sensoj ne permesas al ni vidi aŭ aŭdi. Por ili ne ekzistas mallumo, escepte nur de tiuj, kies puno estas dumtempe resti en mallumo. Ĉiuj niaj pensoj atingas ilin, kaj ili legas nian menson kvazaŭ ĝi estus nefermita libro; tiel ni ne povas kaŝi al Spirito tion, kion ni kaŝus kiam li estis enkarniĝinta (**La Libro de la Spiritoj**, n-ro 237).

18. La Spiritoj estas ĉie: ili estas inter ni, ĉe niaj flankoj, nin tuŝante kaj senĉese observante. Per sia konsstanta ĉeesto en nia medio, la Spiritoj estas agentoj de diversaj fenomenoj; ili ludas gravan rolon en la morala mondo, kaj inter certaj limoj ankaŭ en la fizika mondo; ili estas tiel unu el la potencoj de la naturo.

19. De kiam oni konscias pri la postvivo de la animo aŭ Spirito, racie oni kredas ankaŭ la postvivon de la korinklinoj; sen ĉi tio la animoj de niaj parencoj kaj de niaj amikoj estus por ĉiam perditaj por ni.

Ĉar la Spiritoj povas iri ĉien, estas ankaŭ logike pensi, ke tiuj, kiuj nin amis dum la surtera vivo, nin amas ankaŭ post la morto, ke ili venas al ni, deziras komunikiĝi kun ni kaj ke ili utiligas la rimedojn je sia dispono por manifestiĝi al ni; ĉi tion konfirmas la sperto.

Efektive la sperto provas, ke la Spiritoj konservas

la seriozajn amojn, kiujn ili havis sur la Tero, ke al ili plaĉas reveni al siaj amatoj, precipe kiam ili estas al-tirataj per la pensoj kaj amaj sentoj al ili de ni send-ataj, dum ili estas indiferentaj al tiuj, kiuj ne interes-iĝas pri ili.

20. La celo de Spiritismo estas konstati kaj studi la manifestiĝojn de la Spiritoj, iliajn kapablojn, ilian situacion feliĉan aŭ malfeliĉan, kaj ilian estontecon; unu-vorte, la konadon de la spirita mondo. Kiam pruvitaj tiuj manifestiĝoj, el ili rezultas la nediskutebla pruvo de la ekzisto de la animo, de ties vivado post la morto de la korpo, de ĝia individueco ekster la korpo, tio estas de la estonta vivo; ĝi estas sekve la neado de la materialismaj doktrinoj, jam ne per rezonado sed per faktoj.

21. Ideo pli-malpli ĝenerala ĉe la personoj ne kon-antaj Spiritismon, estas kredi, ke la Spiritoj, nur tial ke ili eliris el la materio, devas ĉion scii kaj posedi la super-egan saĝecon. Ĉio tio estas grava eraro.

Ĉar la Spiritoj estas nur la animoj de la homoj, ili ankoraŭ ne atingis la perfektecon kiam ili forlasis la teran envolvajon. La progreso de la Spirito plenumiĝas nur kun longa tempo, kaj nur iom post iom li seniĝas el siaj neperfektaĵoj kaj akiras la sciojn, al li mankantajn.

Estus tiel mallogike pensi, ke la Spirito de unu so-vaĝulo aŭ de krimulo fariĝus subite klera kaj virta, kiel estus kontraŭa al la justeco de Dio pensi, ke li restus eterne en sia malsupereco.

Same kiel estas homoj en ĉiuj gradoj da klereco kaj malklereco, da boneco kaj maliceco, tiel estas ankaŭ ĉe la Spiritoj. Unuj estas nur ventkapaj kaj petolemaj, aliaj estas mensogemaj, trompemaj, hipokritaj, malicaj, venĝemaj; aliaj, kontraŭe, posedas la plej sublimajn virt-ojn kaj klerecon en grado nekonata sur la Tero. Tiu diverseco en la kvalitoj de la Spiritoj estas unu el la plej gravaj kaj konsiderindaj punktoj en la studado de Spi-ritismo, ĉar ĝi klarigas la bonan aŭ malbonan karakteron de la ricevataj komunikaĵoj; oni devas plej zorgeme sin dediĉi al la distingado de tiuj kvalitoj en la komunikaĵ-

oj. (**La Libro de la Spiritoj**, n-ro 100, **Spirita Skalo. Libro de la Mediumoj**, Ĉap. XXIV.)

Komunikiĝoj kun la nevidebla mondo

22. Post la akcepto de la ekzisto, la postvivo kaj la individueco de la animo, Spiritismo simpliĝas je unu sola ĉefa demando: **Ĉu la komunikiĝoj inter la animoj kaj la vivantoj estas eblaj?** Jes, kaj tiu ebleco estas rezultato de spertado. Starigitaj kiel fakto la rilatoj inter la mondoj videbla kaj nevidebla, kaj konataj la naturo, la kaŭzo kaj la maniero de tiuj interrilatoj, nova kampo malfermiĝis al la observado kaj estas akirita la ŝlosilo por tuta amaso da problemoj; ĝi estas samtempe potenca moraliga elemento dank'al la malapero de ĉiu dubo pri la estonteco.

23. Kio ĵetas en la penson de multaj homoj la dubon pri la ebleco de la komunikaĵoj el la transtombo, tio estas la falsa ideo, kiun ili havas, pri la stato de la animo post la morto. Oni ordinare imagas ĝin kvazaŭ ia blovo, ia fumaĵo, io nedefinita, kiun la penso ne klare kaptas, kiu elvaporiga kaj foriras oni ne scias kien, sed tiel malproksimen, ke oni apenaŭ povas kompreni, ke ĝi kapblus reveni sur la Teron. Kontraŭe, se oni konsideras ĝin en ĝia unueco kun fluideca, duonmateria korpo, kun kiu ĝi formas konkretan kaj individuan estulon, tiam ĝiaj rilatoj kun la vivantoj havas nenion kontraŭan al la racio.

24. Ĉar la mondo videbla vivas en la medio de la nevidebla mondo, kun kiu ĝi estas en konstanta kontakto, tiuj du mondoj reagis unu sur la duan. De kiam ekzistas homoj, ekzistas Spiritoj, kaj se ĉi tiuj havas la povon manifestiĝi, ili ĉi tion faris en ĉiuj epokoj kaj ĉe ĉiuj popoloj. Tamen en la lastaj tempoj la manifestiĝoj atingis grandan elvolviĝon kaj akiris pli fortan karakteron de aŭtentikeco, ĉar estis en la plano de Dio fini la kanceron de nekredemo kaj de materialismo per evidentaj pruvoj, permesante al tiuj, kiuj forlasis la Teron, reveni por

atesti sian ekziston, kaj malkaŝi al ni sian feliĉan aŭ malfeliĉan situacion.

25. La rilatoj inter la mondo videbla kaj la nevidebla povas esti kaŝitaj aŭ evidentaj, spontaneaj aŭ instigataj.

La Spiritoj agas sur la homojn kaŝite per la pensoj, kiujn ili sugestias kaj per iuj influoj; aŭ en maniero evidenta per efikoj percepteblaj por la sensoj.

La spontaneaj manifestiĝoj efektiviĝas neatendite kaj senprezare; ofte ili okazas ĉe la personoj plej fremdaj al la spiritismaj ideoj kaj kiuj, pro tio, ne povas ilin kompreni kaj tial ilin atribuas al supernaturaj kaŭzoj. Tiuj instigataj efektiviĝas pere de iuj personoj naturdotitaj de specialaj kapabloj al kiuj oni donas la nomon de **mediumoj**.

26. La Spiritoj povas manifestiĝi en diversaj manieroj: per vidado, aŭdado, tuŝado, bruoj, movado de objektoj, skribado, desegnado, muziko k. a.

27. Kelkafoje la Spiritoj manifestiĝas spontanee per bruoj kaj per batataj frapoj; ofte tio estas rimedo por sciigi sian aleston kaj voki atenton pri si, same kiel unu persono frapas por averti, ke tie estas iu. Iuj ne limiĝas al moderaj bruoj, sed faras bruegon similan al tiu de rompata vazaro, de pordoj, kiuj malfemiĝas kaj fermiĝas, aŭ de mebloj, kiujn oni renversas, iuj faras veran perturbon kaj efektivajn detruojn. (**Revue Spirite**, 1858: **La frapanta Spirito el Bergzabern**, p. 125, 153, 184. — **La Sama**, 1860: **La panisto de Dieppe**, p. 76. — **La sama. La fabrikanto de Sankta Petersburgo**, p. 115. — **La Sama. La ĉifonisto de Strato de Noyers**, p. 236).

28. Kvankam nevidebla por ni en sia normala stato, la perispirito estas ia etereca materio. La Spirito povas, en certaj okazoj, submetigi ĝin al ia molekula ŝanĝado, kiu faras ĝin videbla kaj eĉ tuŝebla; tiele efektiviĝas la aperoj. Tiu fenomeno ne estas pli eksterordinara ol tiu de la vaporoj, kiu estas nevidebla kiam ĝi estas tre mal-

densigita, sed fariĝas videbla, kiam ĝi estas densigita.

La Spiritoj, kiuj montriĝas videblaj, prezentiĝas preskaŭ ĉiam sub la sama aspekto, kiun ili havis dum la vivo, kaj kiu rekonigas ilin.

29. La vidado konstanta kaj ĝenerala de la Spiritoj estas tre malofta, sed la okazaj aperoj estas pli oftaj, precipe en la momento de la morto. La liberiĝinta Spirito ŝajne rapidas por viziti siajn parencojn kaj amikojn, kvazaŭ por averti ilin, ke li ĵus forlasis la Teron, kaj por diri al ili, ke li tamen daŭre vivas. Ĉiu esploru siajn rememorojn kaj oni vidos kiom da aŭtentikaj okazoj de tiu speco, kiujn oni ne atentis, efektiviĝis ne nur en la nokto, dum la dormo, sed en plena tago kaj dum la plej vigla maldormo. Iam oni rigardadis tiujn faktojn kvazaŭ supernaturaj kaj mirindaj, kaj oni atribudis ilin al magio kaj sorĉarto: hodiaŭ la nekredantoj rigardas ilin kiel imagaĵon; sed post kiam la spiritisma scienco donis al ni ilian ŝlosilon, oni scias kiel ili efektiviĝas kaj ili jam ne eliras el la ordo de la naturaj fenomenoj.

30. Per helpo de sia perispirito la Spirito agadis sur sian vivantan korpon; ĝi estas ankoraŭ per tiu sama fluido, ke li manifestiĝas kaj agadas sur inertan materion, produktas bruojn, movas tablojn kaj aliajn objektojn, kiujn ili levas, renversas aŭ transportas. Tiu fenomeno havas nenion surprizigan, se oni konsideras, ke inter ni la plej potencaj motoroj troviĝas en la maldensaj kaj eĉ nepeseblaj fluidoj, kiel la aero, la vaporo, la elektro.

Ĝi estas ankaŭ per helpo de sia perispirito, ke la Spirito igas la mediumojn skribi, desegni aŭ paroli. Ne havante mem tuŝeblan korpon por materie agi, kiam li volas manifestiĝi, la Spirito uzas la korpon de mediumo, kies organojn li prunteprenas kaj uzas kvazaŭ ili estus lia propra korpo; ĉi tion li faras per la fluideca emanajo, kiun li verŝas sur ĝin.

31. En la fenomeno konata per la nomo de **tabloj movantaj** aŭ **parolantaj tavoloj**, per sama rimedo la Spi-

rito agas sur la tablon aŭ por ĝin movi sen ia difinita signifo, aŭ por frapi batojn inteligentajn signante la literojn de la alfabeto por formi vortojn, en la fenomeno nomata **tiptologio**. La tablo tiam estas nur instrumento, kiun li utiligas, same kiel la kraĵono por skribi; li donas al ĝi momentan vivoforton per la fluido, kiun li enigis en ĝin, sed **li neniel identiĝas kun la tablo**. La personoj kiuj, en sia kortuŝiteco enbrakigas la tablon, kiam per ĝi manifestiĝas iu kara al ili, agas tre ridinde, ĉar tio estas same kiel se ili enbrakigus bastonon per kiu amiko frapus batojn. Tiuj personoj agas same kiel aliaj, kiuj alparolas la tablon kvazaŭ la Spirito estus enfermita en la ligno, aŭ se la ligno estus fariĝinta la Spirito.

Kiam la komunikiĝoj efektiviĝas per tiu rimedo, oni devas imagi la Spiriton, ne en la tablo, sed apud ĝi, **tiel kiel li estus dum sia vivo**, kaj tia, kian oni lin vidus en tiu momento, se li povus fariĝi videbla. La samo okazas ĉe la komunikaĵoj per la skribado; oni vidas la Spiriton apud la mediano, gvidantan lian manon, aŭ transdirantan al li sian penson per iu fluideca fluo.

Kiam la tablo forlasas la teron kaj naĝas en la spaco sen ia apogilo, la Spirito ne levas ĝin per forto de la brako, sed li envolvas kaj penetrigas ĝin per ia speco de fluideca atmosfero, kiu nuligas la gravitforton, kiel la aero faras ĉe la balonoj kaj la kajtoj. La fluido ĝin penetranta donas al ĝi dum momento pli grandan specifan malpezecon. Kiam ĝi estas sur la tero, ĝi estas en stato analoga al tiu de pneŭmatika kloŝo sub kiu oni faras la vakuon. Ĉi tiuj estas nur komparoj por montri la analogion de la efikoj kaj ne absoluta simileco de la kaŭzoj.

Kiam la tablo persekutas iun, ne la Spirito kuras post li; tiu povas resti trankvile sur la sama loko, sed li donas al ĝi impulson per iu fluideca fluo, per kies helpo li movas ĝin laŭ sia volo.

Kiam batoj estas aŭdataj en la tablo aŭ en alia loko, ne la Spirito frapas ĝin per sia mano aŭ per iu objekto; li sendas sur la lokon de kiu venas la bruoj ĵetaĵojn de fluido, kiu faras la efekton de elektra bato. Li modifas la bruon kiel oni povas modifi la sonojn produktatajn en la aero.

Post tio dirita, oni komprenas, ke ne estas pli malfacile por la Spirito **levi iun personon** ol levi tablon, transporti objekton de unu loko en alian aŭ ĝin ien ĵeti; tiuj fenomenoj produktiĝas laŭ la sama leĝo.

32. Per tiuj malmultaj vortoj oni povas vidi, ke la spiritismaj manifestiĝoj, de iu ajn karaktero, enhavas nenion supernaturan, aŭ miraklan. Tiuj estas fenomenoj, kiuj okazas laŭ la leĝo reganta la interrilatojn de la mondo videbla kun la mondo nevidebla, leĝo tiel natura kiel tiuj de elektro, de gravitado k. a. Spiritismo estas la scienco, konatiganta al ni tiun leĝon, kiel meĥaniko konatigas al ni la leĝon de la movado, la optiko, tiun de la lumo. La spiritaj manifestiĝoj apartenas al la naturo kaj okazis en ĉiuj epokoj; konata la leĝo, kiu ilin regas, ni havas klarigon pri tuta amaso da problemoj, antaŭe rigardataj kiel nesolveblaj; ĝi estas ŝlosilo por multo da fenomenoj ekspluatataj kaj pligrandigataj de la superstiĉo.

33. Tute formetita la miraklo, nenio en tiuj fenomenoj kontraŭas al racio, ĉar tiuj fenomenoj samrangiĝas kun la aliaj naturaj fenomenoj. Dum la tempo de malklereco, oni konsideris supernaturaj ĉiujn efikojn, kies kaŭzon oni ne konis. La eltrovaĵoj de la scienco iom post iom mallarĝigis la cirklon de la miraklo; la ekkono de tiu nova leĝo ĝin reduktas al nenio. Kiuj akuzas Spiritismon revivigi la mirindaĵon, tiuj pravas per la akuzado mem, ke ili parolas pri afero, kiun ili tute ne konas.

34. La manifestiĝoj de la Spiritoj estas de du naturoj: **la fizikaj efikoj** kaj **la inteligentaj komunikaĵoj**. La unuaj estas la materiaj kaj evidentaj fenomenoj, tiaj kiel movoj, bruoj, transporto de objektoj, k. t. p.; la aliaj konsistas el regula interŝanĝado de pensoj pere de signoj, de la parolo kaj ĉefe de la skribado. (*)

(*) Cent jaroj post la momento kiam Allan Kardec, skribis tiujn vortojn, ni povas informi la leganton, ke en Brazilo jam formiĝis tuta biblioteko da majstroverkoj en prozo

35. La komunikaĵoj de la Spiritoj povas esti bonaj aŭ malbonaj, veraj aŭ mensogaj, profundaj aŭ supraĵecaj, laŭ la grado de la komunikiĝantaj Spiritoj. Kiuj montras saĝecon kaj klerecon, tiuj estas altrangaj jam progresintaj Spiritoj; malklerecon kaj malbonajn kvalitojn montras Spiritoj postrestintaj, sed ĉi tiuj ankaŭ progresas kun la tempo. La Spiritoj povas respondi nur pri tio, kion ili scias, laŭ sia progreso, kaj, cetere, pri tio al ili permesita, ĉar estas aferoj, kiujn ili ne povas malkaŝi, tial, ke al la homoj ne estas ankoraŭ permesite ĉion scii.

36. El la malsameco de la kvalitoj kaj kapabloj de la Spiritoj rezultas, ke ne sufiĉas sin adresi al iu ajn Spirito por ricevi korektan respondon al ĉiu demando, ĉar pri multaj aferoj ili povas doni nur sian personan opinion, kiu povas esti ĝusta aŭ erara. Se li estas saĝa, li konfesas sian nescion pri tio, kion li ne konas; se li estas facilanima aŭ mensogema, li respondas pri ĉio ne zorgante pri la vero; se li estas fiera, li donas sian ideon kiel absolutan veron. Tial Johano la Evangeliisto diris: **"Ne kedu al ĉiu Spirito, sed provu, ĉu la Spiritoj estas de Dio."** La sperto pruvas la saĝecon de tiu konsilo. Estus do malprudento kaj facilanimeco akcepti sen kontrolo ĉion, kio venas de la Spiritoj. Estas nepre necese konscii pri la kvalitoj de tiuj, kun kiuj ni estas en rilatoj (**La Libro de la Mediumoj**, n-ro 267).

37. Oni ekkonas la kvaliton de la Spiritoj laŭ ilia lingvo; tiu de la bonaj kaj vere superaj Spiritoj estas ĉiam nobla, digna, logika, sen kontraŭdiroj; ĝi estas plena de saĝeco, de bonvolemo, de modesteco kaj de la plej pura moralo; ĝi estas konciza kaj ne havas vortojn senutilajn. Ĉe la Spiritoj malsuperaj, malkleraj aŭ fier-

kaj verso ricevitaj de el Superaj Spiritoj, prozistoj kaj poetoj, inter kiuj aperas centoj da vere eminentaj verkistoj per la mediumoj Francisco Cândido Xavier, F. Waldomiro Lorenz, Dolores Bacelar, Yvonne do Amaral Pereira, Waldo Vieira, Divaldo Franco, k. a. Tiu biblioteko kreskas kun ĉiu tago.
— *La Tradukinto.*

aj, la malpleneco estas preskaŭ ĉiam kompensata per la abundeco de la vortoj. Ĉiu penso evidente falsa, ĉiu maksimumo kontraŭa al perfekta moralo, ĉiu konsilo ridinda, ĉiu esprimo maldelikata, banala aŭ simple frivola, fine ĉiu signo de malbonvolemo, de aroganteco, de orgojlo estas nediskuteblaj signoj de malsupereco ĉe la Spirito.

38. La malsuperaj Spiritoj estas pli aŭ malpli malkleraj; ilia morala horizonto esta limita; ilia sagaceco estas malvasta; ili havas pri la aferoj ideon ofte eraran kaj malkompletan; cetere ili estas ankoraŭ sub la regado de la surteraj antaŭjuĝoj, kiujn ili kelkafoje prenas kiel veraĵojn; tial ili estas nekapablaj solvi plurajn problemojn. Ili povas konduki nin en eraron, volonte aŭ nevolonte, pri tio, kion ili mem ne komprenas.

39. La malsuperaj Spiritoj ne estas ĉiuj esence malbonaj; unuj estas nur malkleraj kaj ventkapaj; aliaj estas ŝercemaj, spritaj, amuzemaj kaj scias uzi trafan kaj mordantan mokon. Flanke de tiuj, oni trovas en la mondo de la Spiritoj, same kiel sur la Tero, ĉiujn specojn de perverseco kaj ĉiujn gradojn da intelekta kaj morala supereco.

40. La Superaj Spiritoj okupiĝas nur pri inteligentaj komunikaĵoj celantaj nian instruadon; la fizikaj aŭ pure materialaj manifestiĝoj estas pli speciale okupoj de malsuperaj Spiritoj, vulgare nomataj **frapantaj** Spiritoj, same kiel ĉe ni la monstro de forto apartenas al ĵonglistoj, ne al scienculoj.

41. La komunikiĝoj kun la Spiritoj devas fariĝi ĉiam kun trankvileco kaj enmemiĝo; oni ne forgesu, ke la Spiritoj estas la animoj de la homoj, kaj ne estus prave fari el ili ludilon aŭ ŝercon. Se oni havas respekton por la mortinta restaĵo, oni devas pli ankoraŭ respekti la Spiriton. La ventkapaj aŭ frivolaj kunvenoj ne plenumas do sian devon, kaj tiuj, kiuj tiajn faras, devus ja pensi, ke ili ankaŭ baldaŭ eniros en la mondon de la Spi-

ritoj kaj ne vidus plezuro la homojn trakti ilin kun tiel malmulte da respekto.

42. Alia egale konsiderinda punkto estas la libereco de la Spiritoj; ili komuniĝas kiam ili volas, kun kiu konvenas al ili, kaj ankaŭ kiam ili povas, ĉar ili havas siajn okupojn. Ili ne estas sub la ordonoj aŭ kaprico de iu ajn, kaj neniu povas ilin venigi kontraŭ ilia volo aŭ ilin diri ion, pri kio ili volas silenti; sekve neniu povas aserti, ke iu difinita Spirito venos al lia voko, aŭ respondos al tia aŭ alia demando. Diri la kontraŭon estus pruvo de absoluta nescio pri la plej elementaj principoj de Spiritismo; **nur ĉarlatanismo havas neelĉerpiblajn fontojn.**

43. La Spiritoj estas altirataj de la simpatio, de la simileco de gustoj kaj karakteroj, de la intenco, deziranta ilian aleston. La superaj Spiritoj ne venas al banalaj kunvenoj, same kiel scienculo de la Tero ne vizitas kunvenojn de ventkapaj junuloj. La komuna saĝo mem diras, ke ne povas esti alimaniere; aŭ, se superaj Spiritoj iam venas al tiaj kunsidoj, ĝi estas por doni saĝan konsilon, korekti malvirtojn, klopodi rekonduki la homojn sur la bonan vojon; se ili ne estas aŭskultataj, ili foriras. Tute falsa estus la ideo, ke seriozaj Spiritoj povus kompleze respondi al frivolaĵoj, al senutilaj demandoj, kiuj montras nek sindonemon nek respekton al ili, nek efektivan deziron instrui sin, kaj ankaŭ malpli, ke tiaj Spiritoj povus enŝoviĝi en spektaklon por amuzado de scivolemuloj. Ili tion ne faris dum la vivo, kaj ne povas ĝin fari post sia morto.

44. La frivoleco de la kunvenoj donas kiel rezulton la altiron de malseriozaj Spiritoj, kiuj ne perdas okazojn trompi kaj mistifiki. Pro la sama motivo, ke la gravaj kaj seriozaj homoj ne iras al kunvenoj de ventkapuloj, la seriozaj Spiritoj iras nur al seriozaj kunsidoj, kies celo estas instrui kaj ne kontentigi scivoleon; en tiaj kunvenoj plaĉas al la superaj Spiritoj doni siajn instruojn.

45. El tio antaŭdirita rezultas, ke ĉiu spiritista kunveno, por esti utila, kiel unua kondiĉo devas esti serioza kaj enmemiĝa; ke ĉio tie devas efektiviĝi respekteme, religieme kaj kun digneco, se oni volas ricevi la konstantan helpon de la bonaj Spiritoj. Oni ne forgesu, ke se tiuj samaj Spiritoj tie prezentiĝus dum sia vivo, oni havus por ili respekton, kiun ili multe pli ankoraŭ meritas post sia morto.

46. Vane oni pretekstas, ke certaj eksperimentoj kuriozaj, frivolaj kaj amuzaj estas utilaj por konvinki la nekredantojn: oni atingas tute kontraŭan rezulton. La nekredanto, jam inklina mokridi la plej sanktajn kredojn, ne povas vidi ion seriozan en tio farita kiel amuziĝo; li ne povas respekti tion, kio ne estas prezentata al li en respektinda maniero; tial li portas ĉiam malbonan impreson de la banalaj, malseriozaj kunvenoj, kaj pri tiuj en kiuj ne regas ordo, seriozeco kaj enmemiĝo. Kio super ĉio povas konvinki lin, tio estas la pruvo de alesto de estuloj, kies memoro estas al li kara; ĝi estas antaŭ iliaj paroloj gravaj kaj solenaj, antaŭ intimaj malkaŝoj, ke oni vidas lin kortuŝiĝi kaj paliĝi. Sed ĝuste tial, ke li havas pli da estimo, da respekto, da sindonemo al la persono, kies animo sin prezentas al li, lin ŝokas, skandaligas ĝia veno en kunsido malrespektema, inter dancantaj tabloj kaj moko de frivolaj Spiritoj; kvankam li estas tute nekredanta, lia konscienco malakceptas tian kunfandiĝon de tio serioza kaj de tio frivola, de io religia kaj de io profana, tial li taksas ĉion kiel ĵonglaĵon, kaj ofte eliras malpli konvinkita ol li eniris.

La kunvenoj de tiu speco faras ĉiam pli da malbono ol da bono, ĉar ili malproksimigas de la doktrino pli da personoj ol ili tien gvidas, ne konsiderante, ke ili prezentas Spiritismon al la kritiko de la atakantoj, kiuj tie trovas pravajn motivojn por mokado.

47. Malprave oni kondamnas la fizikajn manifestiĝojn; se ili ne gravas por la filozofia instruado, ili havas sian utilecon kiel fenomenoj, ĉar ili estas la alfabeto de tiu scienco, al kiu ili donis ŝlosilon. Kvankam malpli

necesaj hodiaŭ, ili ankoraŭ helpas por la konvinko de iuj personoj. Sed ili neniel ekskludas ordon kaj bonan konduton en la kunvenoj por eksperimentado; se ili estus ĉiam kondukataj en pli konvena maniero, ili pli facile konvinkus kaj produktus, el ĉiuj vidpunktoj, multe pli bonajn rezultatojn.

48. Certaj personoj havas ideon tute malpravan pri la elvokoj; iuj kredas, ke la elvokoj venigas el la tombo la mortintojn en funebra aparato. La malmulto de ni dirita pri tiu temo devas dispeli tiun eraron. Nur en romanoj, en fantaziaj rakontoj pri reaperantoj kaj en la teatro oni vidas la mortintojn senkarnaj, elirantaj el siaj tomboj, envolvitajn en littukoj, kaj klakigantajn siajn ostojn. Spiritismo neniam faras miraklojn, ĝi ne faris ankaŭ tiun; ĝi neniam revivigis mortintan korpon; kiam la korpo estas en la fosaĵo, ĝi estas tie tute definitive; sed la spirita estulo, fluideca, inteligenta ne estas tien metita kun sia maldelikata envolvajo; li apartiĝis de ĝi en la momento de la morto, kaj kiam la disiĝo estas farita, li jam havas nenion komunan kun ĝi.

49. Al la malbonvola kritiko plaĉis prezenti la spiritajn komunikaĵojn envolvitaj en ridindaj kaj superstiĉaj praktikoj de magio kaj nekromancio. Se la homoj, kiuj parolas pri Spiritismo ne konante ĝin, penus studion, pri kio ili volas paroli, ili ŝparus al si multajn imagadon kaj asertojn, kiuj taŭgis nur por pruvi iliajn necion kaj malbonan volon. Por informo al personoj fremdaj al tiu scienco, ni diros, ke por komunikiĝi kun la Spiritoj, ne estos tagoj, nek horoj, nek lokoj pli favoraj ol aliaj; ke por ilin elvoki ne estas necesaj formuloj, nek vortoj sakramentaj aŭ kabalaj; ke oni bezonas nenian preparon aŭ inicadon; ke la uzado de ĉiu signo aŭ materia objekto por ilin altiri aŭ forigi estas senefika, kaj ke la penso sufiĉas; fine, ke la medioj ricevas iliajn komunikaĵojn tiel simple kaj nature kiel se ili estus diktataj de vivanta homo, ne elirantaj el sia normala stato. Nur ĉarlataneco povus afekti strangajn manierojn kaj aldoni ridindajn akcesoraĵojn. La vokon al la

Spiritoj oni faras en nomo de Dio; kun respekto kaj enmemiĝo; nur ĉi tio estas rekomendita al seriozaj homoj, kiuj volas interrilatiĝi kun seriozaj Spiritoj.

Providenca celo de la spiritalaj manifestiĝoj

50. La providenca celo de la manifestiĝoj estas konvinki la nekredantojn, ke ne ĉio finiĝas por la homo kun la surtera vivo, kaj doni al kredantoj ĝustajn ideojn pri la estonteco. La bonaj Spiritoj venas nin instrui por nia pliboniĝo kaj nia progreso, kaj ne por malkaŝi tion, kion ni ne devas ankoraŭ scii aŭ tion, kion ni devas lerni nur per nia laboro. Se sufiĉus nur demandi la Spiritojn por ricevi solvon de ĉiuj sciencaj malfacilaĵoj, aŭ por fari eltrovojn kaj profitigajn inventojn, ĉiu malklerulo povus fariĝi sciencisto tre malkare, kaj ĉiu mallaboremulo povus riĉiĝi sen peno; ĉi tion Dio ne volas. La Spiritoj helpas la genian homon per kaŝita inspiro, sed ne liberigante lin de laboro kaj esploroj por lasi al li lian meriton.

51. Tre malpravajn ideojn pri la Spiritoj havas tiu, kiu vidas en ili helpantojn de la antaŭdirantoj de bona sorto; la seriozaj Spiritoj rifuzas okupiĝi pri frivolaĵoj; la ventkapaj kaj mokemaj okupiĝas pri ĉio, antaŭdiras ĉion deziratan, neniel zorgante pri la vero, kaj havas malican plezuron mistifiki la tro kredemajn homojn; tial estas nepre necese klare kompreni la trafon de la demandoj adresataj al la Spiritoj. (**La Libro de la Mediumoj**, n-ro 286: **Demandoj, kiujn oni povas fari al la Spiritoj.**)

52. Krom tio, kio povas helpi la moralan progreson, estas nur necerteco en la malkaŝoj, kiujn oni povas ricevi de la Spiritoj. La unua bedaŭrinda sekvo por kiu deflankiĝas de tiu providenca celo, estas ricevi mistifikojn fare de la trompemaj Spiritoj, kiuj svarmas ĉirkaŭ la homoj; la dua, estas fali sub la regadon de tiuj samaj Spiritoj, kiuj povas, per perfidaj konsiloj, konduki ilin al efektivaj kaj materiaj malfeliĉoj sur la Tero; la tria, estas la perdo de la frukto de la kono de Spiritismo, post la surtera vivo.

53. La manifestiĝoj ne estas do destinitaj servi materiajn interesojn; ilia utileco estas en la moralaj konsekvencoj fontantaj el ili; sed eĉ se ili donus kiel rezultaton nur la konon de nova natura leĝo, nur montri materiale la ekziston kaj la senmortecon de la animo, ĉi tio ja estus multo, ĉar ĝi estus nova larĝa vojo malfermita al la filozofio.

Pri la mediumoj

54. En siaj povoj la mediumoj prezentas la plej malsamajn kapablojn, kio faras ilin pli aŭ malpli taŭgaj por tiu aŭ alia speco de komunikaĵoj, de tia aŭ alia fenomeno. Laŭ tiuj kapabloj, ili distingiĝas kiel mediumoj, **por fizikaj efikoj, por inteligentaj komunikaĵoj, vidantoj, parolantoj, aŭdantoj, sensitivoj, desegnistoj, poliglotoj, poetoj, muzikistoj, verkistoj** k. a. Oni ne povas atendi de unu mediumo ion, kio estas ekster lia kapablo. Ne konante la mediumajn kapablecojn, la observanto ne povas kompreni certajn malfacilaĵojn, aŭ iajn neeblaĵojn ekzistantajn en la praktiko. (**La Libro de la Mediumoj**, ĉap. XVI, n-ro 185.)

55. La mediumoj por fizikaj efikoj estas pli kapablaj por okazigi materiajn fenomenojn, kiaj movoj, frapoj k. s., per tabloj aŭ aliaj objektoj; kiam tiuj fenomenoj montras penson aŭ obeas ies volon, ili estas inteligentaj efikoj; ĉar ili malkaŝas inteligentan kaŭzon: ĝi estas por la Spirito iu maniero manifestiĝi. Per difinita nombro da batoj, laŭ konvencio, oni ricevas respondojn per **jes** aŭ per **ne**, aŭ la montron de la literoj de la alfabeto por formi vortojn kaj frazojn. Tiu primitiva rimedo estas tro malrapida kaj ne taŭgas por longaj elvolviĝoj. La parolantaj tabloj estis la komenco de tiu scienco; hodiaŭ oni jam posedas rimedojn de komunikiĝoj tiel rapidaj kaj plenaj kiel ĉe la vivantoj kaj nur escepte, kiel eksperimentadon, oni uzas la parolantan tablon.

56. El ĉiuj rimedoj de komunikiĝoj, la skribado estas samtempe la plej simpla, la plej rapida, la plej opor-

tuna, kaj tiu, kiu permesas pli da elvolviĝoj; ĝi estas ankaŭ la kapablo plej ofte trovata ĉe la mediumoj.

57. Por akiri la skribon, oni uzis en la komenco diversajn materiajn perantojn kiel korbetojn, tabuletojn k. a., provizitajn per krajono. (**La Libro de la Mediumoj**, ĉap. XIII, n-oj 152 kaj sekvantaj.) Pli poste oni rekonis la senutilecon de tiuj akcesoraĵoj kaj la eblecon por la mediumoj skribi rekte per la mano, kiel en la ordinara skribado.

58. La mediumo skribas sub la influo de la Spiritoj, kiuj uzas lin kiel instrumenton; lia mano estas kondukata de nevola movado, kiun plej ofte li ne povas regi. Certaj mediumoj havas nenian konscion pri tio, kion ili skribas; aliaj havas pli aŭ malpli malprecizan konscion, kvankam la penso estas al ili fremda: ĉi tio distingas la **mehanikajn mediumojn** disde la **intuitivaj mediumoj** aŭ de la **duonmehanikaj**. La spirita scienco klarigas la manieron de la transsendo de la penso de la Spirito al la mediumo kaj la rolon de ĉi tiu lasta en la **komunikiĝoj**. (**La Libro de la Mediumoj**, ĉap. XV, n-roj 179 kaj sekvantaj; — ĉap. XIX, n-ro 223 kaj sekvantaj.)

59. La mediumo posedas nur la kapablon, sed la efektiva komunikaĵo dependas de la Spiritoj. Se la Spiritoj ne volas manifestiĝi, la mediumo nenion ricevas; tiam li estas muzikilo sen muzikisto. La Spiritoj komuniĝas nur kiam ili volas aŭ povas; ili neniam estas sub kaprico de iu; **neniu mediumo havas la povon ilin venigi laŭ sia plaĉo kaj kontraŭ ilia volo.**

Ĉi tio klarigas la intermitecon de la kapabloj ĉe la plej bonaj mediumoj, kaj la interrompoj, kiujn ili suferas kelkafoje dum pluraj monatoj. Estus do malprave identigi la mediemecon kun iu **talento**. La talenton oni akiras per laboro; kiu ĝin posedas estas ĉiam ĝia mastro; la mediumo neniam mastras sian kapablon, ĉar ĉi tiu dependas de fremda volo.

60. La mediumo por fizikaj efikoj, kiu ricevas regule kaj laŭvole iujn fenomenojn, kaj ne supozante, ke

tio fariĝas per ĵonglado, estas en rilatoj kun Spiritoj de malalta tavolo, al kiuj plaĉas tiuj montriĝoj, kaj kiuj eble havis similan metion en sia vivo; sed estus absurdo pensi, ke Spiritoj, eĉ malaltnivelaj, amuziĝas per parado. (Vidu antaŭe paĝon 55. Pri ĵonglado.)

61. La mallumo necesa al la produktado de certaj **fizikaj** efikoj sendube povas vekti suspekton, sed ĝi pruvas nenion kontraŭ la vereco de tiuj fenomenoj. Oni scias, ke en ĥemio iuj kombinaĵoj ne povas efektiviĝi sub la lumo; ke iuj komponadoj kaj malkomponadoj efektiviĝas sub la agado de la luma fluidaĵo; nu, ĉiuj spiritaj fenomenoj estas rezultato de kombinado de fluidaĵoj apartenantaj al la mediuo kaj al la Spirito; ĉar tiuj fluidaĵoj estas materio, estas neniel strange, ke en iuj okazoj la luma fluidaĵo estas kontraŭa al tiu kombinado.

62. La inteligentaj komunikiĝoj ankaŭ efektiviĝas per la fluideca agado de la Spirito super la mediuo; estas necese, ke la fluidaĵo de ĉi tiu lasta identiĝu kun tiu de la Spirito. La facileco de la komunikiĝoj dependas de la grado da akordiĝemo ekzistanta inter la du fluidaĵoj. Ĉiu mediuo estas do pli aŭ malpli kapabla ricevi la **impreson** aŭ la **impulson** de la penso de tia aŭ alia Spirito; li povas esti bona instrumento por unu kaj malbona por alia. El tio rezultas, ke se du egale bone naturdotitaj medioj estas unu apud la dua, iu Spirito povas manifestiĝi per unu kaj ne per la alia.

63. Estas do eraro kredi, ke sufiĉas esti mediuo por ricevi kun egala facileco komunikaĵojn de ĉiu Spirito. Ne ekzistas universalaj medioj por la elvokado, kiel ekzistas neniu kun kapableco por produkti ĉiujn fenomenojn. La Spiritoj serĉas preferinde instrumentojn vibrantajn unisone kun ili; trudi al ili la unuan renkontitan, estus same kiel trudi al pianisto ludi violonon, ĉar sciante muzikon li devas povi ludi ĉiujn instrumentojn.

64. Sen la harmonio, kiu povas konduki al la fluideca asimiliĝo, la komunikiĝoj estas neeblaj, nekompletaj aŭ falsaj. Ili povas esti falsaj, ĉar pro neeblo de la Spi-

rito dezirata, ne mankas aliaj pretaj kapti la okazon manifestiĝi, kiuj tre malmulte zorgas pri la vero.

65. La fluideca asimiliĝo estas kelkafoje tute ne ebla inter iuj Spiritoj kaj iuj medioj; aliajn fojojn, kaj ĉi tio estas la plej ordinara, ĝi stariĝas nur iom post iom en longa tempo; ĉi tio klarigas kial la Spiritoj, havantaj kutimon manifestiĝi per unu medio, ĉi tion faras kun la plej granda facileco, kaj kial la unuaj komunikiĝoj montras preskaŭ ĉiam iom da ĝeno kaj ne estas tre klaraj.

66. La fluideca asimiliĝo estas tiel necesa en la komunikiĝoj per **tiptologio** kiel per skribado, ĉar en ambaŭ okazoj temas pri la transsendo de la penso de la Spirito, kiu ajn la materia rimedo uzata.

67. Ne povante trudi mediumon al la Spirito, kiun oni volas elvoki, konvenas lasi al li la elekton de sia instrumento. En ĉiuj okazoj, estas necese, ke la medio identigu unue kun la Spirito per enmemiĝo kaj preĝo, almenaŭ dum kelkaj minutoj, aŭ eĉ dum pluraj tagoj antaŭe, se ĉi tio estas farebla, en maniero starigi kaj aktivigi la fluidecan asimiliĝon. Ĉi tio estas la rimedo por malgravigi la malfacilaĵon.

68. Kiam la fluidecaj kondiĉoj ne estas favoraj al la senpera komunikiĝo de la Spirito al la medio, ĝi povas fariĝi per helpo de la spirita gvidanto de la medio; en tiu okazo la penso alvenas per dua peranto, t. e. post traŭro tra du instrumentoj. Oni komprenas do kiel grava estas la bona spirita asistado al la medio, ĉar se li estas sub influo de obsedanta, malklera aŭ fiera Spirito, la komunikiĝo nepre estos falsita.

Tie la personaj kvalitoj de la medio nepre ludas gravan rolon, pro la karaktero de la Spiritoj, kiujn li altiras al si. La plej malindaj medioj povas havi fortajn kapablojn, sed la plej sekuraj estas tiuj, kiuj krom tiuj kapabloj, ĝuas la plej bonajn simpatiojn en la spirita mondo; nu, tiuj simpatioj neniel **estas garantiataj** de pli aŭ malpli imponantaj nomoj de la Spiritoj, aŭ ki-

ujn prenas la Spiritoj, kiuj subskribas la komunikaĵojn, sed de la karaktero **konstante bona** de la ricevataj komunikaĵoj.

69. Kiu ajn estas la maniero de la komunikiĝoj, el vidpunkto eksperimenta la praktikado de Spiritismo prezentas multenombrajn malfacilaĵojn, kaj ne estas libera de danĝero por kiu ne havas sperton. Kiel eksperimentanto mem aŭ kiel simpla observanto, estas necese scii distingi inter la malsamaj karakteroj de la Spiritoj, kiuj povas manifestiĝi, koni la kaŭzon de ĉiuj fenomenoj, la kondiĉojn en kiuj ili povas efektiviĝi, la obstaklojn, kiuj povas ilin kontraŭi, por ne peti ion neeban; ne estas malpli necese koni ĉiujn kondiĉojn kaj ĉiujn rifojn de la mediumeco, la influon de la medio, la moralan sintendon k. a. (**La Libro de la Mediumoj**, 2-a parto.)

Rifoj de la mediumoj

70. Unu el la plej gravaj rifoj de la mediumeco estas la **obsedo**, t. e. la regado, kiun iuj Spiritoj povas praktiki sur la mediumojn, trudante sin al ili sub apokrifaj nomoj kaj malebligante al ili komunikiĝi kun aliaj Spiritoj. Ĝi estas rifo ankaŭ por novica observanto nesperta, kiu, ne konante la karakterojn de ĉi tiu fenomeno, povas esti trompita de la ŝajnoj, kiel tiu nesperta en medicino, kiu povas havi iluzion pri la kaŭzo kaj karaktero de iu malsano. Se la antaŭa studo en tiu okazo estas utila por la observanto, ĝi estas nepre necesa al la mediumo, tial, ke ĝi liveras al li rimedojn por eviti ĝenaĵon, kiu povas havi por li bedaŭrindajn sekvojn; tial ni neniam ĉesus rekomendi la studadon antaŭ ol sin dediĉi al la praktiko. (**La Libro de la Mediumoj**. Ĉap. XXIII.)

71. La obsedo prezentas tri precipajn gradojn tre karakterizitajn: **la simpla obsedo**, **la fascino** kaj **la subjugado**. En la unua, la mediumo estas tute konscia, ke li ricevas nenion bonan; li havas nenian iluzion pri la naturo de la Spirito, kiu obstinas manifestiĝi per li kaj de kiu li deziras sin liberigi. Tiu okazo havas nen-

ian gravecon: ĝi estas nur malagrabla kaj la mediumo povas liberiĝi ĉesante provizore skribi. Laca ne esti aŭskultata la Spirito fine foriras.

La **obseda fascino** estas multe pli grava, ĉar la mediumo havas plenan iluzion. La Spirito lin reganta alproprigas al si lian konfidon ĝis la nuligo de lia juĝokapablo pri la komunikaĵoj, kaj igas lin trovi sublimaj la plej absurdajn aferojn.

La karakteriza trajto de tiu speco de obsedo estas ia tro forta ofendiĝemo en la mediumo; ĝi kondukas lin trovi bona, justa kaj vera nur tion, kion li skribas, kaj rifuzi, trovi ofenda, ĉiun konsilon, observon, kritikon; preferinde li forlasas siajn amikojn anstataŭ konsenti, ke li estas trompita; li ĵaluzas aliajn mediumojn, kies komunikaĵoj estas juĝataj pli bonaj ol la liaj; li volas sin trudi al la spiritistaj kunvenoj, kiujn li forlasas, kiam li ne povas ilin regi. Li venas fine al tia submetiĝo, ke la Spirito povas konduki lin al la plej ridindaj kaj kompromitantaj agoj.

72. Unu el la karakterizaj trajtoj de la malbonaj Spiritoj estas sin trudi; ili donas ordonojn kaj volas esti obeataj; la bonaj neniam sin trudas: ili donas konsilojn, kaj se oni ne aŭskultas ilin, ili foriras. El tio sekvas, ke la impreso de la malbonaj Spiritoj estas peniga, laciga kaj produktas ian specon de sveneto; ofte ĝi kaŭzas febran agitadon, abruptajn kaj spasmajn movojn; kontraŭe, tiu de la bonaj Spiritoj estas trankvila, dolĉa kaj kaŭzas veran bonstaton.

73. La **obseda subjugado**, iam nomita **posedo**, estas fizika trudo, ĉiam praktikata de Spiritoj el la plej malbona speco kaj kiu povas atingi ĝis la nuligo de la libera volo. Ofte ĝi limiĝas nur al malagrablaj impresoj, sed kelkafoje ĝi okazigas senordajn movojn, malsaĝajn agojn, kriojn, sensencajn aŭ ofendajn vortojn, kies ridindecon la viktimo ofte komprenas, sed li ne povas sin defendi. Tiu stato esence diferenciĝas de la **patologia frenezeco**, kun kiu oni ĝin malprave konfuzas, tial ke estas nenia organa lezo; ĉar la kaŭzo estas alia, la ku-

racantaj rimedoj ankaŭ devas esti tute aliaj. Uzante tie la ordinaran procedon de la duŝoj kaj de la korpaj kuracadoj, oni ofte venas al starigo de vera frenezeco, kie estis nur morala kaŭzo.

74. En la vera frenezeco, la kaŭzo de la malbono estas interna; oni devas peni por restarigi la organismon en ĝian normalan staton; en la **subjugado**, la kaŭzo de la malbono estas ekstera; oni devas liberigi la malsanulon el nevidebla malamiko, oponente al li, ne kuracilojn, sed **forton moralan superan al la alia**. La sperto pravas, ke en tiaj okazoj la ekzorcaĵoj neniam donis ian rezulton kontentigan, kaj ke ili pli gravigis anstataŭ plibonigi la situacion. Nur Spiritismo indikante la veran kaŭzon de la malbono, povas doni la rimedojn por ĝin venki. Estas necese iel eduki morale la obsedantan Spiriton; per konsiloj saĝe direktataj, oni sukcesas lin plibonigi kaj igi lin volonte rezigni pri la turmentado de la malsanulo, kaj tiam ĉi tiu estas libera. (**La Libro de la Mediumoj**, n-ro 279 — **Revue Spirite**, Februaro, Marto kaj Junio 1864. **La obsedita junulino de Marmande**.)

75. La obseda subjugado plej ofte estas individua; sed kiam trupo da malbonaj Spiritoj atakas iun loĝantaron, ĝi povas havi epidemian karakteron. Fenomeno de tia karaktero okazis en la tempo de la Kristo; nur potenca morala supereco povis superforti tiajn malicajn estulojn, kiuj tiam estis nomataj **demonoj**, kaj redoni trankvilecon al iliaj viktimoj⁽¹⁾.

76. Grava fakto konsiderenda estas, ke la obsedado, de iu ajn karaktero, estas sendependa de la mediumeco, kaj ke oni trovas ĝin en ĉiuj gradoj, precipe tiun lastan, en multegaj individuoj, kiuj neniam aŭdis pri Spiritismo. Efektive, tial ke la Spiritoj ekzistas en ĉiuj tempoj, ili

⁽¹⁾ Simila epidemio manifestiĝis en unu vilaĝo de la Haute-Savoie antaŭ pluraj jaroj. (Vidu en *Revue Spirite*, Aprilo kaj Decembro 1862; Januaro, Februaro, Aprilo kaj Majo de 1863: "*La poseditoj de Morzines*".)

ĉiam uzadis la saman influon; la mediumeco ne estas kaŭzo, ĝi estas nur maniero de manifestiĝo de tiu influo; sekve oni povas diri kun certeco, ke ĉiu mediumo obsedita devis suferi en ia ajn maniero, kaj ofte en la agoj plej komunaj de la vivo, la efikojn de tiu influado; ke sen la mediumeco ĝi manifestiĝus per aliaj efikoj, atributaj ofte al misteraj malsanoj, kiujn neniam medicina esplorado povas trovi. Per la mediumeco, la malica estulo perfidas sian aleston; sen la mediumeco, li estas kaŝita malamiko pri kies ekzisto neniu supozas.

77. La homoj, kiuj akceptas nenion krom la materio, ne povas akcepti ian kaŝitan kaŭzon; sed kiam la scienco eliros el la materialisma rutino, ĝi rekonos en la agado de la nevidebla mondo, kiu nin ĉirkaŭas kaj en kies medio ni vivas, ian potencon, kiu efikas sur la fizikajn aferojn tiel bone kiel sur la moralajn aferojn; tio estos nova vojo malfermita al la progreso kaj ŝlosilo por amaso da fenomenoj ne bone komprenataj.

78. Ĉar la obsedo neniam povas esti farata de bona Spirito, ĉefa punkto estas ekkoni la karakteron de tiuj, kiuj sin prezentas. Nesperta mediumo povas esti trompata de la ŝajnoj; tiu avertita spionas la plej malgrandajn suspektatajn signojn, kaj la Spirito fine foriras, kiam li vidas, ke li nenion povas fari. La antaŭa kono de la rimedoj por distingi la bonajn Spiritojn disde la malbonaj estas do necesa al la mediumo, kiu ne volas riski fali en kaptilon. Ĝi ne estas malpli necesa al la simpla observanto, kiu, per tiu rimedo, povas taksii la valoron de tio, kion li vidas aŭ aŭdas. (**La Libro de la Mediumoj**, ĉap. XXIV.)

La ecoj de la mediumoj

79. La media kapablo apartenas al la organismo; ĝi estas sendependa de la moralaj kvalitoj de la mediumo, kaj oni ĝin trovas elvolviĝintan en la plej malindaj same kiel en la plej indaj. Sed ne same estas la prefero donata de la bonaj Spiritoj al la mediumoj.

80. La bonaj Spiritoj komuniĝas pli aŭ malpli volonte per tia aŭ alia medio, laŭ sia propra simpatio al ties Spirito. Kio formas la kvaliton de iu medio, ne estas la facileco per kiu li ricevas la komunikaĵojn, sed lia kapablo ricevi nur bonajn komunikaĵojn kaj ne fariĝi ludilo de ventkapaj kaj trompemaj Spiritoj.

81. Se la medioj morale pli malperfektaj kelkfoje ricevas tre bonajn komunikaĵojn, kiuj povas veni nur de bonaj Spiritoj, kion oni malprave miras, ĝi estas ofte en la intereso de la medio mem, por doni al li saĝajn avertojn. Se li ĉi tiujn ne profitas, li estas plej kulpa, ĉar li skribas sian propran kondamnon. Dio, kies boneco estas senlima, ne povas rifuzi helpojn al tiuj, kiuj plej bezonas ĝin. La virta misiulo, kiu venas al krimuloj por ilin moraligi, faras nur tion, kion la bonaj Spiritoj faras ĉe le neperfektaj medioj.

Aliflanke, kiam la bonaj Spiritoj volas doni instruon utila al ĉiuj, ili uzas la instrumenton, kiun ili havas ĉemane; sed ili ĝin forlasas kiam ili trovas alian, kiu estas al ili pli simpatia, kaj kiu profitas el la ricevataj lecionoj. Kiam la bonaj Spiritoj eliras, la malsuperaj Spiritoj, senzorgaj pri moralaj kvalitoj, kiuj ĝenas ilin, havas la kampon libera.

El tio rezultas, ke la morale malperfektaj medioj, kiuj ne korektas sin, frue aŭ malfrue estas predo de la malbonaj Spiritoj, kiuj ofte ilin kondukas al la ruino kaj al la plej grandaj malfeliĉoj en ĉi tiu sama mondo. Koncerne ilian kapablon, kiu estis bela kaj tia restus, ĝi unue perversiĝas pro la forlaso fare de la bonaj Spiritoj kaj fine perdiĝas.

82. La plej meritaj medioj ne estas en ŝirmejo kontraŭ mistifikoj de trompemaj Spiritoj; unue, ĉar ne ekzistas persono sufiĉe perfekta por ne havi ian malfortan flankon tra kiu li povus malfermi enirpordon al malbonaj Spiritoj; due, kelkfoje la bonaj Spiritoj tion permesas por ekzercigi la juĝadon, instrui distingi la veron el eraro kaj vigligi malkonfidon, ke oni nenion akceptu blinde kaj sen kontrolo; sed la trompo neniam

venas de bona Spirito, kaj ĉiu respektinda nomo subskribanta eraron nepre estas apokrifa.

Tio povas esti ankaŭ provado por la pacienco kaj la persistemo de ĉiu spiritisto, mediuo aŭ ne; kiu senkuraĝiĝus pro kelkaj disreviĝoj, tiu pruvas al la bonaj Spiritoj, ke ĉi tiuj ne povas kalkuli sur lin.

83. Ne estas pli mirige vidi malbonan Spiriton obsedi meritplenajn personojn, ol surprizige vidi malbonajn homojn furioze ataki sur la Tero la honestajn personojn.

Estas rimarkinde, ke post la publikigo de "**La Libro de la Mediuoj**", la obseditaj mediuoj estas malpli multaj ol antaŭe, ĉar ili estas avertitaj, ili sin gardas, kaj spionas la malplej grandajn signojn, kiuj povas malkaŝi la aleston de trompema Spirito. La plej multaj nun obseditaj mediuoj, aŭ ne ĝin antaŭe studis, aŭ ne profitis ĝiajn konsilojn.

84. Kio estigas la mediuon ĝuste difinitan, tio estas la kapablo; en tiu senco li povas esti pli aŭ malpli formita, pli aŭ malpli elvolvita. Kio estigas la mediuon **sekura**, tiun, kiun oni povas vere taksi kiel **bonan mediuon**, tio estas la aplikado de la kapablo, la taŭgeco por esti interpretisto de la bonaj Spiritoj. Flanke lasante la tutan kapablon, la povo de la mediuo por altiri la bonajn Spiritojn kaj forpeli la malbonajn, estas proporcia je lia morala supereco; tiu supereco estas proporcia je la sumo de la kvalitoj, kiuj faras la honestan homon; per ĝi oni favorigas al si la simpation de la bonuloj, kaj havas aŭtoritaton super la malbonaj.

85. Pro la sama motivo, la sumo de la moralaj malperfektaĵoj de la mediuo lin alproksimigas al la karaktero de la malbonaj Spiritoj kaj forprenas de li la influon necesan por ilin forigi; **anstataŭ sin trudi al ili, ĉi tiuj lin regas.** Ĉi tio aplikiĝas ne nur al mediuoj, sed al iu ajn persono, ĉar ĉiuj ricevas influon de la Spiritoj. (Vidu supre n-rojn 74 kaj 75.)

86. Por sin trudi al la mediuo, la malbonaj Spiritoj scias lerte ekspluati ĉiujn moralajn maniojn; kio don-

as al ili pli da facilajo, **tio estas la fiero**; tial fiero estas la plej reganta sento ĉe la plej multaj obseditaj medioj, sed precipe ĉe tiuj **fascinitaj**. Fiero igas ilin kredi al sia propra neerareblo kaj rifuzi avertojn. Bedaŭrinde, tiu sento estas ekscitata de la laŭdoj, kiujn ili ricevas; kiam ili havas kapablon iom transcendan, oni ilin serĉas, ilin flatas, ili fine kredas al sia graveco; ili rigardas sin kiel nepre necesajn, kaj ĉi tio ilin pereigas.

87. Dum la neperfekta medio fieras pro la eminentaj nomoj, plej ofte apokrifaj, en la komunikadoj, kiujn li ricevas, rigardas sin kiel privilegian interpretiston de la ĉielaj potenculoj, la **bona medio** neniam sin juĝas sufiĉe inda je tia favoro: li ĉiam havas utilan dubon pri la bona kvalito de tio, kion li ricevas, kaj ne konfidas al sia propra juĝo: estante nur pasiva instrumento, li komprenas, ke se tio estas bona, li ne havas personan meriton, same kiel li ne estas priresponda, se ĝi estas malbona, kaj ke estus ridinde interveni por la absoluta identeco de la Spiritoj manifestiĝantaj al li; li lasas al triaj personoj neŭtralaj juĝi la demandon, kaj lia memamo ne suferas pro malfavora juĝo, same kiel aktoro ne suferas pro mallaŭdo al teatraĵo, kiun li nur ludas. La ĉefaj trajtoj de lia karaktero estas simpleco kaj modesteco; li estas feliĉa de la posedata kapablo, ne por vantigi de ĝi, sed ĉar ĝi donas al li rimedon por esti utila, kion li volonte faras, sed neniam ofendiĝante se oni ne metas lin en unuan rangon.

La medioj estas perantoj kaj interpretistoj de la Spiritoj; la elvokanto aŭ eĉ la simpla observanto devas do havi la taskon juĝi la meriton de la instrumento.

88. La mediuma kapablo estas donaco de Dio, same kiel ĉiuj aliaj kapabloj, kiun oni povas uzi egale por la bono aŭ malbono, kaj kiun oni povas malrespekti. Ĝia celo estas meti nin en senperan rilaton kun la animoj de tiuj, kiuj vivis, por ricevi iliajn instruojn kaj nin inici en la estontan vivon. Kiel la vido rilatigas nin kun la videbla mondo, la mediumeco rilatigas nin kun la nevidebla mondo. Kiu uzas ĝin kun utila celo, por la progreso

de si mem kaj de aliaj homoj, tiu plenumas veran mision el kiu li ricevos rekompencan. Kiu malbonuzas ĝin kaj ĝin uzas por aferoj banalaj kaj kun materialaj interesoj, ĝin deturnas de la providenca celo; frue aŭ malfrue, tiu suferas la punon, same kiel ĉiu, kiu malbonuzas iun ajn kapablon.

Ĉarlatanismo

89. Iuj spiritalaj manifestiĝoj povas esti tre facile imitataj, sed tial, ke ili eble estis ekspluatitaj de ĵonglistoj kaj prestidigitatoroj, kiel tiom da aliaj fenomenoj, estus absurdo konkludi, ke ili ne ekzistas. Kiu studis tiujn manifestiĝojn kaj scipovas la normalajn kondiĉojn en kiuj ili povas efektiviĝi, tiu kapablas distingi la imitaĵon disde la realaĵo; cetere la imitaĵo neniam estas kompleta kaj povas trompi nur nescianton, nekapablan kapti la nuancojn, kiuj karakterizas la veran fenomenon.

90. La manifestiĝoj plej facile imiteblaj, estas iuj fizikaj efikoj kaj ordinaraj inteligentaj efikoj, kiaj estas la movoj, la frapoj, la alportoj, la senpera skribaĵo, banalaj respondoj k.s.; ne la inteligentaj komunikaĵoj de alta signifo; por imiti la unuajn, sufiĉas lerteco; por simuli la aliajn, preskaŭ ĉiam estus necesa klereco ne ordinara, eminenta intelekta supereco kaj kapablo de improvizado preskaŭ universala.

91. Kiuj ne konas Spiritismon, tiuj ofte suspektas la bonan fidon de la medioj; la studado kaj sperto donas al ili la rimedojn por certiĝi pri la realeco de la faktoj; sed krom tio, la plej bona garantio, kiun ili povas trovi, kuŝas en la absoluta oferemo kaj en la honorindeco de la medioj; estas personoj, kiuj pro sia pozicio kaj sia karaktero, staras super ĉia suspekto. Se la logaĵo de la profito povas inciti al la trompado, la komuna saĝo montras, ke ĉarlatanismo havas nenion por fari tie, kie estas nenio por gajni. (**La Libro de la Medianoj**, ĉap. XXVIII, Ĉarlatanismo kaj ĵonglado, monaĵaj medioj, spiritismaj trompoj, n-ro 300. — **Revue Spirite**, 1862, paĝo 52.)

92. Inter la adeptoj de Spiritismo oni trovas entuziasmulojn kaj fervorulojn kiel em ĉiuj movadoj; tiuj estas ordinare la plej malbonaj disvastigantoj, ĉar oni dubas pri ilia facileco ĉion akcepti sen profunda ekzameno. Klara spiritisto ne akceptas blindigantan entuziasmon; malvarmsange kaj trankvile li ĉion observas; ĉi tiu estas la maniero ne esti trompata de iluzioj nek de mistifikantoj. Sen ia konsiderado al bona fido, la novica observanto devas, super ĉio, atenti la seriozecon de la personoj al kiuj li sin turnas.

Identeco de la Spiritoj

93. Tial, ke oni trovas ĉe la Spiritoj ĉiujn maniojn de la homaro, oni trovas ankaŭ la ruzon kaj la mensogon; iuj Spiritoj havas nenian skrupulon ornami sin per la plej respektindaj nomoj por inspiri pli da konfido. Oni ne povas do kredi en maniero absoluta al aŭtentikeco de ĉiuj subskriboj.

94. La identigo estas unu el la plej grandaj malfacilaĵoj de la praktika Spiritismo; ofte estas neeble ĝin konstati, precipe pri superaj Spiritoj antikvaj, antaŭaj al nia epoko. Inter la manifestiĝantoj, multaj ne havas nomojn por ni; por fiksi niajn ideojn, ili povas preni nomon de unu konata Spirito apartenanta al ilia sama kategorio; tial, se iu Spirito komuniĝas sub la nomo Sankta Petro, ekzemple, nenio pruvas, ke li estas la apostolo de tiu nomo; ĝi povas esti li, same kiel ĝi povas esti iu Spirito de la sama rango, aŭ sendito de li.

La demando pri identeco en tiu okazo neniel gravas, estus infanaĵo doni al ĝi atenton; kio gravas tiam estas la karaktero de la instruo mem; ĝi estas bona aŭ malbona, inda aŭ ne inda de la persono, kies nomon ĝi portas; ĉu li ĝin akceptus aŭ rifuzus, jen la tuta demando.

95. Estas pli facile konstati la identecon, kiam temas pri Spiritoj de nia tempo, kies karakteron kaj kutimojn oni konas, ĉar ĝuste per tiuj kutimoj kaj apartaj agmanieroj en la privata vivo, ilia identeco plej sekure

malkaŝiĝas kaj ofte en nekontestebla maniero. Kiam oni elvokas parencon aŭ amikon, pli interesa estas lia personeco mem, kaj estas memkompreneble peni konstati lian (aŭ ŝian) identecon; sed la rimedoj tiam ordinare uzataj por tiu celo, de personoj, kiuj nur neperfekte konas Spiritismon, estas nesufiĉaj kaj ofte faligas en eraron.

96. La Spirito malkaŝas sian identecon per amaso da cirkonstancoj, reliefigantaj el la komunikaĵoj, en kiuj manifestiĝas liaj kutimoj, karaktero, lingvaĵo, ĝis liaj familiaj dirmanieroj. Ĝi montriĝas ankaŭ per intimaj detaloj en kiujn li **spontanee** eniras kun amataj personoj: tiuj estas la plej bonaj pruvoj pri identeco. Sed tre malofte la Spirito kontentigas rektajn demandojn pri tiu temo al li adresatajn, precipe se ilin al li prezentas personoj al li indiferentaj, nur pro scivolemo aŭ provo. La Spirito pruvas sian identecon kiel li volas aŭ kiel li povas, laŭ la kapablo de lia interpretisto, kaj ofte tiuj pruvoj estas superabundaj; eraro estas voli, ke li ilin donu laŭ la maniero de la elvokanto; tiam li rifuzas submetiĝi al postuloj. (**La Libro de la Mediumoj**, ĉap. XXIV: **Identeco de la Spiritoj**. — *Revue Spirite*, 1862, paĝo 82: **Fakto de identeco**.)

Kontraŭdiroj

97. La kontraŭdiroj ofte rimarkataj en la parolo de la Spiritoj povas mirigi nur tiujn, kiuj havas de la spiritisma scienco nekompletan scion. Ili estas konsekvenco de la naturo mem de la Spiritoj, kiuj, kiel jam estas dirite, scias pri la aferoj nur laŭ la grado de sia progreso, kaj sekve kelkaj Spiritoj povas scii malpli ol certaj homoj. Pri multegaj punktoj ili povas eldiri nur sian personan opinion, kiu povas esti pli aŭ malpli ĝusta, kaj konservi la ombrojn de la surteraj antaŭjuĝoj, el kiuj ili ne ankoraŭ liberiĝis; aliaj kreas al si sistemojn pri tio, kion ili ankoraŭ ne scias, precipe koncerne al la sciencaj demandoj pri la origino de la aferoj. Neniel mirige do, ke ili ne ĉiam akordiĝas.

98. Oni miras trovi inter si kontraŭdirajn komunik-aĵojn subskribitajn de la sama nomo. Nur la malsuperaj Spiritoj povas, laŭ la cirkonstancoj, teni malsaman parolon, ĉar la superaj Spiritoj neniam kontraŭdiras sin mem. Kiu estas incita eĉ ne profunde en la misterojn de la spirita mondo, scias kun kia facileco certaj Spiritoj ornamas sin per pruntita nomo por doni pli da kredito al siaj paroloj; oni povas konkludi kun certeco, ke se du komunik-aĵoj, radike kontraŭdiraj **laŭ la fundo de la penso**, portas la saman respektindan nomon, unu el ili estas nepre apokrifa. ⁽¹⁾

99. Du rimedoj povas taŭgi por fiksi la ideojn pri la dubaj demandoj: la unua estas submeti ĉiujn komunik-aĵojn al la severa kontrolo de la racio, de la komuna saĝo kaj de la logiko; tiun rekomendon faras ĉiuj bonaj Spiritoj, sed ne la trompemaj, ĉar ĉi tiuj scias tre bone, ke ili povas nur perdi ĉe serioza ekzameno; tial ili evitas la diskuton kaj volas esti kredataj konfide.

La dua kriterio de la vero estas la unuformeco de la instruado. Kiam la sama principo estas instruita de malsamaj Spiritoj en diversaj lokoj per medioj fremdaj unuj al aliaj, kiuj ne estas sub la samaj influoj, oni povas konkludi, ke tiu principo estas pli vera ol se ĝi venus de unu sola fonto kaj estus kontraŭdirata de la pli multaj. (**La Libro de la Mediumoj**, ĉap. XXVII: **Pri la kontraŭdiroj kaj la mistifikoj**. — **Revue Spirite**, Aprilo 1864, p. 99: **Aŭtoritato de la spiritisma doktrino**. — **La Evangelio laŭ Spiritismo**. Enkonduko, pĝ. 22.)

Konsekvencoj de Spiritismo

100. Ĉe la necerteco de la malkaŝoj farataj de la Spiritoj, oni demandas por kio taŭgas la studo de Spiritismo?

Ĝi taŭgas por materiale pruvi la ekziston de la spirita mondo.

⁽¹⁾ Se ne ambaŭ. — *La Trad.*

Ĉar la spirita mondo estas formita per la animoj de tiuj, kiuj vivis sur la Tero, ĝi estas pruvo pri la ekzisto de la animo kaj de ties vivado post la korpo.

La manifestiĝantaj animoj malkaŝas siajn ĝojojn aŭ siajn suferojn laŭ la manieroj kiel ili uzis la surteran vivon; el tio rezultas la pruvo pri la estontaj punoj kaj rekompencoj.

La animoj aŭ Spiritoj priskribas sian staton kaj sian situacion, tiel ili korektas la falsajn ideojn, kiujn oni havas pri la venonta vivo kaj precipe pri la naturo kaj daŭro de la punoj.

Tiel la estonta vivo transiras de la stato de malpreciza kaj duba teorio al la stato de pruvita kaj pozitiva fakto, kaj el tio rezultas la bezono labori kiel eble plej vigle dum la nuna mallonga vivo, profite al la venonta, kies daŭro ne estas difinita.

Ni supozu, ke dudekjara homo estas certa morti kiam li estos dudekkvinjara, kion li faros dum kvin jaroj? Ĉu li laboros por sia estonteco? Certe ne; li penas ĝui kiel eble plej multe: li rigardus kiel trompon trudi al si penojn kaj seniĝojn sen ia celo. Sed se li estas certa, ke li vivos ĝis la aĝo de okdek jaroj, li kondutos tute alie, ĉar li komprenas la bezonon oferi iujn momentojn da nuna ripozo por akiri ripozon venontan por multaj jaroj. La samo okazas al kiu estas tute certa pri la estonta vivo.

La dubo pri la estonta vivo nature kondukas al la ofero de ĉio al nunaj ĝuoj; sekve al troa sklaviĝo al la materiaj bonaĵoj.

La graveco dediĉata al materiaj bonoj incitas la avidecon, la envion, la ĵaluzon de kiu posedas malmulton, kontraŭ kiu tenas multon. De la envio al la deziro akiri je iu ajn prezo tion, kion posedas lia najbaro, estas nur unu paŝo; de tie la malmamoj, la kvereloj, la procesoj, la militoj kaj ĉiuj malbonoj naskitaj de egoismo.

Kun la dubo pri la estonteco, premita en ĉi tiu vivo, de ĉagreno kaj malfeliĉo, la homo vidas nur en la morto la finon de siaj suferoj; nenion pli esperante, li trovas prave mallongigi ilin per memmortigo.

Sen espero al la estonteco, estas kompreneble, ke la homo impresiĝas kaj malesperas pro la elreviĝoj, kiujn li provas.

La fortegaj skuoj, kiujn li travivas, produktas en lia cerbo difektojn, kiuj estas kaŭzoj de la plej multaj okazoj de frenezeco.

Sen la estonta vivo, la nuna vivo fariĝas por la homo la ĉefa afero, la sola celo de liaj zorgoj; li ligas ĉion al ĝi; kaj tial li volas je ĉiu prezo ĝui ne nur la materialajn bonojn, sed ankaŭ la honorojn; li sopiras brili, altiĝi super la aliaj, eklipsi siajn najbarojn per sia pompo kaj per sia rango; de tie lia senmezura ambicio kaj la graveco de li pruntita al la titoloj kaj al ĉiuj ludiloj de la vanteco, por kies akiro li oferus ĉion, eĉ sian honoron mem, ĉar post tio li vidas ja nenion.

La certeco pri la estonta vivo kaj pri ĝiaj konsekvencoj tute ŝanĝas la ordon de la ideoj kaj vidigas la aferojn sub tute alia lumo: ĝi levas vualon kaj mal-krovas senliman kaj brilegan horizonton.

Antaŭ la senfinesco kaj grandiozeco de la transtomba vivo, la surtera vivo forviŝiĝas kiel la sekundo antaŭ la jarcentoj, kiel la sablero antaŭ la monto. Ĉio ĉi tie fariĝas malgranda, mizera kaj oni miras je si mem pro la graveco, kiun oni iam alligis al tiel efemeraj kaj infanecaj aferoj. De tio venas kvieteco, trankvileco en la okazaĵoj de la vivo, kio ja estas feliĉo en komparo kun la zorgoj, la turmentoj, kiujn oni trudas al si mem, la malpacienco por altiĝi super la ceteraj; de tio venas ankaŭ pri la sortoŝanĝoj kaj la disreviĝoj, ia indiferenteco, kiu nin liberigas je falo kiel kaptiĝo de malespero kaj sekve de la plej multaj okazoj de frenezigo, kaj nin deturnas de la penso pri memmortigo. Kun certeco pri la estonteco, la homo atendas kaj rezignas; kun la dubo, li perdas paciencon, ĉar li atendas nenion krom de la nuna tempo.

La ekzemplo de tiuj jam vivintaj sur la Tero montras, ke la sumo de la venonta feliĉo estas proporcia kun la morala progreso plenumita kaj kun la bono farita sur la Tero; ke la sumo de la malfeliĉo estas proporcia

kun la malvirtaj kaj malbonaj agoj, sekve, ĉiuj plene konvinkitaj pri tiu vero tute nature emas do fari la bonon kaj eviti la malbonon.

Kiam la pli granda parto de la homoj estos konvinkitaj pri tiu ideo, kaj sekvos tiujn principojn, farante la bonon, tiam la bono venkos la malbonon sur la Tero; la homoj jam ne penos malutili unuj aliajn; ili reguligos siajn sociajn instituciojn celante la bonon de ĉiuj kaj ne en profito de kelkaj. Unuvorte, ili komprenos ke la leĝo de karito, instruata de la Kristo, estas la fonto de la feliĉo, ankaŭ en ĉi tiu mondo, kaj tiam ili fundamentos la civilajn leĝojn sur la leĝo de karito.

La konstato pri la spirita mondo nin ĉirkaŭanta kaj pri ĝia agado sur la korpan mondon, estas malkaŝo pri unu el la potencoj de la naturo, kaj sekve la ŝlosilo por amaso da fenomenoj nekomprenataj, en la ordo fizika kaj en la ordo morala.

Kiam la scienco kalkulos kun tiu nova forto, ĝis nun nekonata de la scienculoj, ĝi korektos amason da eraroj devenantaj de tio, ke ĝi atribuas ĉion al unu unika kaŭzo: — la materio. La rekono de tiu nova kaŭzo en la fenomenoj de la naturo, estos levilo por la progreso, kaj produktos la efikon de la eltrovo de tute nova agento. Kun la helpo de la spirita leĝo, la horizonto de la scienco larĝiĝos, kiel ĝi larĝiĝis kun la helpo de la leĝo de gravito.

Kiam la sciencistoj, de sur la instruada seĝo, proklamos la ekzistadon de la spirita mondo kaj ties agadon sur la fenomenojn de la vivo, ili enfiltrigos en la junularon la kontraŭvenenon kontraŭ la materialistaj ideoj, anstataŭ antaŭinklinigi la junulojn al neado de la estonteco.

En la lecionoj de klasika filozofio, la profesoroj instruas la ekziston de la animo kaj de ties atributoj, laŭ la malsamaj skoloj, sed sen materialaj pruvoj. Ĉu ne estas strange, do, ke kiam tiaj pruvoj alvenas, ili estas rifuzataj kaj traktataj de tiuj samaj profesoroj kiel superstiĉoj? Ĉu tio ne estas diri al siaj lernantoj: "ni instruas al vi la ekziston de la animo, sed nenio pravas

ĝin?" Kiam sciencisto eldonas hipotezon pri unu punkto de la scienco, li diligente serĉas, akceptas kun ĝojo la faktojn, kiuj povas el tiu hipotezo fari veron; kiel do profesoro de filozofio, kies devo estas pruvi al siaj lernantoj, ke ili havas animon, traktas kun malŝato la rimedojn por doni al ili evidentan demonstron?

101. Ni eĉ supozu, ke la Spiritoj ne estas kapablaj instrui al ni ion, kion ni ankoraŭ ne scias, aŭ kion ni ne povus lerni per ni mem, oni tamen vidas ke la sola konstato de la ekzisto de la spirita mondo nepre kondukas al revolucio en la ideoj; nu, revolucio en la ideoj estigas neeviteblan revolucion en la ordo de la aferoj; ĉi tiun revolucion Spiritismo preparas.

102. Sed la Spiritoj faras pli ol tion; se iliaj malkaŝoj estas ĉirkaŭitaj de certaj malfacilaĵoj; se tiuj malkaŝoj postulas detalajn zorgojn por konstati ilian ĝustecon, ne malpli vere estas, ke la kleraj Spiritoj, kiam oni scias ilin pridemandi, kaj kiam tio estas al ili permesata, povas malkaŝi al ni nekonatajn faktojn, doni al ni klarigojn pri aferoj nekonprenataj, kaj meti nin sur la vojon al pli rapida progreso.

Precipe en tio la plena kaj atenta studado de la spiritisma scienco estas nepre necesa, por peti de ĝi nur tion, kion ĝi povas doni, kaj nur en la maniero kiel ĝi povas tion doni; transpaŝante tiujn limojn, oni estas en danĝero esti trompita.

103. La plej etaj kaŭzoj povas produkti la plej grandajn efikojn; tiel, el malgranda semo povas kreski grandega arbo; tiel, el la falo de pomo oni eltrovis la leĝon regantan la mondojn; tiel, ranoj saltantaj en plado malkaŝis la galvanan forton; same, el la vulgara fenomeno de turnantaj tabloj eliris la pruvo pri la nevidebla mondo, kaj el tiu pruvo venis doktrino, kiu en kelkaj jaroj veturis tra la tuta mondo, kaj povas ĝin regeneri per la sola forto de la realaĵo de la estonta vivo.

104. Spiritismo instruas malmulte aŭ neniel verojn tute novajn, laŭ la aksiomo, ke estas nenio nova sub la

suno. Nur la eternaj veroj estas absolutaj; tiuj veroj, instruataj de Spiritismo, estas fondataj sur la naturaj leĝoj, ekzistas do de ĉiuj tempoj; tial, en ĉiuj tempoj oni trovas iliajn ĝermojn, kiujn pli kompleta studado kaj pli atentaj observoj elvolvigis. La veroj instruataj de Spiritismo estas do pli konsekvencoj ol eltrovaĵoj; ĝi ne eltrovis ankaŭ la spiritan mondon je kiu oni kredis en ĉiuj tempoj; ĝi nur pravas ĝin per materialaj faktoj kaj ĝin montras sub ĝia vera lumo, sen la antaŭjuĝoj kaj la superstiĉaj ideoj, kiuj naskas dubon kaj nekredemon.

Rimarko. Kvankam tute nekompletaj, ĉi tiuj klarigoj sufiĉas por montri la bazon, sur kiu ripozas Spiritismo, la karakteron de la manifestiĝoj kaj la gradon da konfido, kiun tiuj manifestiĝoj povas inspiri laŭ la cirkonstancoj.

ĈAPITRO III

Solvo de kelkaj problemoj per la spiri- tisma doktrino

PLURECO DE LA MONDOJ

105. Ĉu la pluraj mondoj cirkulantaj en la spaco havas loĝantarojn kiel la Tero?

Ĉiuj Spiritoj asertas tion, kaj la racio diras, ke ne povas esti alie. La Tero okupas en la spaco nenian specialan rangon, ne laŭ ĝia pozicio, nek laŭ ĝia volumeno, nenio povus pravigi ĝian ekskluzivan privilegion esti la sola loĝata.

Cetere, Dio ne estus kreinta tiujn miliardojn da globusoj nur por plaĉi al niaj okuloj; des malpli, ĉar la plej grandan nombron nia vidpovo ne atingas. ("La Libro de la Spiritoj", n-ro 55. — "Revue Spirite", 1858, paĝo 65: — "Plureco de la mondoj", de Flammarion.)

106. Se la mondoj estas loĝataj, ĉu iliaj loĝantoj en ĉio estas similaj al tiuj de la Tero? Alivorte, ĉu tiuj loĝantoj povus vivi ĉe ni kaj ni ĉe ili?

La formo povus esti preskaŭ la sama, sed la organismo devas esti adaptita al la medio, en kiu ĝi devas vivi, kiel la fiŝoj estas farataj por vivi en akvo kaj la birdoj en la aero. Se la medio estas malsama, kiel ĉio supozigas, kaj kiel ŝajnas demonstri la astronomiaj observoj, la organismo devas esti malsama; ne estas do probable, ke en ilia normala stato, ili povus vivi unuj ĉe la aliaj, kun la samaj korpoj. Ĉi tion konfirmas la Spiritoj.

107. Kredante, ke tiuj mondoj estas loĝataj, ĉu en intelekta kaj morala senco ili estas en la sama nivelo kiel la Tero?

Laŭ la instruado de la Spiritoj, la mondoj estas en tre malsamaj gradoj da progreso; kelkaj estas en la sama nivelo kiel la Tero; aliaj estas malpli progresintaj: la homoj en ili estas ankoraŭ pli brutalaj, pli materialaj kaj pli inklinaj al malbono. Kontraŭe, aliaj estas morale, intelekte kaj fizike pli progresintaj, en ili la morala malbono estas nekonata, la artoj kaj sciencoj atingis gradon da perfekteco, kian ni ne povas kompreni, tie la fizika organismo, malpli materiala, ne estas submetita al la suferoj, nek malsanoj, nek kriplajoj de la Tero. La homoj tie vivas en paco, ne penante malutili unuj aliajn, sen la ĉagrenoj, la zorgoj, la afliktoj kaj la bezonoj, kiuj ilin turmentas sur la Tero. Aliaj ankoraŭ pli progresintaj ekzistas, kie la korpa envolaĵo, preskaŭ fluideca, alproksimiĝas ĉiam pli kaj pli al la naturo de la anĝeloj. En la progresanta serio de la mondoj, la Tero ne estas en la lasta rango, sed ĝi estas unu el la plej materialaj kaj subevoluintaj. ("Revue Spirite", 1858, paĝoj 67, 108, 223; Same, 1860, paĝoj 318 kaj 320. — "La Evangelio laŭ Spiritismo", ĉap. III.)

PRI LA ANIMO

108. Kie estas la sidejo de la animo?

La animo tute ne estas kiel oni ordinare supozas, lokita en iu parto de la korpo; kune kun la perispirito, ĝi formas fluidecan tutaĵon, trapenetreblan, similan al la tuta korpo, kun kiu ĝi estigas kompleksan estulon, por kiu la morto estas iel **malkunmetado**. Oni povas imagi al si du similajn korpojn, interpenetritajn unu en la dua, kunfanditajn dum la vivo kaj apartigitajn post la morto. Ĉe la morto, unu estas detruata kaj la dua restas.

Dum la vivo la animo pli speciale agas sur la organojn de la penso kaj de la sento. Ĝi estas samtempe interna kaj ekstera; t. e. ĝi radias eksteren; ĝi eĉ povas

izoliĝi de la korpo, transportiĝi malproksimen kaj tie manifesti sian aleston, kiel pravas la observado kaj la somnambulaj fenomenoj.

109. Ĉu la animo estas kreata samtempe kiel la korpo, aŭ antaŭ ol la korpo?

Post la demando pri la ekzisto de la animo, ĉi tiu demando estas el la plej ĉefaj, ĉar el ĝia solvo rezultas la plej gravaj sekvoj; ĝi estas la sola ebla ŝlosilo por amaso da problemoj ĝis nun ne solveblaj, ĉar ĝi ne estis starigita.

El du aferoj unu, aŭ la animo ekzistis aŭ ne ekzistis antaŭ la formado de la korpo: tria vojo ne ekzistas. Kun la antaŭekzisto de la animo, ĉio logike kaj nature klariĝas; sen ĝia antaŭekzisto, estas neeble pravigi certajn dogmojn de la Eklezio, kaj la neebleco de tiu pravigo kondukis multajn rezonemajn homojn al nekredemo.

La Spiritoj solvis tiun demandon, konfirmante la antaŭekziston, kaj la faktoj, kiel ankaŭ la logiko, ne povas lasi dubon pri tiu temo. Eĉ se oni provizore akceptas la antaŭekziston de la animo nur kiel simplan hipotezon, oni vidus tuj ebeniĝi la plej multajn malfacilaĵojn.

110. Se la animo estas antaŭa, ĉu ĝi havis individuecon kaj konscion pri si mem antaŭ sia unuiĝo kun la korpo?

Sen individueco kaj konscio pri si mem, la rezultatoj estus la samaj kiel se ĝi ne ekzistus.

111. Antaŭ sia unuiĝo kun la korpo, ĉu la animo efektivigis iun ajn progreson, aŭ ĝi restis staranta senmove?

La antaŭa progreso de la animo evidentiĝas per la observado de la faktoj kaj per la instruado de la Spiritoj.

112. Ĉu Dio kreis la animojn morale kaj intelekte egalajn, aŭ Li kreis unujn pli perfektajn, pli inteligentajn ol la aliajn?

Se Dio estus farinta animojn pli perfektajn unujn ol aliajn, tia prefero ne estus akordigebla kun Lia justeco. Ĉiuj estas Liaj kreitoj, kial Li estus liberiginta unujn el la laboro, kiun Li trudis al aliaj por atingi la eternan feliĉon? La malegaleco de la animoj en ilia origino estus neado de la justeco de Dio.

113. Se la animoj estas kreitaj egalaj, kiel klarigi la diversecon de la kapabloj, de la naturaj antaŭinklinoj ekzistantaj inter la homoj sur la Tero?

Tiu diverseco estas la konsekvenco de la progreso plenumita de la animo antaŭ ol unuiĝi kun la nova korpo. La animoj pli progresintaj en inteligento kaj moralo estas tiuj, kiuj pli longe vivis kaj pli multe progresis antaŭ sia enkarniĝo.

114. Kia la stato de la animo en ĝia origino?

La animoj estas kreataj simplaj kaj nesciantaj, t. e. sen scienco kaj sen scio pri la bono kaj la malbono, sed kun egala kapablo por ĉio. En la komenco ili estas en ia speco de infanaĝo, sen propra volo, kaj sen klara konscio pri sia ekzistado. Iom post iom la libera volo elvolviĝas same kiel la ideoj. ("La Libro de la Spiritoj", n-ro 114 kaj sekvantaj.)

115. Ĉu la animo plenumis sian antaŭan progreson en stato de vere libera animo, aŭ en antaŭa korpa ekzistado?

Krom la instruado de la Spiritoj pri tiu punkto, la studado de la malsamaj gradoj da progreso de la homo sur la Tero, pruvas, ke antaŭa progreso de la animo plenumiĝis en serio da korpaj ekzistadoj pli aŭ malpli multenombraj, laŭ la grado al kiu ĝi alvenis; la pruvo pri tio rezultas el la observado de la faktoj, kiujn ni havas ĉiutage sub la okuloj. ("La Libro de la Spiritoj", n-roj 166 ĝis 222. — "Revue Spirite", Aprilo 1862, paĝoj 97–106.)

LA HOMO DUM LA SURTERA VIVO

116. Kiel kaj en kiu momento efektiviĝas la unuiĝo de la animo kaj de la korpo?

Ekde la koncipado la Spirito, kvankam vaganta, estas ligita per fluideca fadeno al la korpo kun kiu li devas unuiĝi. Tiu fadeno streĉiĝas ĉiam pli kaj pli, proporcie kiel la korpo elvolviĝas. Tiam la Spirito estas kaptita de perturbo, kiu kreskadas senĉese; kiam alproksimiĝas la naskiĝo la perturbo estas plena, la Spirito perdas la konscion pri si mem kaj nur de la momento kiam la infano spiras, li iom post iom reakiras siajn ideojn, nur tiam la unuiĝo estas kompleta kaj definitiva.

117. Kia estas la intelekta stato de la animo de la infano en la momento de la naskiĝo?

Ĝia intelekta kaj morala stato estas tiu, kiu ĝi estis antaŭ ĝia unuiĝo kun la korpo, t. e. la animo posedas ĉiujn ideojn antaŭe akiritajn; sed pro la perturbo, kiu akompanas ĝian ŝanĝiĝon, ĝiaj ideoj estas provizore en latentaj stato. Ili klariĝas iom post iom, sed nur povas manifestiĝi proporcie kun la elvolviĝo de la organoj.

118. Kiu estas la origino de la denaskaj ideoj, de la trofruaj inklinoj, de la instinktaj kapabloj por iu arto aŭ scienco, esceptante ĉian instruon?

Nur du fontojn povas havi la denaskaj ideoj: aŭ la kreado de unuj animoj pli perfektaj ol aliaj, se ili estus kreadaj samtempe kiel la korpo, aŭ antaŭa progreso farita antaŭ la unuiĝo de la animo kaj la korpo. Ĉar la unua hipotezo ne akordiĝas kun la justeco de Dio, restas nur la dua. La denaskaj ideoj estas rezultato de la scioj akiritaj en antaŭaj ekzistadoj, kaj restis en stato de intuicio, por servi kiel bazo al la akirado de novaj ideoj.

119. Kiel aperas la geniaj homoj en sociaj klasoj sen ia intelekta kulturo?

Tiu fakto pruvas, ke la denaskaj ideoj estas sendependaj de la medio, kie la homo estas edukata.

La medio kaj la edukado elvolvas la denaskajn ideojn, **sed ne donas ilin al la homo**. La genia homo estas la enkarniĝo de altranga, jam multe progresinta Spirito; tial la edukado povas doni mankantan instruadon, sed ne povas doni geniecon, kiam ĉi tio ne ekzistas.

120. Kial estas instinkte bonaj infanoj en perversa medio, malgraŭ la malbonaj ekzemploj, dum ekzistas aliaj instinkte malvirtaj en bona medio, kaj malgraŭ la bonaj konsiloj?

Ĝi estas la rezultato de la plenumita morala progreso, same kiel la denaskaj ideoj estas rezultato de la intelekta progreso.

121. Kial el du infanoj de la samaj gepatroj, edukitaj en la samaj kondiĉoj, unu estas inteligenta kaj la alia estas stulta, unu estas bona kaj alia malbona? Kial la filo de genia homo kelkafoje estas malsprita, kaj tiu de malspritulo estas kelkafoje geniulo?

Tiuj faktoj apogas la originon de la denaskaj ideoj; cetere ili pruvas, ke la animo de la infano neniel devenas de tiu de la gepatroj; alie, laŭ la aksiomo, ke la parto estas el la sama naturo de la tuto, la gepatroj transdonas al siaj infanoj siajn virtojn kaj malvirtojn, kiel ili transdonas al tiuj la elementojn de la korpaj kvalitoj. En la generado, nur la korpo devenas de la korpo, sed la animoj estas sendependaj unuj de aliaj.

122. Se la animoj estas sendependaj unuj de aliaj, de kie venas la amo de la gepatroj al siaj infanoj kaj reciproke?

La Spiritoj unuiĝas per simpatio, kaj la naskiĝo en tiu aŭ alia familio neniam estas efiko de blinda hazardo; plej ofte ĝi dependas de la elekto de la Spirito, kiu reuniĝas al tiuj, kiujn li amis en la mondo de la Spiritoj aŭ en antaŭaj ekzistadoj. Aliflanke, la gepatroj havas kiel

mision helpi la progreson de la Spiritoj, kiuj enkarniĝas en iliajn infanojn; kaj, por ilin vigligi, Dio inspiras al ili reciprokan amon, sed multaj fiaskas en sia misio kaj estas punataj. ("La Libro de la Spirito", n-ro 379, **pri la Infanaĝo.**)

123. Kial ekzistas malbonaj gepatroj kaj malbonaj gefiloj?

Tiuj estas Spiritoj ne ligitaj de simpatio al unu familio, sed por servi kiel reciproka provado, kaj ofte kiel puno pro pekoj de antaŭa ekzistado; al unu estas donita malbona filo, ĉar li mem eble estis malbona filo; al alia, malbona patro, ĉar li mem estis malbona patro, ke ili suferu egalan punon. ("Revue Spirite", 1861, p. 270: **la egala repuno.**)

124. Kial oni trovas, ĉe personoj naskitaj en servista kondiĉo, instinktojn de digneco kaj grandeco, dum aliaj, naskitaj en la superaj klasoj, havas instinktojn de malnobleco?

Tio estas intuicia rememoro pri socia pozicio, kiun oni okupis, kaj pri la karaktero, kiun oni havis en antaŭa ekzistado.

125. Kia la kaŭzo de simpatioj kaj de antipatioj inter personoj, kiuj vidas unu alian je la unua fojo?

Ofte tiuj estas personoj, kiuj konis unu alian, kaj kelkfoje sin reciproke amis aŭ malamis en antaŭa ekzistado, kaj kiuj, sin denove renkontante, estas altirataj unu al la dua.

La instinktaj antipatioj ofte devenas de antaŭaj interrilatoj.

Tiuj du sentoj povas havi ankoraŭ alian kaŭzon. La perispirito disradias ĉirkaŭ la korpo ian specon de atmosfero saturita de la bonaj kaj malbonaj kvalitoj de la enkarniĝinta Spirito. Du personoj kiuj renkontiĝas, sentas per la kontakto de la fluidaĵoj la impreson de la sensitivo; tiu impresio estas agrabla aŭ malagrabla; la fluid-

aĵoj inklinas sin kunfandi aŭ sin forpuŝi reciproke laŭ sia naturo simila aŭ malsimila.

Tiel oni povas klarigi la fenomenon de la transsendo de la penso. Per la kontakto de la fluidaĵoj, du animoj iel legas unu en la dua; ili devenas unu alian sen parolo.

126. Kial la homo ne havas rememoron pri siaj antaŭaj ekzistadoj? Ĉu tiu rememoro ne estas necesa al lia estonta progreso?

(Vidu supre paĝo 64.)

127. Kia estas la origino de la sento nomata "la konscienco"?

Ĝi estas la intuicia rememoro pri la progreso plenumita en antaŭaj ekzistadoj, kaj pri la rezolucioj prenitaj de la Spirito antaŭ la enkarniĝo. Kiel homo ne ĉiam li havas sufiĉan forton por teni tiujn rezoluciojn.

128. Ĉu la homo havas liberan volon aŭ li estas submetita al fataleco?

Se la konduto de la homo estus submetita al fatal-eco, ne ekzistus ĉe li respondeco pro la malbono, nek merito pro la bono; tiam ĉiu puno estus maljustaĵo kaj ĉiu rekompenco estus sensencaĵo. La libera volo de la homo estas konsekvenco de la justeco de Dio, ĝi estas la atributo, kiu donas al li sian dignecon kaj altigas lin super ĉiujn aliajn kreitojn. Tio estas tiel vera, ke la estimo de la homoj unuj al aliaj estas proporcia je la libera volo; kiu ĝin akcidente perdas pro malsano, frenezeco, ebrieco aŭ idioteco, estas bedaŭrata aŭ malestimata.

Materialisto, kiu metas ĉiujn moralajn kaj intelektajn kapablojn sub dependecon de la organismo, reduktas la homon al stato de maŝino, sen libera volo, sekve sen prirespondeco pri la malbono kaj sen merito pro la bono, kiun li faras. ("Revue Spirite", 1861, p. 76: **La kapo de Garibaldi**. — Same, 1862, p. 97: **Frenologio spiritalista**.)

129. Ĉu Dio kreis la malbonon?

Neniul Dio kreis la malbonon; Li starigis leĝojn, kaj

tiuj leĝoj estas ĉiam bonaj, ĉar Li estas suverene bona; kiu fidele obeus tiujn leĝojn, estus perfekte feliĉa; sed la Spiritoj, havante liberan volon, ne ĉiam obeis ilin, kaj la malbono estas rezultato de malobeo al tiuj leĝoj.

130. Ĉu la homo estas naskita bona aŭ malbona?

Estas necese distingi la animon disde la homo. La animo estas kreita simpla kaj nescianta, t. e. nek bona nek malbona, sed pro sia libera volo egale kapabla preni la vojon de la bono aŭ tiun de la malbono, alivorte, kapabla respekti aŭ malrespekti la leĝojn de Dio. La homo naskiĝas bona aŭ malbona laŭ tio, ke li estas enkarniĝo de progresinta aŭ postrestinta Spirito.

131. Kiu estas la origino de la bono kaj de la malbono sur la Tero, kaj kial estas pli da malbono ol da bono?

La origino de la malbono sur la Tero venas de la malperfekteco de la Spiritoj tie enkarniĝintaj; kaj la superregado de la malbono venas de tio, ke la pli multo de la Spiritoj, kiuj tie loĝas, estas malsuperaj aŭ malmulte progresintaj, ĉar la Tero mem estas malsupera mondo. En la mondoj pli progresintaj, kie estas permesata la enkarniĝo nur de purigitaj Spiritoj, la malbono estas nekonata aŭ malpli multa ol la bono.

132. Kio estas la kaŭzo de la malbonoj, kiuj afliktas la homaron?

La Tero povas esti samtempe konsiderata kiel mondo de edukado por la malmulte progresintaj Spiritoj, kaj de puno por kulpaj Spiritoj. La malbonoj de la homaro estas konsekvenco de la morala mulsupereco de la plimulto de la Spiritoj tie enkarniĝintaj. Per la kontakto de iliaj malvirtoj, ili faras unuj aliajn malfeliĉaj kaj estas punataj unuj per aliaj.

133. Kial la malbonulo ofte prosperas, dum la honesta homo estas turmentata de ĉiaj afliktiĝoj?

Por kiu vidas la nunan vivon kaj ĝin supozas unika, tio devas ŝajni frapanta maljustaĵo. Tiu ŝajno tamen malaperas kiam oni konsideras la plurecon de la ekzistadoj, la mallongecon de ĉiu el ili en komparo kun la eterneco. La studado de Spiritismo pruvas, ke la prospereco de la malbonulo havas terurajn sekvojn en liaj postvenantaj ekzistadoj; dum la afliktiĝoj de la bonulo estas, kontraŭe, sekvataj de feliĉo des pli granda kaj daŭra, ju pli da rezignacio li tenis por ilin elporti; tio estas por li kvazaŭ unu tago malfeliĉa en tuta ekzistado de prospereco.

134. Kial unuj naskiĝas en mizero, kaj aliaj en abunda riĉeco? Kial naskiĝas homoj blindaj, surdaj, mutaj, atakitaj de nekuraceblaj malsanoj, dum aliaj havas ĉiujn fizikajn avantaĝojn? Ĉu tio estas efiko de hazardo aŭ faro de la Providenco?

Se ĝi estas efiko de hazardo, ne ekzistas Providenco; se ĝin faras la Providenco, oni demandas, kie estas ĝiaj boneco kaj justeco? Nu, ne komprenante la kaŭzon de tiuj malbonoj, multaj homoj akuzas la Providencon. Oni komprenas, ke tiu, kiu fariĝis mizera aŭ kripla dank'al siaj malsaĝaĵoj aŭ ekscesoj, estas punata laŭ la peko; sed se **la animo estas kreata samtempe kiel la korpo**, kion ĝi faris por meriti tiajn afliktiĝojn **ekde sia naskiĝo** aŭ por esti imuna kontraŭ malbonoj? Se oni kredas la justecon de Dio, oni devas kompreni, ke tiuj efikoj havas kaŭzon; se tiu kaŭzo ne estas dum la vivo, ĝi devas esti antaŭ la vivo; ĉar en ĉiuj aferoj la kaŭzo antaŭas la efikon; tial estas do necese, ke la animo estu vivinta kaj meritinta punon. La spiritismaj studoj efektive montras al ni, ke pli ol unu homo, naskita en mizero, estis riĉa kaj estimata en antaŭa ekzistado, sed ke li malbone uzis la riĉecon, kiun Dio konfidis al li por administri; ke pli ol unu, naskita en malnoblegeco, estis fieraj kaj potencaj; ofte li reaperas submetita al la ordonoj de tiu al kiu li ordonis kun krueleco, turmentata de la malbonaj traktoj kaj la humiligo, kiujn li trudis al aliaj.

Peniga vivo ne ĉiam estas puno; ofte ĝi esta provo elektita de la Spirito, kiu trovas en ĝi rimedon por progressi pli rapide, se li ĝin kuraĝe eltenas. La riĉeco ankaŭ estas provado, sed ankoraŭ pli danĝera ol la mizero, pro la tentoj, kiujn ĝi alportas kaj la ekscesoj, kiujn ĝi estigas; tiel la ekzemplo de kiuj travivis ĝin pravas, ke ĝi estas unu el la provoj el kiuj plej malofte oni eliras kun venko.

La diferencoj de la sociaj pozicioj estus la plej granda maljustaĵo, kiam ili ne estas faro de la nuna konduto, se ili ne havus kompenson. Nur la konvinko akirita pri tiu vero per Spiritismo, donas la forton por elteni la sortoŝanĝojn de la vivo kaj igas nin akcepti nian sorton ne enviante la aliulan.

135. Kial ekzistas idiotoj kaj kretenoj?

La pozicio de la idiotoj kaj kretenoj estus la malplej akordigebla kun la justeco de Dio, en la hipotezo de la unueco de ekzistado. Eĉ el la plej mizera denaska kondiĉo, la homo povas eliri per inteligento kaj laboro; sed la idioto kaj la kreteno estas kondamnitaj ekde de la naskiĝo ĝis la morto al brutiĝo kaj malŝato; por ili ekzistas nenia ebla kompenco. Kial do ilia animo estis kreita idiota?

La spiritismaj studoj, farataj pri la kretenoj kaj la idiotoj, pravas, ke ilia animo estas tiel inteligenta kiel la animoj de la ceteraj homoj; ke tiu kripleco estas puno trudita al Spiritoj, kiuj malbone uzis sian inteligenton, kaj kiu kruele suferas stante sin en katenoj, kiujn ili ne kapablas rompi, kaj pro la malŝato, kies celo ili estas, dum ili estis eble incensitaj en sia antaŭa ekzisto. ("Revue Spirite", 1860, paĝo 173: **La Spirito de unu idioto.** — Same, 1861, p. 311: **La kretenoj.**)

136. Kia estas la stato de la animo dum la dormo?

Dum la dormo nur la korpo ripozas, sed la Spirito ne dormas. Praktikaj observoj pravas, ke en tiu momento la Spirito ĝuas sian tutan liberecon kaj la plenecon de siaj kapabloj. Li profitas la ripozon de la korpo

kaj la momentojn kiam lia ĉeesto ne estas necesa, por agi aparte de la korpo kaj iri kien li volas. Dum la vivo, je iu ajn distanco for de la korpo, la Spirito estas ĉiam ligita al ĉi tiu per fluideca fadeno, kiu servas por lin revoki kiam lia ĉeesto fariĝas necesa; tiu ligilo rompiĝas nur ĉe la morto.

137. Kio estas la kaŭzo de la sonĝoj?

La sonĝoj estas rezultato de la libereco de la Spirito dum la dormo; kelkafoje ili estas la rememoro pri lokoj kaj personoj, kiujn la Spirito vidis aŭ vizitis dum tiu stato. ("La Libro de la Spiritoj": **Liberiĝo de la animo, la dormo, la sonĝoj, somnambulismo, duobla vidado, le-targio**, ktp., n-roj 400 kaj sekvantaj. — "La Libro de la Mediumoj": **Elvoko de vivantaj personoj**, n-ro 284. — "Revue Spirite", 1860, pĝ. 11: **La Spirito sur unu flanko kaj la korpo sur la dua**. — Same, 1860, pĝ. 81: **Studado pri la Spirito de la vivantaj personoj**.)

138. De kie venas la antaŭsentoj?

Tio estas malprecizaj kaj intuiciaj rememoroj pri aferoj, kiujn la animo lernis dum siaj momentoj de libereco, kaj kelkafoje tio estas kaŝitaj avertoj donataj de bonvolemaj Spiritoj.

139. Kial ekzistas sur la Tero sovaĝaj kaj civiliz-itaj homoj?

Sen la antaŭekzisto de la animo, tiu demando estas nesolvebla, escepte se Dio kreus animojn sovaĝajn kaj animojn civilizitajn, kio estus neo de Lia justeco. Aliflanke la racio rifuzas akcepti, ke post la morto la animo de sovaĝulo restos ĉiam en stato de malsupereco, aŭ ke ĝi estos en la sama rango de la animo de klera homo.

Akceptante por la animoj unu saman punkton de starto, la solan doktrinon en harmonio kun la justeco de Dio, la samtempa ekzisto de sovaĝeco kaj de civilizacio sur la Tero estas materiala pruvo pri la progreso, kiun unuj jam plenumis, kaj kiun la aliaj devas ankoraŭ plen-

umi. La animo de la sovaĝulo atingos do kun la tempo la gradon de la animo civilizita; sed, ĉar ĉiutage mortas sovaĝuloj, ilia animo nur povas atingi tiun gradon en sinsekvaj enkarniĝoj, ĉiam pli kaj pli perfektaj, konformaj al ilia progreso, kaj paŝante sur ĉiujn ŝtupojn inter la du ekstremaj punktoj.

140. Ĉu oni ne povus supozi, laŭ la ideo de iuj personoj, ke la animo enkarniĝas nur unu fojon kaj plenumas sian progreson en la stato de Spirito aŭ en aliaj sferoj?

Tiu opinio estus akceptebla, se estus sur la Tero nur homoj en la sama grado morala kaj intelekta, ĉar tiam oni povus pensi, ke la Tero estas difinita por tiu grado; nu, ni havas antaŭ ni la pruvon pri la kontraŭo. Efektive, oni ne komprenus, ke la sovaĝulo ne povus atingi la civilizecon ĉi tie, ĉar estas pli progresintaj animoj enkarniĝintaj sur la sama globuso; el tio oni devas konkludi, ke la ebleco de pluraj surteraj ekzistadoj rezultas el la ekzemploj mem, kiujn oni havas sub la okuloj. Se estus alie, oni devus klarigi: 1.e — kial nur la Tero havus la monopolon de la enkarniĝoj? 2.e — kial, havanta tiun monopolon, tie troviĝas enkarniĝintoj en ĉiuj gradoj?

141. Kial oni trovas, en la medio de la civilizitaj socioj, estulojn kun krueleco egala al tiu de la plej barbaraj sovaĝuloj?

Tiaj estas Spiritoj tre malsuperaj, elirintaj el barbaraj rasoj, kaj kiuj provis enkarniĝi en aliula medio, kie ili sentas sin fremdaj, kvazaŭ kamparano subite transportita en la mondumon.

Rimarko. Oni ne povus opinii ne neante al Dio la tutan justecon kaj la tutan bonecon, ke la animo de la obstinema krimulo havus, en la nuna vivo, la saman punkton de starto, kian havas tiu de homo plena de ĉiuj virtoj. Se la animo ne estus antaŭa ol la korpo, tiu de la krimulo kaj tiu de virta homo estus tiel novaj unu kiel la alia; kial unu estus bona kaj la dua malbona?

142. De kie venas la distingiga karaktero de la popoloj?

Ĝi estas Spiritoj havantaj pli-malpli la samajn gustojn kaj inklinojn, kiuj enkarniĝas en simpatia medio kaj ofte en la sama medio, kie ili povas kontentigi siajn inklinojn.

143. Kiel progresas kaj kiel degeneras la popoloj?

Se la animoj estus kreataj samtempe kiam la korpoj, tiuj de la nunaj homoj estus tute tiel novaj, tute tiel primitivaj, kiel tiuj de la homoj de la mezepoko, kaj sekve oni demandas, kial ili havas pli dolĉajn morojn kaj pli elvolviĝintan inteligenton? Se okaze de la morto de la korpo, la animo definitive forlasus la Teron, oni demandas ankaŭ, kian frukton donus la laboro farata por plibonigi iun popolon, se ĝi estus rekomenciĝo kun ĉiuj animoj, kiuj alvenas kun ĉiu tago?

La Spiritoj enkarniĝas en medio simpatia kaj en rilato kun la grado de sia progreso. Ekzemple, ĉino, kiu sufiĉe progresis kaj jam ne trovas en sia raso medion harmonian kun la grado de li atingita, enkarniĝas en popolo pli progresinta. Laŭmezure kiel unu generacio faras paŝon antaŭen, ĝi altiras per simpatio novajn venantojn pli progresintajn, kiuj eble estas tiuj, kiuj iam vivis en la sama lando, se ili pli progresis, kaj tiel iom post iom nacio progresas. Se la plimulto de la novuloj estas de malsupera naturo, la malnovaj, elirantaj kun ĉiu tago kaj ne revenantaj en medion pli malbonan, tiu popolo degenerus kaj finiĝus estingiĝante.

Rimarko: Tiuj demandoj starigas aliajn, kiuj trovas sian solvon en la sama principo; ekzemple, el kio venas la diverseco de la rasoj sur la Tero? — Ĉu ekzistas rasoj ribel-emaj kontraŭ la progreso? — Ĉu la negra raso estas kapabla atingi la saman nivelon de la Eŭropaj rasoj? — Ĉu sklaveco estas utila al la progreso de la malsuperaj rasoj? Kiel povas efektiviĝi la transformado de la homaro? (“La Libro de la Spiritoj”: *Leĝo de progreso*, n-ro 776 k. sekv. — “Revue Spirite”, 1862, p. 1: *Doktrino pri la defalintaj anĝeloj*. — Same, 1862, p. 97: *Perfekteleco de la negra raso*.)

LA HOMO POST LA MORTO

144. Kiel efektiviĝas la disiĝo de la animo kaj de la korpo? Ĉu ĝi fariĝas subite aŭ laŭgrade?

La liberiĝo fariĝas laŭgrade kaj kun malrapideco malsama laŭ la individuoj kaj la cirkonstancoj de la morto. La ligiloj unuigantaj la animon kaj la korpon, nur iom post iom rompiĝas, kaj des pli malrapide ju pli la vivo estis pli materiala kaj pli voluptama. ("La Libro de la Spiritoj", n-ro 155.)

145. Kia estas la situacio de la animo tuj post la morto de la korpo? Ĉu ĝi havas subite konscion pri si mem? Unuvorte, kion ĝi vidas? Kion ĝi spertas?

En la momento de la morto ĉio unue estas konfuza; la animo bezonas iom da tempo por rekonsciiĝi; ĝi estas kvazaŭ senpripensa kaj en la stato de homo eliranta el la profunda dormo kaj kiu penas ekkompreni sian situacion. La klareco de la ideoj kaj la memoro pri la pasinteco revenas al ĝi laŭ proporcio kiel forviŝiĝas la influo de la materio, el kiu ĝi ĵus sin liberigis, kaj disbloviĝas la speco de nebulo, kiu malheligis ĝiajn pensojn.

La daŭro de konfuzo sekvanta la morton estas tre varia, ĝi povas daŭri nur kelkajn horojn, kiel ankaŭ plurajn tagojn, plurajn monatojn kaj eĉ plurajn jarojn. Ĝi estas malpli longa ĉe tiuj, kiuj dum sia vivo identiĝis kun sia estonta stato, ĉar ili tuj komprenas sian situacion; ĝi estas tiel pli longa kiel pli materie vivis la homo.

La sensacio, spertata de la animo en tiu momento, estas tre varia; la perturbo sekvanta la morton, estas neniel dolora por la virta homo; ĝi estas trankvila kaj en ĉio simila al tiu, kiu sekvas pacan vekigon. Por tiu, kies konscienco ne estas pura kaj kiu estas pli ligita al la materia ol al la spirita vivo, ĝi estas plena de malkvieteco kaj angoroj, kiuj pligrandiĝas laŭmezure kiel li reakiras konscion; ĉar tiam li estas kaptita de timo kaj de ia speco de teruro pro tio, kion li vidas, kaj precipe pro tio, kion li antaŭvidas.

La sensacio, kiun oni povus nomi fizika, estas tiu de granda faciligo kaj senlima bonstato; oni sentas sin kvazaŭ liberigita el ŝarĝo, kaj oni estas feliĉega jam ne senti la korpajn dolorojn, kiujn oni suferis antaŭ kelkaj momentoj, senti sin libera, facilmovi kaj vigla kiel tiu, de kiu oni ĵus deprenis pezajn katenojn.

En sia nova situacio, la animo vidas kaj aŭdas tion, kion ĝi vidis kaj aŭdis antaŭ la morto, sed ĝi vidas kaj aŭdas ankaŭ aliajn aferojn, kiuj eskapadis al la maldekliteco de ĝiaj korpaj organoj; ĝi havas sensaciojn kaj perceptojn al ni nekonatajn. ("Revue Spirite", 1859, paĝo 244: **Morto de spiritisto**. — Same, 1860, paĝo 332: **La vekigo de la Spirito**. — Same, 1862, pĝ. 129 kaj 171: **Enteriga soleno de S-ro Sanson**.)

Rimarko. Ĉi tiuj respondoj kaj ĉiuj aliaj pri la situacio de la animo post la morto aŭ dum la vivo, ne estas rezultato el teorio aŭ sistemo, sed el rektaj studoj farataj pri miloj da personoj observataj en ĉiuj fazoj kaj en ĉiuj periodoj de ilia spirita ekzistado, ekde la plej malalta ĝis la plej alta ŝtupo de la ŝtuparo, laŭ iliaj kutimoj dum la surtera vivo, laŭ la speco de la morto k. a. Parolante pri la estonta vivo oni ofte diras, ke oni nenion scias pri ĝi, ĉar neniu de tie revenis; ĉi tio estas eraro, ĉar ĝuste tiuj, kiuj tie troviĝas, venas instrui nin, kaj Dio ĝin permesas hodiaŭ pli ol en iu ajn alia epoko, kiel lasta averto al nekredemo kaj materialismo.

146. Ĉu la animo forlasinta la korpon, vidas Dion?

La kapabloj de la animo estas proporciaj je ĝia elpuriĝo; nur la plej perfektaj animoj povas ĝui la ĉeeston de Dio.

147. Se Dio estas ĉie, kial ne ĉiuj Spiritoj povas Lin vidi?

Dio estas ĉie, ĉar Li disradias ĉien, kaj oni povas diri, ke la universo estas mergita en Dio, kiel ni estas mergitaj en la suna lumo; sed la subevolviĝintaj Spiritoj estas ĉirkaŭitaj de ia speco de nebulo, kiu Lin kaŝas de iliaj okuloj, kaj kiu nur disiĝas laŭmezure kiel ili elpur-

iĝas kaj elmateriiĝas. La malsuperaj Spiritoj estas koncerne la vidon de Dio, tiaj, kiaj estas la enkarnuloj pri la Spiritoj, vere blindaj.

148. Ĉu post la morto la animo konscias pri sia individueco; kiel ĝi konstatas tion kaj kiel ni povas la samon konstati?

Se la animoj ne havus sian individuecon post la morto, ĝi estus por ili kaj por ni absolute la samo kiel se ili jam ne ekzistus, kaj la moralaj konsekvencoj estus ĝuste la samaj; ili havus nenian distingigan karakteron, kaj tiu de krimulo estus en la sama rango de tiu de virta homo, el kio rezultus, ke oni havus neniun intereson fari la bonon.

La individueco de la animo estas malkaŝata en maniero, por tiel diri materiala, en la spiritaĵoj manifestiĝoj, per la parolmaniero kaj la kvalitoj apartaj de ĉiu; ĉar ili pensas kaj agas en malsamaj manieroj, unuj estas bonaj kaj aliaj malbonaj, unuj estas kleraj kaj aliaj malkleraj, unuj volas tion, kion aliaj ne volas, tio estas evidenta pruvo, ke ili ne estas kunfanditaj en homogena tutaĵo, ne parolante pri la evidentaĵoj, kiujn ili donas al ni esti animintaj tiun aŭ tiun individuon sur la Tero. Dank'al la eksperimenta Spiritismo, la individueco de la animo jam ne estas io malpreciza, sed ĝi jam estas rezultato de observado.

La animo mem konstatas sian individuecon, ĉar ĝi havas siajn pensojn kaj volojn proprajn, diferencajn de tiuj de aliaj. Ĝi ankaŭ tion konstatas per sia fluideca envolaĵo aŭ perispirito, speco de limita korpo, kiu faras ĝin aparta estulo.

Rimarko. Certaj personoj supozas ŝpari al si la riproĉon de materialismo, akceptante ian universalan inteligentan principon, el kiu ni absorbas parton ĉe la naskiĝo, kio estus la animo, por ĝin redoni post la morto al la komuna maso, kie ĉiuj animoj kunfandiĝas kiel akveroj en la oceano. Ĉi tiu sistemo, speco de transiĝo, ne meritas eĉ la nomon de *spiritualismo*; ĉar ĝi estas tiel malespera kiel materialismo mem; tiu komuna rezervujo de la universala tutaĵo estus egala al la neniaĵo, ĉar tie jam ne estus individuecoj.

149. Ĉu la speco de morto influas la staton de la animo?

La stato de la animo tre konsiderinde varias laŭ la speco de la morto, sed ĉefe laŭ la naturo de la kutimoj dum la vivo. Ĉe natura morto, la liberiĝo okazas laŭgrade kaj sen skuoj; ofte ĝi komenciĝas eĉ antaŭ ol la vivo estingiĝas. Ĉe morto perforta, per ekzekuto, memmortigo aŭ akcidento, la ligiloj estas abrupte rompita; la spirito, senprezare surprizita, estas kvazaŭ senkonscia pro la ŝanĝo okazinta en li mem, kaj ne klarigas al si mem sian situacion. Fenomeno pli-malpli konstanta en tiu okazo, estas la konvinko en kiu li troviĝas, ke li ne estas mortinta, kaj ĉi tiu iluzio povas daŭri plurajn monatojn, kaj eĉ plurajn jarojn. En tia stato li iras tien kaj reen, kaj supozas okupiĝi pri siaj aferoj, kvazaŭ li estus ankoraŭ de ĉi tiu mondo, tre surpriziĝas kiam oni ne respondas liajn demandojn. Ĉi tiu iluzio ne apartenas ekskluzive al la okazoj de perforta morto; oni ĝin trovas eĉ multaj individuoj, kies vivo estis absorbita per ĝuoj kaj materiaj interesoj. ("La Libro de la Spiritoj", n-ro 165. — "Revue Spirite", 1858, paĝo 166: **La memmortiĝinto de la Samaritaine**. — Same, 1858, paĝo 326: **Unu Spirito en la ceremonio de la entombigo de lia korpo**. — Same, 1859, paĝo 184: **La Zuavo el Magenta**. — Same, 1859, paĝo 319: **Unu Spirito, kiu ne kredas sin mortinta**. — Same, 1863, paĝo 97: **François Simon Louvet**.)

150. Kien la animo iras post kiam ĝi forlasis la korpon?

Ĝi neniel perdiĝas en la senlimeco de la Infinito, kiel oni ordinarie imagas al si; ĝi vagas en la spaco, kaj pli ofte en la medio de tiuj, kiujn ĝi konis, kaj ĉefe de tiuj, kiujn ĝi amis, povante transportiĝi en momento al grandegaj distancoj.

151. Ĉu la animo konservas la korinklinojn, kiujn ĝi havis sur la Tero?

Ĝi konservas ĉiujn moralajn korinklinojn; ĝi forges-

as nur la materialajn inklinojn, kiuj jam ne apartenas al ĝia esenco; tial ĝi venas feliĉa revidi siajn parencojn kaj amikojn, kaj ĝi sentas ĝojon pro ilia rememoro. ("Revue Spirite", 1860, paĝo 202: **La amikoj ne forgesas nin en la alia mondo.** — Same, 1862, paĝo 132.)

152. La animo konservas la memoron pri tio, kion ĝi faris sur la Tero; ĉu ĝi interesiĝas pri la laboroj, kiujn ĝi lasis nefinitaj?

Tio dependas de ĝia alteco kaj de la karaktero de tiuj laboroj. La elmateriigintaj Spiritoj malmulte priokupiĝas pri materiaj aferoj el kiuj ili sentas sin feliĉaj liberiĝi. Koncerne la laborojn, kiujn ili komencis, laŭ ilia graveco kaj utileco, kelkafoje ili inspiras al aliaj la penson ilin fini.

153. Ĉu en la mondo de la Spiritoj la animo renkontas siajn parencojn kaj amikojn, kiuj ĝin antaŭiris tien?

Ĝi renkontas ne nur tiujn, sed ankaŭ multajn aliajn, kiujn ĝi konis de siaj antaŭaj ekzistadoj. Ordinare tiuj kiuj plej vive amis ĝin, venas akcepti ĝin ĉe ĝia alveno en la mondo de la Spiritoj, kaj helpas ĝin liberiĝi el la surteraj ligiloj. Tamen la neebleco vidi la plej karajn animojn kelkafoje estas puno por kulpuloj.

154. Kia estas en la alia vivo la morala kaj intelekta stato de la animo de infano mortinta en malalta aĝo? Ĉu ĝiaj kapabloj estas en infaneco kiel dum la vivo?

La nekompleta elvolviĝo de la organoj de la infano ne permesas al la Spirito plene manifestiĝi; liberaj el tiu envolaĝo, liaj kapabloj estas tiaj, kiaj ili estis antaŭ la enkarniĝo. Ĉar la Spirito pasigis nur kelkajn momentojn en la vivo, liaj kapabloj ne povis ŝanĝiĝi.

Rimarko. En la spiritaj komunikiĝoj, la Spirito de infano povas do paroli kiel tiu de matura homo, ĉar li povas esti tre progresinta Spirito. Se li kelkafoje uzas infanan lingvaĵon, tio estas por ne forpreni de la patrino la ĉarmon,

kiu ŝin ligas per amo al gracila kaj delikata estulo, ornamita per la gracio de senkulpeco. ("*Revue Spirite*", 1858, paĝo 17: *Panjo! ... mi estas ĉi tie.*)

La sama demando povante esti farata pri la intelekta stato de la animo de kretenoj, idiotoj kaj frenezuloj post la morto, ĝi trovas respondon en la antaŭaj klarigoj.

155. Kia diferenco ekzistas, post la morto, inter la animoj de scienculo kaj malklerulo, de sovaĝulo kaj civilizito?

Preskaŭ la sama diferenco, kiu ekzistis inter ili dum la vivo; ĉar la eniro en la mondon de la Spiritoj ne donas al la animo ĉiujn sciojn, kiuj al ĝi mankis sur la Tero.

156. Ĉu la animoj progresas intellekte kaj morale post la morto?

Ili progresas pli aŭ malpli, laŭ sia volo, kaj kelkaj progresas multe; sed ili bezonas meti en praktikon, dum la enkorpora vivo, tion, kion ili akiris en scienco kaj moraleco. Kiuj restis senprogresaj, tiuj reprenas ian ekzistadon analogan al tiu, kiun ili lasis; la progresintoj meritigas enkarnecon de pli alta ordo.

Ĉar la progreso estas proporcia kun la volo de la Spirito, iuj Spiritoj konservas dum longa tempo la samajn gustojn kaj la inklinojn, kiujn ili havis dum la vivo kaj tenas la samajn ideojn. ("*Revue Spirite*", 1858, paĝo 82: **La reĝino de Oude.** — Same, paĝo 145: **La Spirito kaj la heredintoj.** — Same, paĝo 186: **La tamburisto de Bérésina.** — Same. 1859, paĝo 344: **Antikva ĉaristo.** — Same, 1860, paĝo 325: **Progreso de la Spiritoj.** — Same, 1861, paĝo 126: **Progreso de perversa Spirito.**)

157. Ĉu la sorto de la homo, en la estonta vivo, estas nenuligeble fiksita post la morto?

La nenuligebla fiksado de la sorto de la homo post la morto estus la absoluta neado de la justeco kaj de la boneco de Dio, ĉar multaj ne povis sufiĉe instruiĝi, eĉ se ni ne pensus pri la idiotoj, la kretenoj, la sovaĝuloj

kaj la multegaj infanoj, mortintaj antaŭ ol kompreni la vivon. Eĉ inter la plej kleraj, ĉu estas multaj, kiuj povas juĝi sin sufiĉe perfektaj por ne bezoni ion plian fari, kaj ĉu ne estas evidenta pruvo, ke per Sia boneco Dio permesas al la homo fari morgaŭ tion, kion li ne povis fari hieraŭ? Se la sorto estas nenuligeble fiksita, kial la homoj mortas en tiel diferencaj aĝoj, kaj kial Dio, en Sia justeco, ne lasas al ĉiuj la tempon necesan por fari kiel eble plej multe da bono, kaj por ripari la malbonon faritan? Kiu scias, ĉu la kulpulo, mortinta tridekjara, ne estus pentinta kaj fariĝinta virta homo, se li estus vivinta dum sesdek jaroj? Kial Dio forprenis de li la rimedon, dum Li ĝin konsentis al aliaj? La sola diverseco de la daŭro de la vivo kaj la morala stato de la plej multaj homoj, pruvas la neeblecon, se oni akceptas la justecon de Dio, ke la sorto de la animo estu nenuligeble fiksita post la morto.

158. Kia estas, en la estonta vivo, la sorto de la infanoj mortintaj en malgranda aĝo?

Ĉi tiu demando estas unu el tiuj, kiuj plej bone pravas la justecon kaj la bezonon de la plureco de la ekzistadoj. Animo vivinta nur kelkajn momentojn, ne farinte bonon nek malbonon, ne meritis rekompenccon nek punon; laŭ la maksimumo de la Kristo, ke **ĉiu estas punata aŭ rekompencata laŭ siaj faroj**, estus tiel mallogike kiel kontraŭe al la justeco de Dio, ke, sen laboro, ĝi estus vokita por ĝui la perfektan feliĉon de la anĝeloj, aŭ ke ĝi povus esti senigita je tiu feliĉo, **kaj tamen ĝi devas havi ian ajn sorton**; nedifinita stato, por la eterneco, estus tute egale maljusta. Ĉar ekzistado interrompita tuj en sia komenco ne povas do havi ian konsekvencon por la animo, ĝia nuna sorto estas tiu sama, kiun ĝi meritis en sia antaŭa ekzistado, kaj ĝia estonta sorto estos tiu, kiun ĝi meritis per siaj postaj ekzistadoj.

159. Ĉu la animoj havas okupojn en la alia vivo? Ĉu ili okupiĝas de aliaj aferoj krom siaj ĝojoj aŭ siaj suferoj?

Se la animoj okupiĝus nur pri si mem en la Eterneco, ĉi tio estus egoismo, kaj Dio, kiu kondamnas la egoismon, ne povus aprobi en la spirita vivo tion, kion Li punas en la korpa vivo. La animoj aŭ Spiritoj havas okupojn laŭ sia grado da progreso, dum samtempe ili penas instruiĝi kaj pliboniĝi. ("La Libro de la Spiritoj", n-ro 558: **Okupoj kaj misioj de la Spiritoj.**)

160. En kio konsistas la suferoj de la animo post la morto? Ĉu la kulpaj animoj estas torturataj en materiaj flamoj?

La Eklezio plene rekonas hodiaŭ, ke la fajro de la Infero estas morala kaj ne materiala fajro, sed ĝi ne difinas la naturon de la suferoj. La spirita komunikado metas ilin sub niajn okulojn; per tiu rimedo ni povas ilin taksu kaj konvinkiĝi, ke, kvankam ili ne rezultas el materia fajro, kiu efektive ne povus bruligi nemateriajn animojn, en certaj okazoj ili ne estas malpli teruraj. Tiuj punoj neniel estas unuformaj; ili varias senlime laŭ la karaktero kaj la grado de la faritaj pekoj, kaj preskaŭ ĉiam la pekoj mem funkcias kiel punoj: tiel iuj murdintoj estas devigataj resti en la loko mem de la krimo kaj senĉese vidi siajn viktimojn sub siaj okuloj; la voluptulo ĝuema de maldelikataj materiaj sensacioj de sensualismo, konservas tiujn samajn gustojn, sed ne havas la eblecon ilin materiale kontentigi kaj ĉi tio estas torturado por li; iuj avaruloj supozas suferi la malvarmon kaj la seniĝojn, kiujn ili eltenis dum la vivo pro avarco; aliaj restas apud la trezoroj, kiujn ili enterigis, turmentataj senĉese de la timego, ke oni ilin forprenos; unuvorte, ne ekzistas unu malvirto, unu morala malperfektaĵo, unu malbona ago, kiu ne havas sian kompensadon kaj siajn naturajn konsekvencojn en la mondo de la Spiritoj; kaj tial ne estas necesa ia limigita kaj ĉirkaŭita loko: ĉie, kie li troviĝas, la perversa Spirito portas kun si sian suferon.

Krom la spirita punoj, estas ankaŭ la punoj kaj provoj materiaj, kiujn la neelpurigita Spirito suferas en nova enkarniĝo, dum kiu li estas lokita en kondiĉojn por

suferi tion, kion ili igis aliajn suferi: esti humiligita, se li estis orgojla; mizera, se li estis malbona riĉulo; malfeliĉa pro siaj infanoj, se li estis malbona filo, ktp.

Kiel ni diris, la Tero estas unu el la lokoj de ekzilo kaj pentofaro, **iu purgatorio**, por la Spiritoj korektendaj, al kiu dependas de ĉiu el ni ne plu reveni, pliboniĝante sufiĉe por meriti pli bonan mondon. ("La Libro de la Spiritoj", n-ro 237: **Perceptoj, sensacioj kaj suferoj de la Spiritoj**. — Same, 4^a. parto: **Esperoj kaj konsoloj; estontaj suferoj kaj ĝuoj**. — "Revue Spirite", 1858, paĝo 79: **La murdinto Lemaire**. — Same, 1858, paĝo 166: **La memmortiginto de la Samaritaine**. — Same, 1858, paĝo 331: **Sensacioj de la Spiritoj**. — Same, 1859, paĝo 275: **Pastro Crépin**. — Same, 1860, paĝo 61: **Estelle Régnier**. — Same, 1860, paĝo 247: **La memmortiginto de Strato Quincampoix**. — Same, 1860, paĝo 316: **La puno**. — Same, 1860, paĝo 325: **Eniro de kulpulo en la mondon de la Spiritoj**. — Same, 1860, paĝo 384: **Puno de egoisto**. — Same, 1861, paĝo 53: **Memmortigo de ateisto**. — Same, 1861, paĝo 270: **La rebata puno**.)

161. Ĉu la preĝo estas utila por la suferantaj animoj?

La preĝo estas rekomendata de ĉiuj bonaj Spiritoj; cetere, ĝi estas petata de la malperfektaj Spiritoj kiel rimedo por faciligi iliajn suferojn. La animo, por kiu oni preĝas, ĝuas faciligon, ĉar preĝo estas atesto de intereso, kaj la malfeliĉulo estas ĉiam kvietigata, kiam li trovas karitemajn korojn, kiuj kompatas liajn dolorojn. Cetere, per la preĝo oni ekscitas la penson kaj la deziron fari tion, kio estas necesa, por esti feliĉa; tiel oni povas mallongigi lian punon, se liaflanke li helpas per sia bona volo. ("La Libro de la Spiritoj", n-ro 664. — "Revue Spirite", 1859, paĝo 315: **Efikoj de la preĝo super suferantaj Spiritoj**.)

162. En kio konsistas la ĝuoj de la feliĉaj animoj? Ĉu ili pasigas la eternecon en kontemplado?

La justeco postulas, ke la rekompenco estu proporcia

je la merito, same kiel la puno je la graveco de la peko; estas do nekalkuleblaj gradoj en la ĝuado de la animo, de la momento kiam ĝi eniras en la vojon de la bono ĝis kiam ĝi atingas la perfektecon.

La feliĉo de la bonaj Spiritoj konsistas en la kono de ĉiuj aferoj, ne havi malamon, nek ĵaluzon, nek envion, nek ambicion kaj nenian el la pasioj, kiuj faras la mal-feliĉon de la homoj. La amo, kiu ilin unuigas, estas por ili la fonto de superega feliĉo. Ili ne havas niajn bezonojn, nek suferojn, nek angorojn de la materia vivo. La stato de ĉiama kontemplado estus stultega, monotona feliĉo; ĝi estus la feliĉo de la egoistoj, ĉar ilia ekzisto estus senfina nuleco.

Kontraŭe, la spirita vivo estas senĉesa aktiveco per la misioj, kiujn la Spiritoj ricevas de la Plej Alta Estulo, kiel Liaj agentoj en la regado de la universo; misioj proporciaj je ilia progreso, kaj pri kiuj ili estas feliĉaj, ĉar tiuj misioj liveras al ili okazojn esti utilaj kaj fari la bonon. ("La Libro de la Spiritoj", n-ro 558: **Okupoj kaj misioj de la Spiritoj.** — "Revue Spirite", 1860, paĝoj 321 kaj 322: **La puraj Spiritoj; la loĝejo de la feliĉegaj.** — Same, 1861, paĝo 179: **Madame Gourdon.**)

Rimarko. Ni invitas la kontraŭulojn de Spiritismo kaj tiujn, kiuj ne akceptas la reenkarneigon, doni al la supraj problemoj solvon pli logikan per ĉiu alia principo krom tiu de la plureco de la ekzistadoj.

FINO

La Komenco de la Historio

En la jaro 1848, en la vilaĝeto Hydesville, Ŝtato Nov-Jorko, Usono, loĝis John D. Fox kun sia edzino Margaret kaj du filinoj: — Margaretta, 15-jara, kaj Katie, 12-jara.

En la nokto de 31 de Marto de tiu jaro la knabinoj ek-timis pro fortaj frapoj sur la muroj de ilia dormoĉambro, kaj enkuris en la ĉambron de siaj gepatroj

S-ro John D. Fox eliris kaj rigardis ĉirkaŭ la domo, sed neniu estis tie. La frapado tamen daŭre ripetadis plu. Iom post iom la knabinoj konvinkiĝis, ke la frapanto ne estas danĝera, forpelis la timon kaj alparolis lin. Per interkonsentita nombro da frapoj li respondis la demandojn pri ciferoj — aĝo, nombro da infanoj k. s. — ĉiam ĝuste. Oni proponis al li interkonsentitan abocon per frapoj kaj li rakontis sian propran historion. Li estis kolportisto 31-jara, nomata Charles Rosma, havis kvin infanojn: tri knabinojn kaj du knabojn. Antaŭ kvin jaroj oni murdis lin en tiu domo por rabi kvincent dolarojn, kiujn li tenis. Lian kadavron oni enterigis en la kelo de tiu domo.

La familio Fox kaj ties najbaroj fosis en la kelo por serĉi la kadavron, sed la loko estis marĉa kaj akvo kun koto inundis ĉiun fosaĵon. Oni devis forlasi tiun klopodadon ne trovinte la kadavron.

La knabinoj forvojaĝis: Margaretta iris al Rochester, N. J., en la hejmon de sia edzinigita fratino S-ino Fish; Katie veturis al najbara urbo.

En ambaŭ lokoj la frapoj komenciĝis kaj aliaj personoj konstatis, ke ankaŭ ili havas la povon ricevi tiajn inteligentajn frapojn. Tiuj provoj fariĝis epidemio en Usono kaj transsaltis la oceanojn kaj disvastiĝis en Anglujo, Francujo k. a. landoj tra la mondo.

Oni forte kalumniis la fratinojn Fox, sed malgraŭ tio la frapoj furoris tra la mondo kaj tiel naskiĝis Spiritismo.

Nur 56 jarojn pli poste, kiam la frapoj en Hydesville jam estis tute forgesitaj, iu okazintaĵo pravigis la historion de Charles Rosma.

La 23-an de Novembro 1904, la "Boston Journal" publikigis artikolon pri la eltrovo de homa skeleto en la kelo de ruinigita domo de Hydesville. La iama loĝejo de familio Fox estis nun forlasita ruinaĵo kaj iuj knaboj, revenantaj el lernejo, tie haltis por ludi en la ruinoj, kaj konstatis, ke en la kelo estis falinta interna muro, iam starigita paralele kun la ekstera, kaj inter tiuj du muroj kuŝis homa skeleto kaj fera kofro.

Tiuj estis la restaĵoj de Charles Rosma, murdita tie antaŭ 61 jaroj, fare de antaŭaj loĝantoj en tiu domo nun ruinigita.

La fosado en la kelo neniam trovis la kadavron, ĉar ĝi kuŝis post la interna muro de la kelo, dum oni fosis nur interne, supozante, ke tiu muro estis ekstera.

La asertoj de la mortinto estis do veraj kaj similaj faktoj okazas ĝis nun en aliaj lokoj de la mondo. Spiritismo renaskiĝas ĉiam, ĉar ĝia fundamento estas naturaj faktoj, kiuj ĉiam ripetigās.

Nun ekzistas tre riĉa kaj bela mediumeca literaturo, kiu kreskas kun ĉiu tago.

Tiuj faktoj estas eternaj. Ties neperfekta observado naskis la malnovajn mitologiojn, religiojn, superstiĉojn; ilia pli detala studado em nia tempo estas la kreskanta vivo de Spiritismo.

Studante tiujn faktojn, Allan Kardec publikigis de 1857 ĝis 1869 tre interesajn librojn, el kiuj jam aperis en Esperanto la plej gravaj, nome "La Libro de la Spiritoj", "La Libro de la Mediumoj", "La Evangelio laŭ Spiritismo".

Ĉar la faktoj nun nomataj spiritismaj ripetigās spontanee en ĉiuj lokoj kaj en ĉiuj tempoj, Spiritismo nepre varbos al si en la estonteco la tutan mondon, simile kiel ĉiuj aliaj veraĵoj apogataj sur faktoj. Ĝi ne estas ia religia sekto de iuj homoj, kiel tiom da aliaj. En la estonteco ĝi apartenos al ĉiuj.

Ĉiuj atakoj, kontraŭdiroj, persekutoj, kalumnioj estos vanaj kaj tiel ridindaj kiel la iama malkonsento pri la movoj de la Tero kaj pri ekzisto de antipodanoj.

Nur nescio fanatike neas sen antaŭa studado de la temo diskutata.

La Trad.

*

PRI LA TRADUKO

Nia karmemora samideano Prof. D-ro L. C. Porto Carreiro Neto subite mortis, la 21-na de Julio 1964, kiam li estis faranta la malneton por la traduko de ĉi tiu bonega libro.

Kvankam ne posedante lian kompetentecon mi devis fini la tradukadon kaj eldoni la libron; tial la kleraj legantoj atentis, ke la dua duono de la libro ne estas tiel elegante tradukita kiel la unua parto, sed mi esperas, ke ankaŭ mia traduko estas tre fidela al la originalo.

I. G. B.

Aliaj senpagaj verkoj de **Allan Kardec** en **Esperanto**:



LA LIBRO DE LA SPIRITOJ

<http://www.febnet.org.br/pdf/esperant/spiritoj.pdf>

enhavanta la principojn de la **Spiritisma Doktrino** pri la senmorteco de la animo, la naturo de la Spiritoj kaj ties rilatoj kun la homoj, la moralaj leĝoj, la nuntempa vivo, la estonta vivo kaj la estonteco de la homaro, laŭ la instruado donita de la Superaj Spiritoj pere de pluraj mediumoj, kolektitajn kaj ordigitajn de **ALLAN KARDEC**.



LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO

<http://www.febnet.org.br/pdf/esperant/evangelio.pdf>

enhavanta la eksplikadon de la moralaj maksimoj de la Kristo, ilian konformecon kun Spiritismo kaj ilian aplikadon al la diversaj situacioj de la vivo.



LA LIBRO DE LA MEDIUMOJ

<http://www.febnet.org.br/pdf/mediumoj.pdf>

enhavanta la specialan instruadon de la Spiritoj pri la teorio de ĉiaspecaj manifestiĝoj, la rimedojn de komunikado kun la nevidebla mondo, la disvolviĝon de la mediumeco, la malfacilaĵojn kaj rifojn, kiujn oni povas renkonti en la praktikado de Spiritismo.